

Bô Yin Râ

LA LIBRO PRI LA
VIVANTA DIO

KOBERSCHE VERLAGSBUCHHANDLUNG AG
BERN

Bô Yin Râ
estas la spirita nomo de
Joseph Anton Schneiderfranken
(1876 – 1943)

El la Germana originalo („Das Buch vom lebendigen Gott“,
6a eldono, represo de la eldono de 1927)
tradukis A. Rehfeldt (<http://www.a-rehfeldt.de>)

© 1927, 1957, 1971, 1981
êe Kober Verlag Bern, Svislando

Enkonduko

*Tiun ĉi libron legu neniu, kiu estas pia kredanto.
Tiun ĉi libron legu neniu, kiu neniam dubis pri
Dio.*

Ĝi estas skribita por tiuj homoj, kiuj en severa interna luktado volis *atingi* sian Dion, sed lin ne trovis.

Ĝi estas skribita por ĉiuj, kiuj fiksiĝis inter la dor-
noj de *duboj*.

Ilin ĝi helpos.

Al ili ĝi estos vojomontrilo.

Kion mi donas ĉi tie, estas *pratempa saĝo*.

La malmultaj homoj en ĉiu tempo, kiuj povis senti ĝin, ĉiam tenis ĝin *en sekreto*.

Nur malofte, nur en horo elektita kaj nur en mal-
lumaj simboloj estis permesate en antaŭaj tempoj
paroli pri ĝi al la mondo.

Sed nun estas veninta la tempo por paroli *pli
klare* pri ĝi, nun ke *distorditaj* bildoj de tiu saĝo
estis kaj estas disvastigataj en la mondo fare de
nevokitoj.

En la „*plej interna Oriento*“ estis decidate, ke la „sankta ujo“, longe kaj plej zorge gardita kontraŭ profanaj okuloj, nun estu malfermata al la homoj de l’ okcidento.

Tiu, kiu ĝin malfermas tie ĉi, estas rajtigita fari tion.

Sed ankoraŭ oni postulas, ke la serĉanto estu *severe provata*, kaj neniu povas *eniri* en la templon antaŭ la *trapaso* de la provo. –

Tial povas esti montrata unue nur *de malproksime* tio, kion tiu inda iam *spirite ekkonos* kaj *kompre-nos*.

Kio estas *direbla* pri la sekretoj de la templo, tion mi diros al vi.

Se vi volas *ekkoni ilian fundon*, tiam vi devas peni *sperti* ilin en via propra interno.

Ili raveliĝas vere *nur al tiu*, kiu *luktante per ĉiuj siaj fortoj akiras ilin*. –

Per nura „*legado*“ de miaj vortoj vi estos akirintaj *malmulton* .

Kio ĉi tie fariĝas *vorto*, tio devas trovi *pretajn korojn*: – korojn, kiuj scias ĝin *enpreni* kaj en si *tenadi*, alie ĝi *vane* fariĝis vorto. –

Sed neniu povas fari *juĝon* pri valoro aŭ senvaloreco de tio legita, antaŭ ol trapasi la multe postulan-

tan provon, al kiu li devas submeti sin, se li volas *mem eniri* en la templon. –

Nur tiuj estantaj *interne* de la templo povas formi al si juĝon pri tio.

Mi povas montri ĉi tie nur *de ekstere* tion, kio estonte raveliĝu *en la plejinterno* de la homo tiele instruita.

Por ke ĝi raveliĝu, estas bezonata longe persistanta, alta *volo*, kaj nur tiu kiu devige estigas en si tiun volon, povas esperi konfirmon de miaj vortoj en si mem.

Li trovos la vojon al sia *vivanta Dio*.

Li trovos en si mem la regnon de l' spirito kaj ties altajn potencojn.

Lia Dio estos „*naskata*“ en li mem.

Estas malproksime de mi prezenti „*pruvojn*“.

Ĉu miaj vortoj konigas *veron*, tion vi devas *mem elprovi*.

Nur *en vi mem* loĝas tiu kvieta juĝanto, kiu al vi konfirmas, kion mia vorto sentigas al vi.

Miajn pruvojn *vi ne* povus *kompreni*, ĉar vi ne iris la vojojn, kiujn mi devis pene tramigri. –

Cetere, ĉi tie ne ekzistas „*ĝenerale validaj*“ pruvoj.

Ĉi tie, ĉiu trovas la pruvon por li definitive konvinkan nur *en si mem*. — — —

Mi ankaŭ ne donas al vi „*sciencon*“ kaj ne proklamas al vi „*kredon*“.

Mi montras al vi nur tion *montreblan* el la *saĝo de l' „plej interna Oriento“*, el la alta sekreto de l' *Templo de la Eterno*.

Mia parolo instigu vin fine *vekigi al vi mem*, ĉar ankoraŭ *neniu* el vi scias, — *kiu li estas*. —

Beno kaj forto doniĝu al *ĉiuj*, kiuj estas de *bona volo* kaj *persista volado*.

„La tabernaklo de Dio estas kun la homoj“

Jam en antikva tempo, kvieta sciigo venis el la sunleviĝejo al la okcidento kaj prezentis, en formo de imagoj formitaj laŭ pia Kristana kredo, *misteran unuiĝon de sciantaj agantoj, alligitan al la spirito*, – sed la homoj de la okcidento *ne sciis interpreti tion*, kio tiumaniere estis atinginta ilin.

Vualo de legendo teksigis ĉirkaŭ la „*sankta Gralo*“ kaj ĝia alta „kavaliraro“.

Konsoloplena scio subiĝis en malluma mito, – fariĝis la legendeca fono de pia poezio.

Sed jen okazis en nia tempo, ke fantaste ornamitaj raportoj de strangaj mistagogoj parolis antaŭ la tuta mondo pri *sekretosciantoj kaŝe vivantaj en la interna oriento*. Tiuj raportoj nevole samtempe atestis, ke iliaj aŭtoroj, kvankam estinte eksciintaj pri la ekzisto de la kaŝitoj, neniam estis vidintaj iun el ili, – alie *oni neniam estus povinta supozi*, ke certaj *miraklojn farantaj fakiroj kaj strangaj sanktuloj*, kiujn oni estis renkontinta, estas membroj de tiu spirita rondo.

Sed pro tio, ke en la *nekonscia* regiono de multaj animoj konserviĝis resto de malluma *scieto* pri ebla

spirita ligiteco kun sanktejo plena de Dia spirito kaj kaŝita ie sur tiu ĉi tero, baldaŭ troviĝis kredemuloj, kiuj esperis atingi tian ligitecon.

Bedaŭrinde ili serĉis *sur malĝustaj vojoj*, kaj sur tiuj eraraj vojoj ili estas ankoraŭ serĉantaj.

El scieroj kuŝantaj apud la vojo ili konstruis bizaran ŝajnan konstruaĵon kaj nomis ĝin „*scienco*“ pri la spirito, – subfalinte al la erara opinio, ke vera scio pri la spirito de la eterno estas *lernebla* kiel tera intelekta scienco.

Ili vivas kiel asketoj, por, laŭ ilia opinio, „spiritigi“ sin, – enprofundigas sin en noktomeze tenebran, venenan marĉon de „mistiko“ originanta el la febra atmosfero de tropike varmegaj ĝangaloj, – ĉie serĉas, blindigite de pasio, novajn aŭ malnovajn instrukciojn por akiri „*okultajn fortojn*“, – kaj kredas, ke tiumaniere ili povas proksimigi sin al *tiuj*, kiuj pri ĉio ĉi havas *nur rideton plenan de kompatado, pardono kaj kompreno*.

Neniu volas ekiri sur la rokopadojn, kiuj kondukas al la firnoj de la „granda montaro“, radiantaj en suna lumo, kaj ĉiuj iras sur larĝaj, polvaj vojoj al la jam de longe profanitaj celoj de pilgrimado en mallumaj valoj.

Multaj revis esti jam *sur la vojo* al la sobre klaraj direktantoj en la regno de la animo, kaj nun ili traserĉas la arbarojn por trovi – „*sanktulon*“.

Aliaj opinias, ke la *religiaj instruoj de orientaj popoloj* estas *identaj* kun la saĝo de tiuj kvietaj kaj kaŝitaj direktantoj.

Tial ili prave diras al si:

„En antikvaj tempoj ankaŭ ĉe ni ekzistis viziuloj kaj saĝuloj, ankaŭ ni havas *niajn* sanktajn librojn el fora antikveco.

Sed tio Dia estas ĉie la sama.

Kial do serĉu *ni*, la idoj de l' okcidento, nian savon sole *en la oriento?* –“

Ili estas *pravaj*, – ĉar se temus sole pri *tio*, kion oni ĉiuloke, piakore, povas lerni senti en si, – se temus tie ĉi nur pri tiuj instruoj el antikva tempo, kiuj en la oriento ankoraŭ influas la religian imagaron, – tiam ĉiu serĉanto trovus kontentigon el si mem kaj en la saĝaj instruoj postlasitaj al li de la viziuloj kaj proklamintoj de lia popolo.

Sed saĝo kaj agado de tiuj kvietaj direktantoj havas nur malmulton komunan kun la instruoj de orientaj popoloj, kaj la kaŝaj spiritaj helpantoj kondukas *pli foren* ol nur al *tiuj* ĉieloj, kiujn ĉiu tempo kreis al si kiel esprimon de sia pia sopirado.

La gardantoj de la pratempa heredaĵo de la tuta homaro estas la plej potencaj protektantoj de ĉio *spirita* en la homo, kaj samtempe estas *la plej fidin-*

daj amikoj de la tera homo, plenaj de kompreno kaj konsilo. –

Ekde la plej antikva tempo ili elsendis fratojn al ĉiuj landoj de la terglobo, por formi *punktojn de spirita radiado*, tie kie ili estis bezonaj.

El ĉiuj popoloj ili elektis, dum la fluo de la tempoj, siajn spiritajn filojn kaj fratojn, tie kie la spirita leĝo ordonis al ili elekti.

Al ĉiuj, kiujn ili elektis, loko meze de Azio fariĝis spirita hejmlando, en kiun povas eniri neniu, kiu volas veni sen esti invitita.

La malmultaj tie kune vivantaj jam ekde pratem-paj tagoj, neniam venas videblaforme en la mondon de ekstera moviĝado kaj agado.

Tiun taskon ili donas nur al *tiuj* el siaj spiritaj filoj kaj fratoj, kiujn spirita leĝo destinis por esti „*agantoj*“.

Ili mem estas nur la fidelaj gardantoj de spirita trezoro, kiun la tera homo *posedis antaŭ* sia falo en la mondon de fizika materio.

Ili *kreas* tiun potencon, el kiu la agantoj *agas* por la bono de la tera homaro.

Ĉu ne estas *ekstreme malsaĝe*, kredi, ke tiuj altaj direktantoj estas „*budhanoj*“ aŭ „*bramanoj*“, – „*lamaoj*“, „*panditoj*“ aŭ eĉ „*fakiroj*“?

Oni ankaŭ ne pensu, ke temas tie ĉi pri „*erudiciuloj*“ de okulta, tiel nomata „*scienco*“.

Ĉiu el tiuj supozoj estas tute erara.

La lumantoj de la pralumo estas antaŭ ĉio „*kre-
antoj*“.

La „plejaĝuloj“ aŭ la „patroj“ *neniam konis* la „soifon pri scio“ kaj ne *povis* ekkoni ĝin.

Iliaj spiritaj „filoj“, kiuj estas ankaŭ iliaj „fratoj“, *jam antaŭ longe mallernis* ĉiun „volon scii“.

Neniu el ili certe ankaŭ ne volas konverti la mondon al la instruoj de orientaj mistiko kaj filozofio.

Estas indiferente al ĉiu el ili, ĉu vi „kredas“ je la *Biblio*, la *Korano*, la *Vedoj*, aŭ la instruoj de *Budho*.

Sed en ĉiu el tiuj kredantaroj ili ĉiam trovas homojn, al kiuj ili povas esti *helpantoj* kaj *spiritaj gvidantoj*, kvankam multaj el la protektatoj kaj konsilatoj ne spertas en si ian konsciiĝon de la tie ĉi necesaj procesoj.

La lumantoj de la pralumo volas ne doni al vi *kredoinstruojn*, sed *konstrui* al vi la „*pontojn*“, kiuj vin, la teran homon ligitan al animalo, kunigas kun la regno de la substanca spirito.

Sed ili estas malproksimaj de *tiuj* instruoj, kiuj celas vipi la homon en *ekstazon*, por ke li, ne plu regante siajn *sensojn*, kredu havi la potencon tiriton *Dian* malsupren al si mem.

Ili vere ankaŭ scias, ke en *pensado* oni neniam povas ekkoni *tion*, kio estas la necesa kondiĉo de ĉiu *pensado* kaj vivas *super* ĉiu *pensado*.

Ili ridetas, kiam ili aŭdas pri tiuj, kiuj opinias sin mem maskitaj *dioj*.

Sed ili staros nevideble ĉe la flanko de ĉiu, kiu volas *ricevi* en si *sian Dion*.

Ili estas la veraj arkipastroj, kiuj donas la kalikon de beno al ĉiu pilgrimo, kiu el la plej profunda ardo de sia koro *sopiras ricevi Dion en si*. — — —

Ĉu vi ne komprenas, ke temas ĉi tie pri *io alia* ol tiuj strangaj, laŭdiraj sciantoj de „okulta scienco“, pri kiuj estas parolate *tie*, kie oni preparis al si raguon el la mistike malluma instruaro de ĉiuj popoloj, kaj nomis tiun manĝon „*diosaĝo*“, — „*teozofio*“?

Tia „diosaĝo“ de kompatindaj erarantoj kaj mem-trompitoj, la tuta „*ekzercado*“, *meditado*, *fastado*, — *spite de la pureco de viaj agoj kaj pensoj*, — kun scio pri aferoj, kiujn oni ne bezonas scii, — *ne proksimigos vin je la dikeco de haro al tiu celo*, kiun per la plej profunda sentado de via koro vi povas antaŭsenti kiel *la altan celon de ĉiuj viaj deziroj*.

Vi fariĝos eble *malsaĝulo*, eble por vi kaj aliaj „*sanktulo*“, — sed neniam vi tiel venos al *via Dio*.

Se vi volas trovi nur tion, kion vi ĉiutempe povas trovi en vi mem *sen* spirita helpo, *tiam* vi certe *ne* bezonas direkti vian rigardon al la „*alta Oriento*“.

Tiuj gvidantaj vin de *tie*, – ankaŭ se ili vivas en la sama lando kiel vi, aŭ eĉ en la sama domo, – havas *ion alian* por doni.

Ili povas *krei* en vi ion, kion vi mem *ne* povas krei en vi.

Ion, kio ekradikas en vi, kaj al kio vi fariĝas nutraĵo.

Ion, kion vi *ankoraŭ ne* havas kaj *neniam* povus havi *el vi mem*.

Ankaŭ *la lumantoj de la pralumo* certe ne havas ĝin *el si mem*. –

Ili nur *redonas* al vi tion, kio iam estis *via propaĵo*, antaŭ ol vi devis *perdi* ĝin rezulte de via dezirego eniri en tiun ĉi mondon de fizika materio.–

La „*Plejaĝuloj*“ el la fratoj *neniam* *perdis* ĝin, ĉar ili *neniam* subfalas al la profunda falo en la homoanimalon de la tero.

Ili ne konas la morton, kaj vivas, kiel antaŭ jarmiloj, sur tiu ĉi tero en *nedetruebla* formo el la fortoj de plej pura *spirita substanco*.

Ili *neniam* estis kunigitaj, kiel *vi* kaj *mi*, kun korpo egala al tiu de la animaloj.

Sed ili kreis el homoj, longe antaŭe falintaj kaj devontaj siatempe unuigi sin kun la animalo de tiu

ĉi tero, en *spiritaj* sferoj siajn „*fratojn*“, por ke tiuj, naskitaj poste en la teran mondon, povu efektiviĝi tion, kio ĉi tie povas efektiviĝi *nur*, se oni vivas *en teranimala korpo*.

Tiel ili ankaŭ hodiaŭ preparas *estontajn* „*fratojn*“ por *venonta* tempo.

Ekde la pratempo, kiam la unuaj *animalaj homoj* fariĝis portantoj de la *spirita homo*, la loko de ilia agado sur tiu ĉi tero estas tie, kie leviĝas la plej alta montaro de la tero, estante nealirebla por ĉiu, kiun ili ne mem kondukas spirite en sian rondon.

Tie vere estas „*la tabernaklo de Dio kun la homoj*“ de la tero.

Tie la *regno de la spirito* etendiĝas, per la fortoj de plej pura spirita substanco, en la sferon de fizika okazado de tiu ĉi tero.

De *tie* eliĝas *radioj de pura spirita substanco* al ĉiuj loĝantaj sur tiu ĉi tero. –

Sed mi vidas tro multajn homojn de tiu ĉi tero serĉi la spiriton *ankoraŭ vane*, ĉar ili iras sur *malĝustaj* vojoj.

Mi povas nur admoni tiujn multajn, ke ili iru *returne*, ĉar la *efikanta lumo* el la „*plej interna Oriento*“ apenaŭ povos plenigi ilin, se iliaj okuloj plue restas blindigitaj de la diversaj lumoj el ĉiuj tempoj, – la kandelabroj kaj noktotorĉoj, per kiuj la

homo falinta en animalecon provis mem heligi sian vojon. –

Vere, nur kiu neerarigite de la trembrilado de teraj lumoj rigardas al „*Oriente*“, tiu trovas sur altaj montoj *vivan* lumon.

Kiu *trovis* ĝin, al tiu ĝi *lumos* sur lia vojo, ĝis li atingas sian *celon*, – – ĝis *sian* celon li *atingas*. –

La „Blanka Loĝio“

Per la esprimo „*Blanka Loĝio*“ oni provis nomi la rondon de la spiritaj helpantoj en la ĝenerala lingvo-uzo; tiu nomo estu do plue uzata ankaŭ ĉi tie, kvankam la tiel nomitoj nur *toleras* ĝin, sed *tute ne mem uzas ĝin kiel sian nomon*.

Ilia *plena izoligo de la ekstera mondo* ĉiutaga eble ŝajnas pravigi la transmeton de la nocio „*loĝio*“, konata el la framasonaro, al ilia *pure spirita unuiĝo*.

Temas ĉi tie pri unuiĝo *unika* sur tiu ĉi planedo, kaj ekzistas inter homoj *neniu* ajn formaĵo socia, kiu estus, eĉ nur *figurascence*, komparebla kun ĝi.

La membroj de tiu *unu-ig*o renkontiĝas ekstere, korpe, *nur en la plej raraj kaj plej gravaj okazoj*, kaj ili preskaŭ neniam interŝanĝas leterojn.

Tamen ili estas *en seninterrompa spirita interligo, en konstanta interŝanĝo de pensoj, eĉ en absoluta anima komuneco*.

Tiu unuiĝo *ne* havas eksterajn leĝojn.

Ĉiu membro okupas la *saman rangon* kiel ĉiu alia, kaj tamen ĉiu membro konas la lokon rezervitan al li, kaŭze de la spirita aparteco de ĉiu membro.

Sed *ĉiuj* propravole subordigas sin al komuna spirita „*estro*“.

Tiu „*estro*“ ne estas „*elektata*“ nek „*nomumata*“, kaj tamen neniam iu membro de la unuiĝo estos en dubo pri tio, *kiu* estas tiu „*estro*“.

La „akcepto kiel membro“ en tiun unuiĝon povas akirata nek legitime, nek ruze, nek perforte.

Kaŝaj spiritaj leĝoj kaj la de ili kreita aparta dispozicio de la homa naturo *sole* decidas, ĉu homo estas *destinita* por la „akcepto“, kaj tiuokaze neniu potenco en la mondo povas malebligi lian „akcepton“.

La akceptitoj estas ligitaj per *neniu ĵuro, neniu promeso*.

Ili mem estas al si leĝo kaj normo.

La membroj de tiu spirita unuiĝo ne estas ekkoneblaj *laŭ iu ekstera signo aŭ iu komuna apartaĵo de vivmaniero*.

Sed *ili mem*, eĉ se ili laŭvizaĝe estas tute fremdaj al si reciproke, *ekkonas unu la alian*, – *sen la uzo de „signo, parolo, kaj aparta manpremo“*, – kiam fariĝas necese renkontiĝi ankaŭ en la ekstera vivo.

Laŭ sia tuta naturo, tiu unuiĝo *devas resti kaŝita* al la ekstera mondo; tamen, de tempo al tempo,

multaj unuopuloj kaj eĉ tutaj popoloj troviĝas sub ilia spirita influo.

Neniu vojo de supreniro al pli altaj, supermaterialaj celoj iam estis irata sen tio, ke unu el la membroj de la unuiĝo, aŭ tiu ĉi kiel tuto, prenis sur sin la nepercepteblan gvidadon. –

En la plej multaj okazoj la spirite konsilitaj homoj scias aŭ scietas *neniom* de tiu nevidebla influo, al kiu ili ŝuldas sian plejbonaĵon.

Sed kie troviĝas iometo da *spirita vekiĝinteco*, tie la influo de spirita helpo ja estas *sentata*, – sed, ĉu pro nescio, ĉu pro superstiĉaj ideoj, tiu influo estas preskaŭ ĉiam atribuata al potencoj *supermondaj*.

La poezia imagaro de ĉiuj tempoj kaj popoloj tamen ŝuldas al tiu erara interpretado abundan nombron de siaj figuroj.

Superstiĉo ĉiam estis amiko de la poetoj, ĉar la nuda vero estas tro severa kaj simpla, ol ke ĝi povus esti vestata per la luksaj drapiraĵoj de poeta fantazio.

Erara interpretado de sentita spirita helpo, kiu venis el la kvietaj rondo de la „*pli aĝaj fratoj*“ sur la tero, riĉigis ankaŭ la mondon de *religiaj mitoj*.

Sed de tempo al tempo unuopaj homoj *konsciigis* pri la ekzisto kaj agado de tiu unuiĝo *nevidebla* kaj tamen *ligita al realaj teraj homoj*, – sed aliuloj ŝute

kovris la montritajn spurojn per duboj de ĉiu speco, tiel ke fine nur la murmurado de sagao tie kaj ĉi tie atestis, ke antaŭ longa tempo oni supozeble sciis *pli multe* pri tiuj aferoj, – ke kelkaj homoj *devis* esti eksciintaj *ion de granda signifo*.

En la nuna tempo, *tro entuziasmaj* animoj *eksciis* pri la ekzisto de la unuiĝo, sed *ties simpla spirita esto kaj agado tiom malmulte sufiĉis al la kolorriĉa imago de tiuj entuziasmuloj*, ke ili trovis necesa ornami siajn raportojn per plej strangaj aldonajoj, kaj prezenti la „pli aĝajn“ (– ĉar *spirite* pli aĝajn –) fratojn de la homaro kiel *duondiojn* aŭ almenaŭ kiel *grandajn magiistojn*, kiuj laŭ ilia diro „*jam de longe scias*“ ĉion, kion la moderna scienco nur komencas esplori, kaj kiujn ili malavare ekipis per ĉiuj *miraklofortoj* iam elrevitaj de ekzotaj fabelistoj.

Oni *evidente kun bona intenco* agis malĝuste tie ĉi kaj volis ke la celo pravigu la rimedojn, provante altigi la malklare sentitajn nealireblulojn *super ĉiun homecon*. En tio oni kredis esti konfirmita de iom sengustaj fakiromirakloj, kiujn oni kredeme atribuis al la farintoj kiel pruvon de tio, ke ili apartenas al la „*Blanka Loĝio*“.

Sed tiuj origine *celitaj* per tiu ĉi nomo: – la veraj *lumantoj de la pralumo*, – la *sacerdotoj de la tem-*

plo de la eterno sur tiu ĉi planedo, – senindulge kaj decide malaprobos ĉiun fantastan ornamaĵon.

Ili scias, ke ili estas homoj kiel aliaj homoj, escepte de tio, ke rezulte de sia *pli granda spirita „aĝo“* ili estas kapablaj okupi sian pozicion en la ŝtuparo de la spirita hierarkio kaj alkonduki al siaj kunhomoj *spiritofortojn*, kies *direktantoj*, *ne kreintoj*, ili estas.

La *realeco* tamen prezentas multege pli *dignan*, multege pli *subliman* bildon ol kiom la plej kolor-*avida fantazio* iam povus pentri al si.

La kvieta agado de la membroj de la unuiĝo ampleksas ĉiun kampon de *spirita disvolviĝo* en la homaro.

Tra iliaj manoj kuras fadenoj, kiuj ofte finiĝas je la manifestiĝo de plej alta homa *kreoforto*, de plej alta homa *potenco*.

Ili *efektive* formovas montojn sen movi unu fingromembron, ĉar ilia volo, *gvidata de plej pura spirita ekkonado* kaj *tute purigita je ĉiu persona dezirado*, kelkfoje staras malantaŭ volo uzanta kaj movanta *aliajn* cerbojn kaj manojn. –

Sed por *fakiroartaĵoj vere ne estas spaco* en la agado de la „*pli aĝaj fratoj*“ de la homaro.

Ili laboras sole en pure *spirita* maniero je la realigado de la nemezurebla plano de disvolviĝo,

kiun eterna kosma leĝo desegnis por la tera homaro, kaj ilia laboro ne konas *personan apartan intereson*, nek *la preferadon de unuopuloj*, eĉ se ĝi povus origini el la plej idealaj motivoj. –

Kiu serĉas krudajn „*miraklojn*“, tiu ne trovos ilin ĉi tie.

La *faktaj okazaĵoj* en la agado de la „pli aĝaj fratoj“ tamen povas esti vere „*miraklaj*“, sed ju pli ili eble meritas tiun epiteton, des pli certe ili restas kaŝitaj al eksteraj okuloj.

En la sferon de influo de tiu spirita agado eniras ĉiu terhomo, kiu serioze kaj elkore strebas atingi sian *plej altan spiritan disvolviĝon eblan* en tiu ĉi tera ekzistado.

Ju pli pura lia volo, – ju pli jam senigita je egoismaj deziroj, – des pli klare povos tio spirita enflui en lin, kaj des pli forte kaj frue li sentos tiun influon en si.

Sennombraj homoj sentas ĝin, ne eĉ ete sciante, de kie ĝi venas.

Supersenseca spertado

En oportuna tempo, kiam certaj *supersensecaj kondiĉoj* estas plenumitaj, kaj ne *tro fortaj resistoj* ekzistas en la fizika mondo, ĉiu homo povas ekhavi *supersensecan sperton*.

La plej bonan dispozicion por tio havas la *homoj de plej simpla naturo* kaj – *la artistoj*, kondiĉe ke tiuj ĉi estas *originaj talentuloj, veraj kreantoj, veraj „talentuloj de l' koro“*.

La interna „*ricevo*“ de *krea ideo*, – de *vere artisma imago*, – estas per si mem speco de „*supersenseca sperto*“. –

Tamen ekzistas *grandega diferenco* inter, unuflanke, ĉiu speco de *artisma „inspiro“*, aŭ okaza *pli alta* supersenseca sperto ekhavebla de ĉiu homo kaj, en plej granda intenseco, de homo de aparte taŭga naturo, kaj, aliaflanke, *tiu speco* de supersenseca spertado praktikata de *la malmultaj homoj*, al kiuj *la heredaĵo de la spiritohomo* vere estas *pli ol* objekto de la kontentigo de l' *sciavido*, kaj kiuj scias, ke ĝi estas konfidita al ili nur, por ke ili povu doni al siaj „*pli junaj*“ fratoj *vojosignalojn* de sur altaj montoj.

Mi tie ĉi *ne* parolas pri tio, kion la mondo komprenas sub „mistikuloj“.

„*Mistiko*“ kaj la „*reĝa arto*“ de la veraj „*inicitoj*“, kiuj *sole* estas rigardataj en la regno de la esenca spirito kiel tiaj, estas tre diferencaj aferoj.

La spertado de la *mistikulo* estas simila al tiu de la *artista*.

Al tiu, kiel al tiu ĉi, doniĝas „*inspiro*“ el sfero nekonata al li, en kiun li *neniam* povas *eniri mem-konscie kaj kun konsciataj sensoj*.

„*Io*“ kaptas lin, superfortas lin, kaj li fariĝas *parolanto* de tiu nekonata forto, aŭ li spertas nur ĝian influon en „*senparola viziado*“.

La spertado de „*homo konsekrita*“ en la regno de l' *substanca spirito*, la vera „*inicito* de la *reĝa arto*“, la filo kaj frato de la „*lumantoj de la pralumo*“, — estas tute, esence alia.

Li vivas, konscia de si mem, ĉiam kaj konstante en la tri mondoj, kiuj en la mondo de realo troviĝas *unuigitaj kiel mondo de la fizika materio, mondo de la supermateriaj sed substancaj animoelementoj, kaj mondo de la substanca, pura spirito*.

Neniam li estas *en ekstazo, nek en iu ajn stato de „tranco“*, kaj li estas *malproksima de ĉiuj misteraj praktikoj*, ĉar alie li *neniam* povus aparteni al la rondo de siaj fratoj kaj altaj patroj.

Dum li kolektas sian sperton en *supersensecaj* regionoj, li restas *konscia de sia esto* en *ĉiuj* tri mondoj, kaj do lia konscio en tiu ĉi *ekstera* mondo, kiu estas sense perceptata de ĉiuj homoj en stato de klara konscio, estas absolute neniom *vualita* eĉ nur *unu momenton*.

Male, lia ekkonado de „eksteraj“ aferoj estas *plivastigita*, kaj *levita al tiu klareco*, kiu karakterizas lian rigardon en la sferon supersensecan.

Dum sur *supersenseca* nivelo li „*parolas*“ kun siaj spiritaj fratoj, – kaj *ili* kun *li*, – li povas vidi kaj senti la plej malgrandan okazaĵon en la lin ĉirkaŭanta *materia* mondo *ne malpli klare* ol tion, kio povas esti perceptata nur pere de *spiritaj* sensoj.

Ne okazas „malvastigo“, sed preskaŭ senfina *plivastigo* de la konscio.

Multo de tio, kio estas „parolata“ en la mondo de la esenca spirito, kiu en si ampleksas *sennombrajn* „mondojn“, neniam povas esti esprimata per vortoj de homa lingvo, – tamen temas pri klara „lingvaĵo“ en ritmo kaj formo, plena de senco kaj vero, tiel ke probable estus eble trovi por ĝi taŭgajn vortojn de homaj lingvoj, sed ne: peri, kune kun tiuj vortoj, la spiritan *rigardadon*, per kiu oni povas ekkoni ĉion en la substanco spirito tuj *de ĉiuj flankoj*.

Tio do, kion estas permesate „traduki“ en vortojn de homa lingvo, dependas de la *individua aparteco* de la aganta frato, de la *tempo*, en kiu li agas, kaj de la *kultura rondo* ĉirkaŭanta lin surtere.

Sed ĉio, kion li komunikos, ĉiam nepre konformas al la plej pura *vero*, – estas klara sciigo pri absoluta *realeco*, kiu *ĉiutempe* prezentiĝas al la okuloj de *ĉiuj* „inicitoj de la reĝa arto“, *senigita* je ĉiuj sennombraj *eblecoj de trompo kaj fontoj de eraro* ligitaj kun la esplorado en la *fizika-materia mondo*. –

Por „*spekulativaĵoj*“ kaj pedantaj filozofiaj tro-sagacaĵoj de la homa, *terligita pensado* ne estas loko en la mondoj de la substanca mondo de l’ spirito.

Tie, oni ne *konkludas* el unu „vero“ al alia, kiel en *intelekta, tera ekkono-provo*.

En la regno de la substanca, pura spirito *ĉiuj veroj* staras kiel *realajĵoj* antaŭ la vidanto. – – –

Ŝajnaj „*memkontraŭdiroj*“, kiujn la nekapableco por kontrolo ĉiam serĉis tiom diligente en la komunikoj de la veraj „inicitoj“ de ĉiuj tempoj, jam klariĝas, se oni konsideras nur *la naturon* de la supersenseca perceptomaniero. Per tiu ĉi maniero oni ekkonas ĉiun aferon *de ĉiuj flankoj samtempe*; sed la komunikanto *devas* montri jen *unu*, jen la *alian*

„flankon“ *solan*, se li volas, ke liaj kunhomoj, ne perceptantaj samamaniere, komprenu lin almenaŭ certagrade, – – ĉar tre ofte temas pri aferoj, kiuj apenaŭ povas esti farataj objekto de trafa komparo, tial ke *nenio* sur la tero estas *simila* al *tio substanca-spirita* priskribenda.–

Sed la loka koloro de la parolmaniero, en kiu iu frato de la „*lumantoj de la pralumo*“ donas siajn komunikojn, ĉiam dependas *de lia persona bon-trovo*, kaj estas influata de pietato al liaj instruintoj, de lia propra inklino, aŭ de motivoj de verkada formo.

Kvankam, hodiaŭ kiel antaŭ jarmiloj, la tera loko de la templo de substancaj spiritofortoj estas kaŝita en la koro de Azio, neniu el la fratoj, kiuj rigardas ĉi tiun spiritan centron sur nia planedo kiel *sian veran teran hejmlandon*, devas uzi en sia komunikado la religian kaj filozofian terminaron de la oriento.

Se tamen iu membro de tiu rondo, kiel homo de l’ *okcidento*, uzas la *parolmanieron de la orientaj popoloj*, li tion faras *liberaelekte*, – ĉu pro prefero por la *poezio* de l’ oriento, – ĉu pro amo al certaj metaforoj, kiuj peras ion spiritan *pli bone* ol okcidenta lingvouzo, – ĉu, fine, *por lasi al neforgesebla travivaĵo ties originan koloron*.

Eĉ la plej alte disvolviĝinta el la agantaj fratoj estas *homo* kaj elkore ĝojas pri sia homeco, – *ne libera de homa inklino*, – *ne asketo kvazaŭ mortinta rilate al teraj aferoj*, – kvankam kelkaj *fanatikuloj de neado* de ĉio tera neniom povas kompreni tion, tial ke ili ne plu liberiĝas de la *influo* katenanta ilin al iliaj kredoinstruoj ricevitaj el la *suba mondo*.

Sed kiu ame sentanta homo ne estus inklina paroli pri *la aferoj de sia amo* en *tiuj* formoj, en kiuj bonkoraj instruantoj iam *unufoje* parolis pri ili al li?

Facile la samaj aferoj povus esti prezentataj en *tute alia* loka parolmaniero, sen perdi iom el sia *vereco*.

Nur „tradukado“ fare de nekompetentuloj estas danĝera. –

Estas multe pli malfacile ol kiom iuj imagas, ŝangi ekzemple *kristane* vestitan frazon de vera „inicito“ tiumaniere ke ĝi poste *portas hindan turbanon*, aŭ refandi ion pensitan en la maniero de *Ĉinio* en formon de *Eŭropa* pensado. –

Sed, ofte, nocioj el la imagaroj *de la plej diversaj popoloj* devas *unuiĝi*, se spirita veraĵo *estanta malproksima de okcidenta* pensado tamen fariĝu *kaptebla* al la okcidentulo.

Neniu serĉanto iam lasu sin delogi, per tiu *libera uzo de rimedoj de prezentado*, al la opinio ke la komuniko intencas propagandi *la religiajn aŭ filozofiajn instruojn*, el kies nociaro estis akceptata tio, kio montriĝis *uzebla por progresigi la ekkonadon de praeterna realo*. –

Estas konate, ke homaj komunumoj kiuj montras al siaj membroj celojn *ne ĉiutagecajn*, havas la kutimon, ke ene de ilia rondo oni *ĉesas uzi la ĉiutagajn nomojn* de la membroj kaj donas al ili „novajn“, *aliajn nomojn*.

De kie tiu kutimo *originas*, kaj ke ĝi etendiĝas ĝis *pratempaj tagoj*, tio certe klariĝos el tio sekvanta.

Ne senmotive estu memorigate tie ĉi pri jenaj paroloj de *Genezo*:

„Kaj *via nomo* ne estos plu *Abram*, sed *via nomo* estos *Abraham*.“

Kaj same:

„Vi ne plue estu nomata *Jakob*, sed *Izrael* estu *via nomo*.“

„*La nomo*“ de individua spirita estaĵo estas io tute *alia* ol la nomo derivita de eksteraj cirkonstancoj, kiun popola kutimo kaj landa lingvo donas al la tera homo.

Ankaŭ la tera homo *estas individua spirita estaĵo*, sed li, escepte de tre malmultaj homoj ekzistantaj en ĉiu tempo, ankoraŭ ne konas „*sian nomon*“ . –

Nur kiam li estas *konsciinta sian substancan spiritecon*, li konas ankaŭ „*sian nomon*“ .

Do la „*nomo*“ de vera, en la spirito „*inicito*“, – kiu pasintece ofte estis strikte tenata en sekreto, ĉar oni timis ke ĝi estus „*malpurigata*“ se ĝi venus en ĉies buŝon, – vere *ne* estas *nomo arbitra* kiel la „*civitana*“, *tiel nomata* *nomo*, kiu ŝuldas sian formadon al la loĝloko de antaŭuloj, al profesio aŭ eco de malproksimaj prauloj, kaj fine ankaŭ al la arbitro de la gepatroj. –

Ĝi estas donata al la „*akceptita*“ filo kaj frato per la „*plejaĝuloj*“ inter la fratoj, kaj indikas, en la „*litero-lingvo*“ uzata de la „*fratoj sur la tero*“, tiujn fortojn, kiuj manifestiĝas en la spirita esto de la frato.

Ĝia „*portanta*“ forto kuŝas en certaj „*literoj*“, tiel ke la aganto povus „*nomi*“ sin ankaŭ per *aliaj* vortoj, kondiĉe ke tiuj „*literoj*“, kiuj formas lian „*kosman nombron*“ – lian *praspirite-eterne ekzistantan, substancaspiritan „nomon*“ – estus ente-nataj en ili.

Ĝi do ankoraŭ estas *envolvaĵo*, kvankam sole per si mem sanktigita, ĉirkaŭ la „*nomo*“ *eterne ekzistantanta en la spirito*, kiun neniu povas „*elparoli*“ – eĉ

se li *konas* la portantajn „literojn“ – krom *tiu unu*, kiu *mem estas* tiu „nomo“. –

En sia „*nomo*“ la frato estas „*vorto*“ en la *Pravorto*: – kiel *mem-elparolo de la Pravorto en individua, memkonscia, substanca, spirita formo*.

Pri „*sciencaj esplormetodoj*“ por esplori *ion spiritan*, oni kompreneble scias tiom malmulte en la unuiĝo de la „*fratoj sur la tero*“, kiel inter iliaj spiritaĵoj „*patroj*“, kiuj neniam „*falis*“ el la pralumo.

La saĝo de vera enspirite konsekrito konsistas ne en akumulaĵo, kaj konstanta plimultigo, de tio kion li en tera intelekta maniero „*scias*“, sed *en la posedo de certaj sanktaj fortoj*, per kiuj li povas ĉiutempe ekkoni sci-objekton en *realo*, – la objekton „*en si*“.

Lia akumulita scio, gajnita en *terhoma* maniero, estas tute *neesenca* por li kaj nur *plej malofte akordigebla* kun spirita saĝo.

Ju pli de tia scio li posedis, des pli *malfacile* estis por li, kiam li ankoraŭ estis „*ĉelao*“, *venki la kaŭzajn malfacilaĵojn*, venko kiu devas antaŭi ĉiun legitiman „*inicaĉon*“.

Oni ne devas demandi pri „*kaŭzoj*“, se oni volas sukcese trapasi tiun „*instruadon*“, kiu fine malfermas al la rajtigito *tiun* pardonon, kiun *nenia* tera erudicio iam povus malfermi al li. – –

Vera „inicito“ *neniam* proklamas „*sistemon*“ de scio aŭ kredo.

La *realeco* de la aferoj en la spirita mondo kuŝas *etendita* antaŭ liaj okuloj, kaj instruante li ĉiam parolas nur pri tiu *realo*, kiun *neniu* sistemo de *pensado* aŭ *kredado* iam povus ampleksi en si. –

Tiaj „*sistemoj*“ estas, kiom ili rilatas al aferoj de la *spirita* regno, ĉiuokaze nur *sekundaraj* formitaĵoj de aliaj cerboj, kiuj proprigis al si la komunikojn de iu, kiu scias el *spirita perceptado* kaj per mem-transformado.

Laŭdiraj „*esplorantoj de pli altaj mondoj*“, kiuj paradas per „*sciencia*“ aspekto de siaj „*esplorrezultoj*“, *nepre ne* devas esti rigardataj kiel enspirite „*inicitoj*“.

Ĉiuj tiaj „*esplorantoj*“ en la „*regiono okulta*“ estas nur trompitaj sklavoĵoj de sia propra *plastika fantazio*, – ekstreme fatala kaj danĝera homa forto, kiu, se perforte stimulita al aktiveco, *igas* sian mizeran viktimon *vidi ĉion formita*, kion li mem antaŭe prezentis al ĝi en pensoj, deziroj kaj timado, – ofte nekonscie, – *kiel modelon*.

En tiu maniero estiĝis ciuj tiuj monstraj „*migradoj sur pli altaj ebenoj*“ kaj prezentoj de „*pli altaj mondoj*“, kiuj havigis al tiu aŭ alia „*spirito-esploristo*“ kaj „*sekreta instruanto*“ inter ties anoj

la reputacion de mistera „viziulo“; restas ankoraŭ eltrovende detale, *kio estas intenca aldonajo*, kaj plej ofte tio estas ekkonebla tre facile.

Ĉar tiuj formitaĵoj de la „plastika fantazio“ estas *facile transmeteblaj per psika kontaĝo*, la anoj kaj disĉiploj de tiaj „profetoj“ kaj sektofondintoj kredas, ke ili spirite *mem* certigis sin pri la *vereco* de la revelacioj de sia „granda instruanto“, tuj kiam li sukcesis dum la mistera „*sekreta instruado*“ *transmeti siajn proprajn kreaĵojn* en la konscion de la disĉiploj, – ne multe alie ol kiel ĉiu lerta *hipnotizisto* povas igi sian eksperimentan objekton *vidi kaj travivi ĉion*, kio ŝajnas dezirita.

Posta *savo* de tiaj trompitoj estas *preskaŭ neebla*.

Sennombraj homoj tiumaniere fariĝis naive fidantaj memtrompintoj, sennombraj fariĝis plene trompitoj.

Se mi *tie ĉi, kie temas pri la eblecoj de supersenseca spertado*, klare *parolas* pri ĉiuj tiuj aferoj, mi tion faras por prezenti al ĉiu honesta serĉanto la kriteriojn por *sekura juĝado*.

Mi parolas pri aferoj, kiuj ne *bezonas* vualon, kaj *devas* paroli ankaŭ pri *tiuj* aferoj, kiuj *devas* esti *senvualigataj*, en la *intereso de la animoj serĉantaj la veron kiel realon*.

Miaj vortoj ne estu parolitaj *vane*.

Oni lernu kompreni, ke unu el tiuj homoj *vivantaj plenkonscie en la substanca, pura spirito* neniam povas profani la *saĝon de lumo*, kiun li prezentas al siaj kunhomoj, per *provoj de „sciencia“ subtena argumentado*.

Kion la enspirite „inicito“ instruas, tio estas destinita por *provado per ago kaj memdono*.

Kion li havas por *doni* kiel mesaĝon al siaj „pli junaj“ fratoj, al la animoj de la generacioj *vivantaj* surtere kun kaj post li, – ĉu viroj, ĉu virinoj, – tio ne estu *pense disfendata*, sed *anime vivata*, por ke la sennombraj serĉantoj trovu sian *vojon al la spirito*, – *sian vojon al la realo*.

La vojo

Ĉiuj grandaj aferoj postulas *kuraĝon kaj fidon*. – Antaŭ ol vi pendis „*je la kruco*“, vi ne povas „*releviĝi*“.

Antaŭ ol vi *fidis*, la „*luma nuboj*“ ne povas konduki vin tra la „*seka*“ maro.

Vi *havas* multegon por *venki* en vi, kaj ankoraŭ pli vi devos *lerni* venki, se vi volas antaŭeniri sur via vojo.

La maro minacos engluti vin, kaj la dezerto ne donos al vi nutraĵon, – tamen vi *ne devas halti eĉ unu momenton hezitante aŭ dubante*, kiam vi estos ekirinta tiun ĉi vojon al vi mem kaj al via Dio.

Kiom malfacile tio estas, vi vidos nur, kiam vi estas sur tiu ĉi vojo.

Sed ne timu.

Sur tiu ĉi vojo vi *ne estas sola*.

Akompanas vin ĉiuj, kiuj iris tiun vojon *antaŭ* vi.

Ankaŭ ili iam devis trapasi ĉiujn danĝerojn.

Por *neniu* el ili la vojo estis *pli facila* ol por vi.

Sed nun ili estas enirintaj en la „*promesitan landon*“.

Nun ili estas atingintaj la *celon* de siaj penoj, kaj de sur „sanktaj montoj“ ili sendas al vi *helpon* kaj *forton*.

Deloke de tiuj, kiuj radias *sunece* en la plej alta lumo de sia Dio, kiuj, *same kiel dioj*, estante *unu unuaĵo, suno de ĉiuj sunoj*, lumas al ĉiuj sunoj, al ĉiuj mondoj, – – ĝis, malsupre, tiuj, kiuj vivas *spiritaforme* sur tiu ĉi tero, kaj fine *tiuj ancorau portantaj la teranimalan veston*, *unu fluego de la substanca spirita lumo* trafluas ĉiujn vastaĵojn kaj unuigas la de ĝi plenitojn en plej sublima komuneco.

Sur la *plej malsupra*, al vi plej proksima rungo de tiu „ĉiela eskalo“ staras tiuj helpantoj, kiuj *povas* etendi *al vi* la manon por helpo, se vi *volas* ricevi ilian helpon.

Ili lasas *neniun* iam *sola*, kiu penas pretigi al si la vojon tra la nokto de hororo al tiu pacoplena, kvieta, alta templo, en kiu lia Dio povas „*naski*“ sin *en li mem – kiel lumon el lumo*. –

Sed ili sendas sian helpon *ne de ekstere*, ĉar *profunde en via plejinterno* ili estas *ligitaj* kun vi, tuj kiam vi kuraĝe ekiras vian vojon, – la saman vojon, kiun *ĉiu*, kiu atingis *sian Dion*, iam devis tramigri kaj kiun ankaŭ ili, kiuj nun volas helpi vin, iam devis iri, kvankam tio spirita en ili estis dum

jarmiloj pretigita tiel, ke ĝi ricevis la kapablon de plej klara spirita ekkonado. –

Kiu ne estas *unu el tiuj ĉi*, ne povas helpi vin, eĉ se li povus fari abundon da mirakloj.

Multaj falsaj instruantoj krucos vian vojon, – „instruantoj“, kiuj *mem ege bezonus instruadon*, – kaj multaj fieraj parolantoj fanfaronos al vi pri sia „*scio*“.

Vi kelkfoje renkontos „*sanktulon*“, kiu ne estas kapabla por memkritiko, konsumiĝas en *vanteco*, kaj opinias ke estas *granda agado forlogi* aliajn al siaj „*sankteco*“ kaj arogita „*digno*“.

Teruros vin plej strangaj „*hierofantoj*“, kiuj provos blindigi ĉiun proksimiĝantan al ili per la konfuzaj, scintilantaj kaj strangaj signoj, kiujn ili mem, iluziigante, uzante falsan oron, fiksas sur siaj „magiaj manteloj“.

Se vi nur *unufoje* ne gardas vin, vi riskas tre facile kaptiĝi en *diversaj kaŝaj retoj*, kaj nur malofte iu kaptiĝinta sukcesas eskapi senvunda el tiaj birdokaptaj maŝoj.

Nur *konstanta atentemo* povas *protekti* vin kontraŭ danĝero.

Gardu vin kontraŭ ĉiuj, kiuj rigardas sian laŭdiran „diosagon“ instruebla kaj akirebla *kiel la scion pri la aferoj de tiu ĉi tero.*

Gardu vin kontraŭ ĉiuj, kiuj volas trompe impresi vin per „*miraklaj fortoj*“.

Ankoraŭ ekzistas multo, eĉ en ĉi tiu ŝajne „raciisma“ tempo, kio povas aspekti tre „*miraklece*“ al vi, kaj miraklaj fortoj vere estas profunde kaŝitaj en la homo, sed *la spirito de la eterno neniam povas fariĝi tiom dubinda al si mem, ke ĝi provus „pruvi“ sian ekziston per „mirakloj“.*

Se en iu homo fakte montriĝas *miraklecaj fortoj*, tio pruvas nur, ke tiuj fortoj ekzistas, – sed *neniam*, ke tiu ĉi homo scias „*spiri konscie*“ en la spirito kaj povas *atesti kun certeco* pri la *vero*, kiu baziĝas en *realo*.

Tia atesto estas provebla nur per la „*miraklo*“ de ekkono, kiun ĝi estigas *en la animo*, kaj vi ne devas rigardi kiel *veron* ion, kio ne *trovas konfirmon en via plej interna interno*, tuj kiam vi *plenumis la kondiĉon*, kiu *rajtigas* vin ricevi tiun konfirmon. – –

Gardu vin ankaŭ kontraŭ la malsaĝeco, kiu kredas, ke estas eble *per la aparteco de la nutraĵo* aŭ *per iu fakira praktiko* enigi sin en „pli altan spiritecon“ per *manĝado* aŭ *spirado*.

La lumantoj de la lumo, kiu tralumas la mondojn, vere *neniam* konsilos al vi uzi *tiajn* rimedojn.

Ili ankaŭ *neniam* postulos de vi, ke vi *apartigis vin de viaj apudaj homoj* por fordoni vin al *sekretaj, trompe impresaj ceremonioj* aŭ *misteraj kutimoj*.

Ili *neniam* donos al vi „*sekretajn gradojn*“, *strangajn titolojn* aŭ *rangojn*, kiuj povas nur nutri van-tecon kaj estigi ridindan fieregon en vi.

Nur tio, kio fariĝis en vi *realo*, ĉar vi mem *proprapene atingis ĝin*, havas *valoron* en iliaj okuloj kaj difinas por ili vian „*ŝtupon*“.

Vi ankaŭ ne trovos ilin parolantaj aktorogeste *sur oratoraj tribunoj*, kaj ne *en la foiroj* antaŭ multaj homoj.

Ili donos al vi sian helpon nur per vortoj, kiujn vi povas *konsideri en kvieto en via koro*, – ne influite per erarigaj retoraĵoj.

Ili helpas vin per *interna* agado, kaj *neniam* provos *montri* sin.

Ne estas necese, ke vi *ekkonu* ilin, se vi eble ilin renkontas.

Ne estas necese, ke vi trovu ilin en ilia tera korpo.

Ili trovas *vin* kaj scias *helpi* vin, eĉ se vi *neniam* sentas la helpantojn.

Ili vere agas per *aliaj* rimedoj ol tiuj vantaj *mal-saĝuloj*, kiuj provas allogi anaron per mistera gesto kaj senenhavaj, fanfaronaj oratoraĵoj. –

Ili ankaŭ *neniam* postulos aŭ atentos *tributon* por sia instruado kaj gvidado, kaj *ili* *prefere* *dividus* *kun* *vi* *la* *lastan* *heleron* *ol* *akcepti* *duonan* *heleron* *de* *vi* *por* *sia* *helpo*.

Tio *spirita*, kion ili havas por doni, *apartenas al la spirito*, kaj neniu el tiuj *povantaj* doni ĝin volus iam ĝin interŝangi kontraŭ *teraj valoroj*.

Nur „*laboro*“ necesa por *subteni la vivon de la tera korpo* rajtas postuli teran egalvaloraĵon.

Kiu havas okulojn por vidi, kaj orelojn por aŭdi, tiu protektu sin mem kontraŭ trompisto kaj uzurpantoj.

Facile li ekkonos ilin.

Sed la *lumantoj de la pralumo* estas troveblaj *pli malfacile*.

Vi apenaŭ ekkonos ilin inter aliaj homoj portantaj la teran vestaĵon, kaj *nenio aparta* malkaŝos ilin al vi, ĉar ili amas la *kvieton* kaj ŝatas la *kaŝitecon*.

Se ili estas devigitaj *vivi en la brua mondo*, ili certe ne estos distingeblaj de ĉiuj aliaj honestaj homoj, kiuj praktikas sian profesion.

Bone estas al tiu, kiu konfidas ilin. — —

Sed nun, ho serĉanto, ni iru *kune* en la kvieton, kaj mi montros al vi la *komencon* de la „*vojo*“.

Koncentru vian atenton en vi mem kaj aŭskultu min, nun ke vi certe estas pretigita kompreni kun vigla menso tion, kion mi nun plue havos por diri al vi.

Komence, ho serĉanto, vi devos *forgesi* multon. –

Oni donis al vi *malĝustan ideon* pri „*Dio*“, kaj tiel oni sufokis en vi per vanta instruo tiun *ĝermon*, el kiu estis disvolviĝonta, en la sanktaj akvoj de via plej profunda animo, la „*floro de lotuso*“, en kiu la *lumo* eterne lumigonta vin povas esti „*naskata*“.

„*La spirito, kiu ŝvebis super la akvo*“ plenigas la senfinajn spacojn, sed vi povas proksimiĝi al ĝi *ne aliamaniere ol – en vi.* –

Nur se ĝi *en vi*, – kiel *via Dio*, – formas sin kiel lumon el lumo, vi povos doni sciigon pri ĝia kvieta regado. –

Tiuj volantaj esplori *ĝian senfinecon* treege *eraras*.

En alta aroganteco ili kredas *proksimiĝi* al *Tiu*, kiun *ĉiuj kosmaj spacoj ne povas ampleksi*, kaj ili ne eĉ scietas, ke ili kreis *distorditan bildon*, kiu nun *regas ilin.* –

Sed ni volas nun denove enigi en vin la ĝermon de tiu eterna „*floro de lotuso*“.

Eble – ĝi trovos nun nutraĵon el viaj fortoj.

Kiam ĝia floro estas *malfermiĝinta*, la *spirito*, kiu, *generante sin el si mem, vivas el si mem*, malleviĝos en vin kaj „naskiĝos“ en vi kiel *via Dio*, – – kiel *via en vi vivanta Dio*. – –

Antaŭe vi ne scias pri „Dio“.

Ne kredu al tiuj, kiuj raportas al vi pri *la dio de siaj revoj*: pri dio, kiu estas trovebla en ebbriiga ekstazo. –

Kio tiel povas esti trovata, estas nur „*fatamorgano*“ de la interna mondo.

Vi ankoraŭ ne konas la riĉon, kiun ampleksas la vastaĵoj de via *animo*. –

Tie ekzistas „*fortoj*“ kaj „*potencoj*“, al kiuj vi farus *adoron*, kiel la profeto antaŭ la brulanta arbeto, se mi povus montri ilin al vi en videbla formo. – – –

Via animo estas *nemezurebla oceano*, kaj ankoraŭ neniu ĝisfunde esploris *ties profundaĵojn*, neniu *la miraklojn de l' maro de la animoelementoj*. – –

Vi imagas vian *animon* kiel luman envolvajon, kaj kredas trovi en ĝi sole *vin mem*.

Sed via animo estas *kiel maro el miriadoj da gutoj plenaj de latentaj potenco*, – aŭ *kiel vivanta nuboj formita el miriadoj da fortopenaj estaĵoj*, – kaj vi estu fariĝonta *estro kaj mastro* de ĉiuj tiuj estaĵoj. – –

Kiam ili ne ekkonas en vi *sian sekure mem-konscian reganton*, vi, svenigite de ilia forto timiganta vin, fariĝos *ilia sklavo*. –

Ili *devas servi* al vi, kiam vi *ekmastris* ilin, – sed ili ĉiam *petole trompos* vin per la plej strangaj arlekinaĵoj, se en malĝusta humileco vi *klinas vin antaŭ ili*.

Ili bezonas *unu fortan volon* por *unuigi* sin sub ĝi.

Antaŭ ol vi *unuigis* ilin en *unu volo*, vi neniam trovos en vi la kvieton, kiu sola povas efektiviĝi la *ekfloradon* de la sankta „floro de lotuso“ – –

Ne pli frue vi ricevos en vi, per la elementoj de via animo, sciigon pri tiu silenta *regno de spiritoj*, kiu nur per la elementoj de via animo *unuigitaj sub unu volo* povas fariĝi al vi *ekkonebla, sentebla*, kelkfoje eĉ *videbla kaj aŭdebla*, – ĉar tiu regno vivas *en vi*, kiel *ĉiuloke*, el la *samaj* fortoj.

Ne pli frue vi ricevos de *tiu*, kiu *el la regno de l' spirito* gvidas vin, *klaran signon*, – ne pli frue vi *eksentos* en vi la altajn spiritajn direktantojn, *la lumantojn de la pralumo*.

Tial penu, ho serĉanto, antaŭ ĉio alia, formi en vi *firman, klaran volon direktitan al vi mem.*

Vi devas *aprobi vin mem*, se, en la regno de l' spirito, vi volas ricevi *aprobon de la spirito.*

Vi trovas *vin*, kaj *en vi vian Dion*, sole en via „*mi*“. — — —

En *kvieta ĝojo kaj serena trankvileco*, penu *akiri kaj konservi la regadon en vi mem*, kaj deturnu vian okulon de ĉiu interna bildo, kiun via ankoraŭ ne memunuigita, facile ekscitebla menso volas montri al vi.

Vi unue devas, *en ĝojo kaj plena konfido*, fariĝi tute konscia de via plej interna memo.

Antaŭ ol vi rondigis vin en vi mem kaj ĉiuflanke limigis vin, — kiel maro difinanta siajn proprajn bordojn, aŭ kiel nuboj buliganta sin mem, — vi vane provos *ekposedi* vian animon, ĉar la elementoj de via animo sin donas kiel proprajon nur al tiu vere *inda* je ilia respekto.

Sed ne pensu, ke vi iam povus atingi tiun ĉi celon, se vi ĉiam restas *en ekstera neaktiveco.*

Kiel homo de la *ekstera mondo*, en kiun vi estas naskita, vi devas *agi tagon post tago*, — kiel la *tuta ekstera naturo* senĉese estas aganta kaj formas novajn formojn, — se vi volas lerni *hardi vian volon*

tiugrade, ke la elementoj de via animo povas *obei ĝin*. --

Neniu afero en la ekstera mondo estas tiom malgrava, ke ĝi ne povus fariĝi *instruanto* por vi.

El ĉiu sperto vi povas tiri instruon, kaj neniu agado estas tiom malestiminda, ke vi ne devus lerni el ĝi.

Sed antaŭ ĉio vi devas lerni regi viajn fuĝemajn pensojn, kaj kapabligi ilin *koncentriĝi* sur unu punkton. --

Ne la solejo en dezerto, nek la vivado inter la sovaĝaj animaloj de la ĝangaloj estas pli favoraj por via intenco, ol la agada moviĝado en urbo riĉa je loĝantoj, en kiu vi praktikas vian profesion.—

Kiam vi lernis resti *en vi konscia de vi mem* eĉ en la plej laŭta bruado, kiam vi povas absolute suverene *ordoni* al viaj *pensoj* kaj al via *volo*, kiam viaj deziroj venas kaj iras nur laŭ tio, kiel *vi mem igas* ilin veni kaj foriri, — *nur tiam* komencu la unuan provon *unuigi en vi la elementojn de via animo*. --

Ankaŭ tiam vi ankoraŭ trovos diversajn rezistojn en vi.

Tamen, longe vi uzos vian nun firmigitan volon *vane* por klini sub ĝi ĉiujn rezistantajn elementojn de via animo. —

Ĉiu unuopa animo-elemento volos posedi vian volon nur por si mem, kaj neniu sin donos volonte al via volo kiel posedajon.

Vi komprenos tion, se vi scias klarigi al vi, ke *ĉiu el viaj animo-elementoj*, – kvankam vi rigardas ilin ĉiujn kiel „*ecojn*“ enteksitajn en vi, – estas *memstara animo-estaĵo*, havanta *propran* volon kaj la deziregon manifesti *nur sin mem*, eĉ je la malavantaĝo de ĉiuj aliaj animo-elementoj. – – –

Sed vi neniam devas fariĝi *senkuraĝa* dum via ofte ankoraŭ *vana* luktado por akiri la superregadon de via *propra* volo super la *multaj* volo, kiuj en via animo volas *nur sin mem*. –

Vi neniam devas *malfidi* vin mem.

Vi neniam devas perdi *la ĝojon de via koro* kaj *vian serenan trankvilecon*. –

Via tuta luktado estas nur konstanta *provo* de via *pacienco* kaj de la jam akirita *forteco* de via *propra volo*.

Sed sciu, ke tiumaniere vi iam *certe* fariĝos *venkinto*.

Aperos tago, en kiu vi feliĉoplene *spertos en vi la altan ĝojon de l' venkinto*.

Tiam la *ĝermo* de la „*floro de lotuso*“ estos *ekkreskinta*, kaj en la sanktaj templolagetoj, neniam vidataj de *terhoma* okulo, la *spirita okulo* de via

nevidebla *gvidanto*, – la antikvuloj nomis lin la „*anĝelo*“ vin protektanta, – ekvidos *burgonon* super la senmova, mistera akvosupraĵo.

Li vokos siajn kunulojn en sankta ĝojo, kaj ekde tiu tago aro da elektitaj gardantoj gardos la sanktajn akvojn.

Okazis miraklo.

Miraklo, kiun faris *tera homo*, – ĉar pli facile estas konduki furiozan elefanton per maldika kanna ŝnuro tra foira homamaso, ol unuigi la multajn volojn de la animo-elementoj, kiuj konsistigas la homan „animon“, sub la *unu volo de tiu ĉi homo*.

Sed nun la mildigita lumo de l' tago kun siaj molaj radioj devas ĉirkaŭflui la burgonon, por ke ĝi povu iam plene disvolviĝi kaj formi floron de pompa belegeco.

Altaj, centjaraj arboj ĉirkaŭas la misteran templo-lageton kaj protektas la delikatan burgonon kontraŭ la brulantaj sagoj de la suno, kiuj nun tuj bruligus kaj neniigus la apenaŭ formiĝintan formaĵon.

Altaj templomuroj retenas la ardan venton venantan el la dezerto.

Nun, ho serĉanto, komenciĝas por *vi nova aktiveco*.

Sed *tiu ĉi* agado postulas ankaŭ *eksteran* trankvilecon kaj *plej kvietan enprofundiĝon*.

Tion nun farendan vi povos fari *post* la laboro de via profesio, aŭ eble dediĉi al ĝi, *antaŭe*, *kvietan horon matenan*.

Nun estas veninta la tempo, en kiu vi lernu *demandi en via interno*, mallaŭte kaj milde, kaj tiam *aŭdi en via interno*.

Dum tio vi ne povas esti tro kvieta.

Kio en vi *kaŝiĝas* kaj estas baldaŭ *senvualiĝonta*, tio ne estas trovata dum *la laŭta parolado de la pensoj*. — —

Ĝi estas en la mezo de via koro, sed vi ankoraŭ ne perceptas ĝian parolon, ĉar ĝia voĉo estas milda kiel la voko de malproksima birdo.

Ne forpelu ĝian vorton de vi.

Atentu la plej mallaŭtan sonon.

Vi tro facile preteraŭdos en vi ĝian vorton, se vi ne scias daŭre *silenti* en vi.

Komence ĝi respondas al viaj demandoj tiom mallaŭte, ke eĉ la plej delikata venteto forblovas ĝian voĉon en vi. — —

Sed venos tago, en kiu vi tamen *aŭdos* ĝian voĉon, kaj vi lernos *distingi* ĝin de *ĉiu alia* interna voĉo.

Vi perceptos la voĉon *ne* tiel, kvazaŭ estus parolate *de ekstere*.

Ankaŭ *ne per vortoj de la lingvo de via lando* ĝi parolos al vi, *nek en iu ajn alia homa lingvo* de ĉi tiu tero. — —

Kaj tamen tio, kion la voĉo havas por diri al vi, estos *multe pli facile komprenebla* al vi ol ĉio, kion vi ekde la infaneco iam aŭdis *el homa buŝo, en homa lingvo*. — — —

Nun vi devos *sekvi* tiun voĉon.

Via tuta plua irado sur la pado estas preparata sole *per via fideleco*.

Iom post iom vi ekkonos, ke nun via volo servas al vi ne plu nur laŭ la konsilo de *via tera ekkonado*, sed ke vi, nepercepteble, jam kapabliĝis *redirekti* ĝin laŭ la alta volo de l' *spirito*, — laŭ la volo de tiu „voĉo“.

Pli kaj pli profunde vi eniĝos en la sekreton de via animo.

Ju pli multe vi *ekkonos*, des pli multe vi *antaŭsentos* en tio ankoraŭ kaŝita en vi. — —

Danke kaj *zorge* konservu eĉ la plej malgrandan travivaĵon ricevitan en via animo, ĉar: — via *dankemo pro malmulto* plej baldaŭ alportos al vi la *abundon* de interna spertado. — — —

Fine vi ekvidos *regon de internaj mirakloj*, pri kiu hodiaŭ *neniu* priskribo povus estigi en vi eĉ nur *etan antaŭsenton*.

Venos en vian vivon aferoj, kiuj hodiaŭ estas por vi „*neebloj*“, – kaj *hodiaŭ ankoraŭ tute prave*.

Sed kiel la *plej granda* el ĉiuj mirakloj aperos al vi tio, ke ĉio ĉi estas donita en *vian potencon*, – ke vi ne devas atendi en necerteco ĝis la plenumiĝo de via sopirado, ĉar tiam ĝi plenumiĝas ĉiam *kun plena certeco per sia propria forto*.

Se vi ĝis tie ĉi *fidele sekvis la konsilojn ricevitaĵajn en via interno*, la „floro de lotuso“ en la spirita templolageto estos pli kaj pli *malfermiĝinta*.

Tiam vi baldaŭ, aŭ en ne plu fora estonteco, travivos tiun tagon, en kiu la plene malfermiĝinta floro *lumos* sur la akvoj, ardigite de lumo certe ne venanta de la suno de ĉi tiu tero.

Jen estas aperinta la tago, ho serĉanto, en kiu *via Dio* sin rivelas nun *en vi mem* kiel *vian Dion*, – en via „*mi*“. – – –

Li „*naskiĝas*“ *en vi*, kaj vi *en li* ...

Restas *mistero*, ankaŭ por homo kapabla *vidi* en la spirito, kio spirite okazas tie ĉi. – –

Vi certe ankoraŭ bezonas la *internan* gvidanton, sed nun vi estos unuigita kun li en *nova* maniero.

Jam kiam la *burgono* de la „floro de lotuso“ estas aperinta, *povas* okazi, ke vi vidas *la spiritan*

gvidanton antaŭ vi en *magia* bildo, se vi portas en vi la *taŭgecon* por tia vidado.

Tiu bildo ne estas li mem.

Ĝi estas formata de li per *sia* volo el certaj „*magiaj*“ *fortoj de via animo*.

Estu danka, se via „konsilanto“ povas tiumaniere sin montri videblaforme al vi, – instruante vin el *sia* bildo, tiel ke vi havas la impreson aŭdi lin.

Sed ne zorgu, se vi neniam dum via vivo ekvidas lian bildon kiel eksteran aperaĵon.

Nur en maloftaj okazoj estas *eble* al li bilde prezenti sin al vi, kaj li *uzos* tian eblon *nur tiam*, kiam ĝi servas *al via bono* kaj ne povas konduki vin *en la tenton misuzi la „magiajn“ fortojn de via animo* por formi *aliajn „bildojn“*.

Pli bone estas, ke vi *neniam* vidas la bildon de l' gvidanto antaŭ vi, ol ke, *kaŭze de lia* uzo de viaj animofortoj, tiuj ĉi fariĝus *cedemaj* ankaŭ al *trompaj potencoj*. – –

Vi sentos lian gvidadon des pli certe *en via plejinterno*, kaj kion vi ne povas *vidi* ekstere, tio doniĝos al vi plej interne en formo *komprenbla*.

Sed nun, – post kiam *via Dio „naskiĝis“ en vi*, kaj vi *en li*, – via spirita konsilanto, unuigita kun la voĉo de via Dio kaj kun vi, sin rivelos nur en la *plej alta* vivo de *sia* spirito.

Vi sentos lin *plene identa* kun vi, dum li estas ĉe vi.

Li *ne* plu gvidos vin *instruante*, sed *malfermos sin mem al vi*, kaj vi *mem prenos* el lia trezoro de interna vivo tion, kio ankoraŭ mankas al vi. –

Super ĉio ĉi lumos la suno de *dia ĝojo*, kaj la tuta luktado por lumo kaj lumiĝo, kiu konsumis vin antaŭ ol vi ekiris sur la vojo, nun aperos al vi kiel iam suferita „turmento de la infero“.

Vi vidas antaŭ vi *eternon*, kies plej profundaj profundoj *antaŭsentigas pli kaj pli profundajn*, kaj vi scias, ke vi, *unuigita kun via Dio*, eterne paŝados plue tra ĝia plej profundaj mirakloj.

Vidante vin mem *ĉi tie en la ekstera mondo*, en sufero kaj tera ĝojo, vi trovos kiel antaŭe nur *homon teran*, – kaj tamen via *spirito* en via *Dio* estos *levita* alten super ĉion terhoman, ĉar via animo fariĝis „*regno*“ de la *eterno*: – *ĉielo en la ĉieloj*. –

Tio, ho serĉanto, estas la vojo, kiun vi devas ekiri kaj tramigri, se vi volas trovi *vian Dion*.

La „vojo“ estas *en vi mem*, – en via propra „*mi*“.

Tiu ĉi estas la vojo, kiu sole kondukas vin al via *plej alta celo*: – al „*vekiĝo*“ *en la mondo spirita*.

Se vi ne jam *tie ĉi* estas „*vekiĝinta*“ en ĝi, vi „*transe*“, post la *fino* de via surtera vivo, „*plue dormos*“ longe, ĝis oni *povos* veki vin, – el sonĝoj,

kiujn vi mem kreis al vi kaj kiuj tiam povas teni vin
sub sia katena influo dum eonoj. –

Nun aŭdu, kion mi ankoraŭ havas por konsili al vi.

Ekde la tago, en kiu vi decidis iri tiun „vojon“, vi devos tranĉi al vi fortikan bastonon por la vojaĝo.

Vi trovos „la taŭgan lignon“, se vi scias sentante malkovri *la forton de la vorto*, kiu riveliĝas en ĉiu homa lingvo.

Elektu al vi vortojn, kiuj parolas *al via koro*, – vortojn, kiuj „*forte tuŝas*“ vin, „*levas vian koron*“, kaj „*inspiras*“ vin.

Apartigu al vi *mallongan tempon en ĉiu tago*, kaj, se eble, *ĉiam je la sama horo*, – tempon, en kiu vi povas peni, en meditado, unuigi vin al la *spirito* de tiuj vortoj, *sen esti ĝenata* de eksteraj devoj.

Vorto, kiu vin *tuŝis*, estu dum longa tempo, en via „kvieta horo“, ekzerco por via *pensado*, same kiel flutisto sin ekzercas en ludado de melodio ĉiam denove, ĝis li atingis la plej altan purecon de la tonoj.

Vi trovos en tiu ĉi libro multajn vortojn, kiuj povas servi al vi por tiumaniere „ekzerci“ vian pensadon.

Aliajn mi donis alialoke.

Sed vi ne bezonas limigi vin al *miaj* vortoj.

La „*sanktaj libroj*“ de la homaro estas *plenaj* de vortoj, kiuj povas „*tuŝi*“ vin kaj „*levi*“ vin al si.—

Poetoj kaj saĝuloj donis *abundon* de tiaj vortoj.

Sed ekzistas la *danĝero*, ke vi trovas en tiaj vortoj samtempe *tiun* malĝustan instruon, kiun *kutime submetas al ili* neprudenteco aŭ ĝenerala konvencio. —

Tial mi konsilas al vi, komence elekti prefere *vortojn el miaj libroj*, se vi nun volas konfidi vin al mia instruado.

Komencu per tio, ke vi, kiel mi jam diris, provas esplori la fundon de tiaj vortoj unue *en „pensado“*.

Sed *tiam* provu trovi manieron de pensado, kiu estas „*senvorta*“.

Ne ripozu, ĝis, en via „*senvorta*“ kontemplado, la plej profunda *senco* de la elektitaj vortoj fariĝis *tute propra al vi*.

Skribu ilin en klara skribo de via propra mano, aparte de aliaj vortoj, kaj enmemorigu ilin per viaj *okuloj*.

Sentu la elektitajn vortojn, kvazaŭ ili estus *viaj propraj*.

Provu estigi en vi la spiritan konscion de tiu, kiu unuafoje skribis tiujn vortojn.

Penu vekti *vian internan orelon* per tio, ke vi provas „*aŭdi*“ la *sonon* de la vortoj en via interno.

Kiam vi *estas tute certa*, ke vi *sukcesis* en ĉiu el tiuj manieroj de enprenado, tiam – nur tiam – paŝu plu, eĉ se daŭrus tre longe, ĝis vi sukcesas. –

Mi avertas vin, ke vi ne paŝu plu tro frue.

Eble ŝajnas al vi, ke vi povas atingi ĉion ĉi „*en kelkaj horoj*“.

Eble vi opinias jam hodiaŭ, kiam vi ricevas mian instruon, ke vi tute ne plu bezonas tian ekzercon de enprenado.

Multaj volantaj ekiri la vojon restis kuŝantaj jam *en la komenco*, tial, ke ili pensis tion.

Ĉi tie estas postulata *pli*, ol kiom vi supozus en la unua momento.

Ofte oni devas *per similaj vortoj* diri aferojn, kiuj estas tre diferencaj. –

Ne tio, kion poeto nomas „*lingva sento*“, estas tie ĉi postulata de vi, kvankam homo al kutimiĝinta senti la sonon kaj ritmon de lingvaĵo kaj la valoron de vortoj jam estas *tre proksima* al *kompreno* de la tasko ĉi tie prezentita.

Sed kiam vi *vere* atingis ĉion tie ĉi postulitan, tiam *nova, granda plivastigo de via sentado, multe pli konscia travivado de via ekzisto* donos al vi la certecon, ke vi estas *protektita kontraŭ ĉiu mem-trompo*.

Tiam paŝu plu, – vi, kiu strebas al la plej alta el ĉiuj homaj celoj.

Nun vi penu *senti* tiujn vortojn *en vi mem, per via tuta esto.*

Nun tiuj vortoj fariĝu *vivantaj en vi mem.*

Ne nur via *animo* estu *penetrita* de la „spirito“ de la vortoj, sed via *tera korpo* devas nun lerni *senti* tiujn vortojn *en ĉiu sia fibro.* –

La vortoj devas esti *kunfandataj* kun vi, – kun via animo kaj kun via korpo, – tiel ke formiĝas *unu estaĵo.* –

Via tera korpo devas fariĝi *la korpo de la elektitaj vortoj*, kvazaŭ *nenio alia* vivus en ĝi. –

La elementoj de via animo, jam firme *unuigitaj en via volo*, nun devas *unuigi* sin ankaŭ al *la vortoj* de vi elektitaj, kaj *vi* devas senti vin kiel *konscion* de tiuj vortoj. – – –

Sukcesinte, vi estos atinginta *grandaĵon* sur via vojo.

Vi spertos je la unua fojo, kio estas la „*vivo*“, kiu movas *vin* kaj *ĉion alian* *vivantan.* – –

Estos al vi, kvazaŭ vi estus *sur nova terglobo*, – *en nova, neniam antaŭsentita mondo.*

Vi ekkonos en via interno, ke tio, kion la homoj de la tero nomas „*dumtaga konscio*“, estas nenio alia ol profunda, obtuza *dormo* kaj konfuza *sonĝo.*

Jam tiutempe, klara vidado de la spirita mondo povas komenciĝi, se fortoj dekomence ekzistantaj en vi permesas tion, kaj se vi estas homo pli de *vidado* ol de *nocia komprenado*.

Sed se vi estas, laŭ via naturo, homo kiu devas „*kompreni*“ tion, kion li volas ekkoni, tiam vi ekkonos ĝin ne per „*vidado*“, sed per komprenebla *travivado*.

Vi estos ŝanĝita en *novan* homon, kaj vi estos akirinta *konscion de vi mem*, kiu estas *apenaŭ komparebla* kun via nuntempa konscio.

Kiel la radiantanta suno de la hela tagmezo malaperigas en sia lumo la lumon de malgranda olea lampo, tiel tio, kion vi hodiaŭ ankoraŭ nomas via „*konscio*“, transiĝos en *novan* konscion kaj malaperos en ĝi.

Tiam vi scios, kial la saĝulo, parolante pri la „*vivo*“, nomas ĝin la „*lumo*“ de la homoj, kaj vi komprenos la superban sencon de tiuj plej diverse interpretitaj vortoj:

„En la komenco estas la *Vorto*, kaj la *Vorto* estas kun *Dio*, kaj *Dio* estas la *Vorto*.“

„En *li* ĉio havas *vivon*, kaj *lia vivo* estas la *lumo* de la homoj.“

„Kaj la lumo *brilas* en la mallumo, kaj la mallumo *ne povas estingi ĝin*.“

Kiu skribis tiujn vortojn, *tiu bone* sciis kion li diris, kaj *ankaŭ vi ĝin* scios, kiam vi estos alveninta al tiu ĉi punkto de via vojo.

Sed, – „la regno de la ĉielo toleras perforton, kaj nur tiuj uzantaj perforton kaptas ĝin“. –

Sen subigado de via malpacienco, sen persista ekzercado de viaj fortoj, vi neniam povos atendi sukceson.

Sed ne kredu, ke *sovaĝa eldeviga volo* aŭ *konvulsiece trostreĉita klopodo* povus pliproksimigi vin al via celo.

Ne tio ĉi estas la senco de tiu vorto.

Etoso de *serena trankvileco* kaj *kvieta ĝojo* devas konstante regi en vi, kaj via tuta zorgado devas esti direktita al tio, ke vi atingu, kun plej subtila sentemo, tiun delikatan *internan perceptadon*, pri kiu mi supre parolis.

Vi bezonos *pli* da „perforto“ por „*bridi*“ vin, ol vi bezonus por iu *heroa* kaj *vaste videbla* faro.

Sed se vi bone konsideris ĉion, kion mi diris, kaj ekde nun volas *fari* tion, kio estas postulata, tiam mi povas doni al vi *la certecon*, ke *ankaŭ vi iam apartenos* al tiuj, al kiuj doniĝas *sperti* en si la *misteron de la „regno de la ĉielo“*.

Ekiru do vian krutan vojon.

Nelacigebla persisteco akompanu vin ĝis la celo.

Alta helpo ĉiam estos proksima al vi.

Ne rigardu malantaŭen sur vian ĝisnunan vivon, kiu eble estas plena de sufero kaj ĝojo, kulpo kaj merito.

Ankaŭ sciu, ke estas *malgrave* por via tasko, ĉu vi *posedas la tutajon de tera erudicio*, aŭ ĉu vi estas *la plej malalta inter la sensciuloj*. – –

Ne provu *apartig*i vin de la homoj, kaj ne kredu, ke *stranga vivmaniero*, fremda al la vivmaniero de viaj tempo kaj lando, povus *progresigi* vin.

Eĉ malpli povas utili aŭ malutili al vi sur via vojo *la speco de via nutraĵo, kondiĉe ke ĝi tenas vian korpon sana kaj forta*.

Se vi volas eviti *la viandon de buĉitaj animaloj*, tiam evitu ĝin, kaj se vi volas abstini de *vino*, tiam abstinu de ĝi, sed ne imagu al vi, ke rezulte de tio vi fariĝis homo „pli pura“ aŭ eĉ „morale supera“. –

La samo aplikiĝas al *la seksa amo inter viro kaj virino*. –

Ne malaltigu vin al nura animalo, kaj ĉiam regu vian briditan seksan instinkton per forta brido, por ke ĝi neniam povu *venki* vin kontraŭ via volo kaj *fari vin sia sklavo*; sed *ne makulu per blasfemo misteron*, kiun vi povas kompreni „pure“ nur, kiam vi jam apartenas al tiuj *vekiĝintaj en la spirito*. – –

Ne sen esti esplorintaj plejprofundaĵojn, la pastroj de plej antikvaj kultoj proklamis la simbolojn de generado *sanktaj*, – kaj vere: ili honore respektis en ili *ion alian*, ol nur bildon de la eterne generanta naturo.

Abstinado estas necesa *nur tie*, kie la nebridita avido de via seksa instinkto povus fariĝi la *kaŭzo de malfeliĉo kaj sufero* por vi mem aŭ aliaj. – –

Necesa estas *abstinado* de ĉiuj *malvirtoj*, ĉar ili tuj *malhelpus* kaj fine *sufokus* vian altan strebadon al la spirito.

Evitu *ĉion*, kio povus *damaĝi* vin aŭ aliajn.

Evitu ankaŭ ĉiun senaman *person*.

Amu vin mem. – Ĉar, se vi ne povas *ami vin mem*, vi faros al via proksimulo vere *malmultan bonon*, „amante“ lin – *kiel vin mem*. –

Iru mem vian *propran* vojon, sed lasu ankaŭ ĉiun alian tramigri *sian* propran vojon, – eĉ se *liaj* celoj estas *fore malantaŭ* vi. –

Vi ne scias, kiam la horo de aliulo venas, kaj *vi ne havas la rajton* ĝeni lian dormon *antaŭ* lia horo.

Vi ja ne povus „*veki*“ lin, ĉar *neniu eskapas el la dormo*, *antaŭ ol venis* lia horo. –

Sed se lia horo estas *proksima*, tiam li *mem* petos vin pri instruo. – –

Nur tiam estas al vi *permesate doni* ĝin al li.

Nur tiam la lumantoj de la pralumo staros kun sia forto ĉe via flanko kaj efike subtenos vian helpon. –

Vi ne estas vokita gvidi el la spirito al la spirito, kaj tiuj, kiuj estas vokitaj por tio, neniam igos aliajn konfidi sin al ilia gvidado. –

Iru en serena kvieto vian vojon al vi mem.

Via vojo al vi mem kondukos vin, en la regno de via animo, al via *spirita konsilanto*, kaj li gvidos vin en vi al via plej alta celo.

Via vojo al vi mem estas – via vojo al Dio.

Neniam vi povas atingi Dion, se vi ne trovas lin, kiel li estas – en vi mem. –

Sed nun mi volas doni al vi pliajn vortojn, kiuj konigas al vi la agadon de la spirita regno sur la tero, kaj pli da kaŝaj aferoj, se vi, kun bona volo, *volas ekkoni spiritajn aferojn.*

Mi volas pendigi kelkajn florkronojn sur la muroj de via domo.

Kronojn el tiuj floroj, kiujn mi trovis sur miaj plej altaj vojoj kaj je la celo de mia lasta vojo, en mia floranta ĝardeno.

Ne displuku la kronojn, kaj lasu ĉiun floron tie, kien mi enplektis ĝin. –

Alie vi ne povos pure kompreni *tiun unu* grandan *realon*, kiun ĉiuj vortoj de tiu ĉi libro volas konigi al vi.

Alie vi ne povos *ekkoni la misteron*, kiu sen-
vualiĝas tie ĉi en kvietaj vortoj: – la mistero *de la*
dia vivo en la tera homo, – la alta mistero de l’
vivanta Dio. –

„En Sof“

„En Sof“ – *la Infinito, ekzistanta el si mem*, estas „*spirito*“, kiu ampleksas *ĉion* en si.

Sed *la fortoj de la universo* estas „*kaŭzoj*“ de multaj „*efikoj*“, kaj tio misgvide igis vin serĉi *unuan* kaŭzon.

Sed „*unua kaŭzo*“, en la senco celata de vi, *neniam ekzistis*.

Eterne sin formas „Dio“ el la kaoso de la *elementoj de la esto*. –

Tie *ĉi*, nenio estas „*kaŭzo*“ kaj nenio estas „*efiko*“.

Nur la libera, *konscia volo* de la spirito formas *sin mem por si mem* kiel „*Dion*“. – – –

Kaose efikas la elementoj de la esto, tie, kie ili, *elĵetite el praesto*, manifestiĝas kiel la plej profundaj, plej fekundaj fortoj de la *eterna naturo*.

Tie ili agadas nur laŭ siaj impulsoj kaj instinktoj, *sen esti konsciaj* de si mem aŭ de sia efiko.

Tie ili ankoraŭ staras *aparte*, kaj *ĉiu unuopa* agas nur por *si mem*.

Sed el tiu strebado de unuopaj, reciproke opo-
nantaj elementoj rezultas *poluso* kaj *kontraŭpoluso*,

kaj sekve – *altiro*, kiu, post paso de tempo nemezureble longa laŭ homaj nocioj, preparas la *akumuladon* de la elementoj.

En la animo de la tera homo tiam fariĝas realo la reunuigo de ĉiuj elementoj de la praesto, se la volo de homo ĝin aspiras. – – –

Kio en via koro furiozas kaj puŝas, serĉante *formiĝon*, – kio konstante movas vin kaj tenas vin en maltrankvileco: – tiu ĉasanta strebado, per kiu vi sentas vin devigata *atingi* ion ajn, – en tio ekkonu la efikon de tiuj *elementoj de praesto*, kiuj nun volas denove en vi *unuigi* sin, kaj nun en individue difinita formo.

Sed tiuj elementoj, kiuj, *en la alta formo bezonata de via konscio*, riveliĝas kiel viaj *animoelementoj*, ankoraŭ alpremiĝas al vi kun *multaj unuopaj* volo.

Vi ankoraŭ ne havas volon *ordonantan*, kiu povas *unuigi* en si ĉiujn aliajn volojn.

Ĉio, kio en vi diras „*mi*“ *eksteren*, kaj kion vi *interne* sentas kiel vian „*mi*“, estas ankoraŭ plej ofte nur unu el la *multaj* volo, kiuj estu *unuigontaj* sin en la lumo de la *spirita fajrero*, kiu estas via *konscia spirita memo*.

Nur en la *konscia memo* povas *dia konscio reveli* sin denove en elementoj de praesto.

La vojo de la elementoj de praesto kondukas de la *plej profunda naturo*, horore ekscitita kaj *en sia videbla kaj en sia nevidebla sferoj*, ĝis ilia unuiĝo *en la konscio de tera homo* (kaj ekzistas *sennombraj „teroj“*), do *returne, supren*, al „nova“ *konscia vivo en Dio*. – –

Sed kion vi vidas *de ekstere* kaj nomas „*natura forto*“, tio estas nur *efiko*, nur *reflekto* kaj *manifestaĵo de reciproka influado* de la elementoj de praesto, – sed *tute ne* estas *identa* kun ĉi tiuj mem.–

Kion vi nomas la „*realeco*“ de la videbla kaj nevidebla sferoj de l’ universo, tio estas „*reala*“ nur *rilate al tio*, ke ĝi prezentas sole la *efikon* de la praesto, *en la formo de ĝiaj elementoj sur diversaj ŝtupoj de formiĝo*, kiel *fenomenon*.

La universo „*estas*“ laŭ tio, kiom *la elementoj de praesto „estas“*, sed *ne „el si mem“*.

Vi ankoraŭ parolas pri „*Dio*“ rigardata kiel la „*Kreinto*“ de ĉiuj aferoj, „*Dio*“, kiu „*kreis*“ senfinan mondon por sia honoro kaj „*subtenas*“ ĝin por sia honoro.

Sed *tia* ideo pri Dio kaj *tia* ekspliko de la ekzisto de l’ mondo estis *pardoneblaj* nur en la *pratempo*, kiam oni sciis nenion pri ĉio tio, per kio *hodiaŭ* elementoj de praesto riveligis en sia efikado, kaj tio

vere devus instigi vian *pensadon* forigi la malnovajn ideojn.

Voli *nunatemp*e konservi ilin estas tiom *malsaĝe* kiom *blasfeme*.

„*Dio*“ estas sole *la kreinto de si mem* en ĉio kio „*estas*“, kaj ĉio vere „*estanta*“ estas *esto* de lia *esto*. — — —

„*Dio*“ estas sole *la generinto de si mem* kaj *ne*, laŭ la senco celata de vi, *la kreinto de la homoj kaj aferoj*. — — —

La fortoj formantaj ĉiujn sunojn kaj mondojn estas *formoj de la spirito*, — *elementoj de praesto*, — kiuj, *manifestante sin en tempo kaj spaco*, estigas *formaĵojn en tempo kaj spaco*, — formaĵojn, kiuj estas *fenomenoj nur dumtempaj kaj kondiĉataj* de la spaco.

Sed *elementoj de praesto* estas ĉiam *kontinue elĵetataj el la praesto kaj ĉiam kontinue returnas al ĝi*.

Tiel estis ekde eterneco, kaj tiel restos eterne.

Konstante ŝanĝante sian efikon, la elementoj de praesto *manifestiĝas jen estigante fenomenon, jen detruante ĝin*.

Sed *ili mem „estas“* de eterne ĝis eterne, *kiel ajn ili ŝanĝas sian manieron de efikado, kaj ili ne estas „kreataj“ de iu*.

Neniam estis „komenco“, kaj neniam estos fino de tiu praeterna vivo.

La tuta, vasta universo tiom riĉa je formoj, kun ĉiuj ĝiaj aferoj videblaj kaj al vi nevideblaj, – estas nur *la ondanta supraĵo de eterna spirita „maro“*, el kiu sin levas per propra forto la nubo de la *Dieco*. –

„Dio“ *kondiĉas la universon*, kaj la universo *kondiĉas „Dion“*.

Tio nomata *„perpetuum mobile“*, kion *saĝuloj kaj malsaĝuloj esperis inventi, estas jam ekzistanta kaj ne povas „inventata“ duan fojon*.

Ĉiu, kiu strebis por inventi ĝin, nur *obtuze sentetis* – kvankam en ekstreme reduktita skalo – *la eston de la nemezurebla „tuto“*, – la eston de tio, kio *„estas“ el si mem, sen „komenco“ kaj sen „fino“*, la eternan *„vicon“*, – *en la ciclo de l' esto*. – –

Pri serĉado de Dio

Vi ankoraŭ serĉas Dion en *senfina foreco*. — —

Sed jen mi diras al vi:

Antaŭ ol via Dio „naskiĝis“ en vi, kiel vi en li, vi nenie trovos lin.

Antaŭ ol via Dio „naskiĝis“ en vi, vi vane ek-tremigos ĉiujn senfinajn spacojn per via plej profunda krio pri Dio.

Oni diris al vi, ke la tera homo *estas* vualita „dio“ kaj devas nur atingi la ekkonon de si mem, por trovi sin kiel „dion“ por eterne.

Kiuj diris tion al vi, tiuj vere estis *pli mal-proksimaj* de Dio, ol kiom ili sciis.

Ne vi estas Dio, sed sole en vi sur tiu ĉi tero povas formi sin via Dio, kaj tiam vi estas tiel ligita kun via Dio, kiel vorto kaj senco estas unuigitaj en kanto. — —

Tiam nenio povos iam apartigi vin de via Dio.

Eterne li estos „vivanta“ en vi. — — —

Do ne plu serĉu Dion en *senfinaj vastaĵoj*, nek en *mondo nealirebla, alte super ĉiuj steloj*.

Dum vi ankoraŭ *serĉas* Dion, via Dio ankoraŭ ne estas „formita“ en vi.

Tuj kiam li estas „*naskita*“ en vi, vi ne plu *povas* serĉi lin.

Nenio estas *malpli* necesa, ol „serĉado de Dio“.

Sed *provu trovi en vi la vojon*, sur kiu Dio *povas veni renkonte* al vi.

Tiam penu *prepari* ĉion en vi, por ke *via Dio povu unuigi sin kun* vi.

Jen la *volo* de la eterna, ĉion ampleksanta spirito „*volas*“ vin kaj „*vivas*“ en vi, por ke li iam povu „*naski*“ *sin mem* kiel *vian Dion!*

„*Advento*“, – *la tempo de preparado*, – estu de nun en via animo, ĉar vere: vi estas „Bet-Leĥem“, kaj en vi via reĝo naskiĝos, kiu *povas malligi* vin, –
– kiu *sola* *povas malligi* vin. – –

Pri farado kaj agado

Estu aktiva kaj agu sur via vojo, kiam ajn vi trovas en vi forton kaj talenton por agado.

Kiam vi *estos unuigita en vi kun via Dio, via tuta vivo* estos nur *farado kaj agado*, – eĉ vi mem estos nur farado kaj agado. – –

„*Dio*“ estas vivanta fajro.

En li ĉio estas *detruata*, kio neagante *putras* aŭ *ŝtoniĝas*. – –

La volo de la spirito ne povas „naski“ sin en vi kiel *vian Dion*, se vi ne estas aktiva, kvazaŭ via Dio jam *estus unuigita* kun vi.

Via Dio estos *Dio de forteco kaj de aŭdaco*, kaj ne *demono* de senfortaj *deziroj*, de konsumanta *timo*.

Vi ĉiam amu konduki *aktivan vivon*, same kiel la *spirito* eterne *kreas sin mem en konstanta farado*.

Kiel vi povas esperi *unuigi vin kun via Dio*, se *via amo malproksimigas* sin de li?

Vi povas atingi *vin mem en via Dio* nur, se vi estas preta *unuigi vin kun via Dio agante*, ĉar – *la vivanta Dio* ne estas *Dio de revuloj kaj fantaziuloj*.

Nur en *vekiĝintaj* animoj li povas „naski“ sin.
Lia lumo estas multe tro hela, ol ke duondor-
mantaj animoj iam povus elteni ĝin. – –

Unuigu la elementojn de via animo por alta
agado.

Elfaru, kion ajn vi tie ĉi surtere elfari povas, kaj
agu, kiom vi agi kapablas.

Tiumaniere vi iam povos, liberiĝinte de timo, *ren-*
konti vian Dion en vi, – vian *vivantan Dion.*

Vi ne havus vian vivon, se „vivo“, la „*agado*“ de
la *spirito*, ne estus aktiva en vi.

Via vivo estas „*eterna*“ nur tial, ke ĉiu „*agado*“
de la eterna spirito estas *eterna kiel ĝi mem.*

Sed *portempa* vi estas, estante *portempa fenome-*
no en tiu ĉi tera mondo, kaj do estas via *devo* en tiu
ĉi tempa sfero *agante estigi tempajn aferojn*, same
kiel, en la spirita mondo, vi mem estas eterne
estigata de la eterna volo. – – –

Nur en konstanta *agado* vi povas montri vin
provita, kaj en *farado* vi devas esti *preparinta* vin
tiel, kiel alta gvidantaro postulas de vi, se *via Dio*
povu „naski“ sin en vi.

Pri sankteco kaj peko

Tiuj, kiuj vere *sciis* pri la finaj aferoj, ĉiam mal-estimis, ridetante, la „*sanktulon*“ kun lia *vanteco* kaj *falsa humileco*, sed ili sciis ankaŭ distingi inter vantaj, memadmirantaj „virtuloj“ kaj *la veraj grandanimuloj*, kiujn oni de tempo al tempo proklamis „*sanktaj*“.

Ili volas trovi *fierajn* homojn, kiuj scias vivi kun kapo *levita*, – *ne povrajn* *almozulojn* *antaŭ la pordegoj de dia gloro*, – *ne mizerajn pentofarulojn*.

Ili volas trovi homojn, kiuj scias krei el sia vivo *artan verkon*, – *ne homojn kurbiĝantajn sub la vivo*, *kiel la ŝargobesto sub sia ŝargô*. – –

Kiu *povas* esti devojigata de *kulpo* kaj *peko*, tiu *ne estas inda* akiri la premion de l' venkinto.

Kiu volas lukte akiri *la grandan verkon*, tiu ne turmentu sin per zorgo, kiam li vidas, ke la polvo de l' ĉiutago malpurigas lian veston.

Kiu konstante klopodas *forigi makulojn el sia mantelo*, tiu tre baldaŭ estos *perdinta el la okuloj sian plej altan celon*.

Mi certe konsilas al neniu ruli sin en malpuraĵo, – sed ĉiu, kiu volas atingi *la celon*, devas fariĝi

senatenta pri la *polvo del l' ĉiutago* kaj la *malgrandaj makuloj*, per kiuj li kovras sian veston dum sia migrado.

Via piedo ĉiam gluiĝos al la sama loko, kaj neniam vi fidos vian paŝon, se vi sur via vojo lasas vin *ĝeni* de la *eraroj*, kiujn vi neniam povas tute eviti. –

Sed la „*sanktulo*“ egalas al homo, kiu distranĉis al si la tendenojn, kaj nun kuŝas apud la vojo, estante *lamulo*, sed kun nefermitaj okuloj *songas*, ke li *flugas*. –

Aĥ, vi *prefere vadu en kulpo kaj peko* eniĝinte ĝis la ŝultroj, ol ke mi iam devus vidi vin en la danĝero fariĝi tia „*sanktulo*“. – –

Vi perdas ĉiom de via plej bona forto, se vi volas egali al „*sanktulo*“, kaj provi antaŭ ĉio teni vin „*libera de pekoj*“.

Vi ne *povas uzi viajn fortojn*, se estas via konstanta zorgo *eviti ĉiun eraron*, ĉar kie ajn vi estas vere *aganta*, vi samtempe falos *nevole* en *eraron* kaj *pekon*. –

Sed kiel la polvo de marmoro en la laborejo de *skulptisto* certe ne malpliigas la valoron de *lia skulptaĵo*, tiel ankaŭ via „*mi*“, kiun vi celas formi el „*kruda ŝtono*“, neniukaze *perdos iom el sia valoro* pro la „*polvo*“ kaj „*rubo*“, kiu kuŝas ĉirkaŭe

kaj plue estiĝas, ĝis fine via klara formo estas el-
ĉizita.

Forgesu la „*polvon*“ kaj „*rubon*“ de la laborejo kaj ĉiam pensu nur pri la „*verko*“, kiun vi formu el via ekzisto, celante ĝian altan belecon kaj eternan daŭron.

Kaj kiam vi *falis profunden, ne volinte fali*, tiam *relevu* vin rapide kaj forgesu, ke vi iam falis.

Sed *eĉ tiam*, kiam *via volo* faligis vin, vi havu neniun alian zorgon, ol ke vi *senprokraste* vin *re-
starigu*.

Neutila estas via „*rimorso*“ post la falo, – sed via fortoplena *leviĝo* povas doni al vi *daŭran mem-
certecon*, kiu instruos al vi *eviti novan* falon.

Vere, *pli bone* paŝas antaŭen *tiu*, kiu scias, ke *li havas en si la energion por levi sin post la falo*, ol *tiu*, kiu en konstanta timemo provas zorge *eviti* ĉiun danĝeron de falo. – – –

Nenio povas damaĝi vin sur via vojo, krom la *timo* antaŭ la haltigantaj fortoj de la *kulpo*, – kaj aliaflanke tiuj *haltigantaj fortoj* rezultas *sole el via timo*. – –

Amante paŝadu antaŭen, estante *libera de timo*, – sed via amo neniam subfosu la fortojn, kiujn vi bezonas por rezistado.

Estu ĉiam *bonkora* kontraŭ ĉio vivanta, sed – „*bonkoreco*“ kontraŭ *atakanta tigro estas bone celita paf*o, ĉar ankaŭ tion, kion vi *devas detrui*, vi *ne suferigu*. – – –

Liberaj devas esti ankaŭ viaj bonkoreco kaj amo, alie ili fariĝos por vi *malvirtoj*. – –

Libera estas nur tiu, kiu mem liberigas sin.

Neniu ekstera „Dio“, reve imagita de vi super la steloj, iam povos liberigi vin. – –

Sed: *se vi helpas vin mem, tiam vin helpas ankaŭ via Dio*, – – via Dio, kiu volas iam „naski“ sin en vi mem. – – –

Vi *mem* kreis al vi viajn *fantomojn*, kaj *nur vi mem* povos *neniigi* ilin.

Vi ankoraŭ rigardas kiel „*kulpon*“ kaj „*pekon*“ multajn aferojn, kiuj vere *ne* meritas tiun blasfemon, – kaj kelkajn aferojn vi prenas *bagatele*, vidante en tiu teniĝo eĉ „*virton*“ vian, kvankam ĝi estas por vi *tento pereiga*.

Neniam *serĉu* „*tenton*“, sed aliaflanke vi ne *katenu* vin mem – egale al „*sanktulo*“ – tiel ke via okulo ĉie vidas *nur „tenton“*. – –

Kun *levita* kapo iru vian vojon, kaj sci, ke vi ĉiam estas gardita *plej bone*, se vi povas fidi *vin mem*. – – –

Tiam neniŭ „*falo*“ aŭ „*eraro*“ povas malhelpi vin dum via paŝado, ĝis vi iam, fortigita per alta forto, *atingos vian celon*, kiu estas *en vi mem*.

Sed mi avertas vin, kaj konsilas al vi:

Prefere serĉu kulpon kaj pekon, – sed gardu vin kontraŭ la volo fariĝi „sankta“.

La „okulta“ mondo

Ĝis nun, en tiu ĉi libro estis parolate preskaŭ nur pri *tio* „nevidebla“, kio estas *via animo* kaj disvolviĝas en viaj *animoelementoj*, kaj pri tiu alta *spirita mondo*, el kiu vi *originas*, kaj kiun vi devas *retrovi*, se vi volas atingi *Dion* kaj trovi la *pacon*, kiun la ekstera mondo ne povas doni al vi. –

Sed estas ankoraŭ parolende pri io *alia* „nevidebla“, – pri nevidebla sfero, kiu ĉirkaŭas vin *de ekstere*, same kiel *ĉiuj* aferoj kaj formoj de la *videbla materia sfero*.

Tiu nevidebla sfero estas tre malmulte konata *parto* de tiu ĉi *fizika-materia mondo*, kaj estas eĉ ties multe *pli granda* parto.

Tra *tiu* nevidebla sfero *la spirita gvidanto* unue devas paŝi, kvazaŭ trans ponton, kiam li volas atingi *vin*, kiu ankoraŭ *ne estas preparita*, ĉar vi ankoraŭ ne estas kapabla percepti lin *el la unueco de viaj animoelementoj*, tiel, kiel vi *estonte* ekkonu lin, – *en Dio*.–

Li komence povas atingi vian *internon* nur el tiu „nevidebla ekstero“.

En *ĉiu tempo* ekzistis homoj, kiuj kapablis *ekkon* tiun „*nevideblan* eksteron“ tute klare.

Tiu kapablo estis, kaj estas, *sen iu valoro* al ili por atingi sian *plej altan celon*.

Ili „*vidas*“ *pli* ol aliaj, – same kiel vi, rigardante tra *teleskopo*, povas vidi la „*ringojn*“ kaj „*lunojn*“ de foraj steloj, dum homo rigardanta per la nuda okulo *vidas* nur luman punkton.

Ilia „*vidado*“ estas ligita al *fizika* organismo, kiu en la homo de la estanteco estas nur malofte tiom „*evoluigebla*“, ke la homo povas uzi ĝin.

En homoj de *antikvaj* tempoj tiu organismo ofte estis *evoluinta* pli forte, kaj ankaŭ en estontaj homoj ĝi *reevoluos*, post kiam ili mem povis certigi, ke ĝi ne plu fariĝas por ili fatalaĵo.

La evoluo de tiaj fizikaj organoj, *ne necesaj* por la vivo *ĉiutaga*, okazas, laŭ la maniero de *ondada movo*, jen kun pli granda, jen kun malpli granda intenseco, ene de la tuta homaro.

Tiel la kapablo vidi kun plena certeco la *nevideblan sferon* de tiu ĉi fizika-materia mondo ofte tute *estingiĝas*, sed en aliaj tempoj reaperas ĉie en la mondo.

Temas pri *rudimentaj organoj de la pratempa homanimalo*, kiuj estas *benoplenaj* nur al *tiuj* homoj, kiuj estas *anime preparitaj* por fari la ĝustan uzon de la kapabloj rezultantaj el tiuj organoj.

Tiuj homoj, en kiuj la organismo por perceptado en la nevidebla sfero estas plene evoluinta, senescepte posedas kvazaŭ „pli spertajn“ animoelementojn, kiuj jam agis en la animoj de multaj homoj de la pratempo.

Homo, en kiu tiu „povo vidi“ en la fizika nevidebla sfero montriĝas ligita kun la strebado al pli alta ekkono, ne fariĝos viktimo de eraro ankaŭ en ĉi tiu nevidebla parto de la fizika mondo, sed trovos bonkorajn konsilantojn kaj zorgemajn helpantojn el la regno de la eterna spirito, kiuj faciligos al li kompreni tion, kion li perceptas.

Kiam li estas plene „vekiĝinta“, tiam eĉ povas okazi, ke li ricevas, pere de pli altaj „vekiĝintoj“, potencon super fortoj de tiu nevidebla mondo, por kunagi je la evolua plano de la tera homaro, plano progresigata de la lumantoj de la pralumo ekde antaŭ jarmiloj.

Plej ofte, nur malmultaj el la „spertuloj pri la nevidebla sfero“ estas trovataj en ĉiu tempo, kiuj montriĝas „taŭga“ por tio.

Sed estus dezirinde, ke ĉiuj homoj, kiuj sentas en si iel – ĉu pli, ĉu malpli forte – la organismon por sperti la fizikan nevideblan mondon, observu ĝin plej zorgeme kaj antaŭ ĉio gardu ĝin kontraŭ ĉiu misuzo.

Eble iu aŭ alia ĝermo povus esti kreskigata sub sekura flegado, kaj doni benoplenan efikon.

Estas necesaj multaj „*laboristoj en la vinberĝardeno*“, kaj la homaro nuntempa gajnus multon, se reestiĝus al ĝi *spertaj* helpantoj kaj instruantoj, kiuj povus paŝi *sur sekuraj vojoj* ankaŭ en la *nevidebla parto* de ĉi tiu fizika mondo.

Ĉi tie, ne la „*eksperimento*“ per medioj kaj somnambuloj donas klarigan informon, sed nur la *propra sperto* de *tiuj organe kapablaj*. –

Neniun malrespekton al scienca esplorfervoro, – sed per tio nomata „*metapsikiaj*“ eksperimentoj, kiuj, kiel evidentigas la uzata termino mem, eliras de *malĝusta antaŭ-kondiĉo*, de *erara antaŭ-juĝo*, – oni nur altiras la *parazitajn fortojn* de la fizika nevidebla sfero.

Tiuj „*parazitaj fortoj*“ de la nevidebla parto de la fizika mondo estas estaĵoj, kiuj *laŭ la ŝajno* tre similas al la fortoj konsistigantaj la *animon*, sed nepre ne devas esti *konfuzataj* kun „*animoelementoj*“.

Tio estus la *sama* interkonfuzo, kiel se oni konfuzus la *grimacojn de simioj* je la kradostangoj de ilia kaĝo kun la sprita *prezentada arto de grandaj aktoroj* sur la scenejo.

La estaĵoj de la nivedebla parto de la fizika mondo, kun kiuj oni interriltas en eksperimentoj nomataj „metapsikiaj“ kaj ankaŭ tie, kie oni solenatoŝe kredas esti en kontakto kun mortintaj homaj animoj, certe ne malhavas specon de „*konscio*“, kaj ofte „*scias*“ *pli ol iliaj demandantoj*, – sed nur obtuze kaj ŝonĝece ili estas konsciaj de si mem. Tial ili apenaŭ estas morale kondamnindaj laŭ homa mezurilo, se ili ŝajnigas esti *tio*, kion oni *supozas* vidi en ili, kion oni *kredas* trovi en ili. – –

Antaŭ ĉio ili volas ricevi *konfirmon de sia ekzisto*, kaj por akiri tiun konfirmon ili estas pretaj fari ĉion, kio ne estas ekster ilia potenco; sed ili faras eĉ pli: ili provas trompe pretendi havi potencon tie, kie ilia potenco finiĝis.

Ili estas ligitaj de *neniu „devo“* kaj de *neniu „konscienco“*.

Via *pereo* donas al ili la *saman* ĝojon kiel via *fortiĝo*, se ili nur *trovas sian ekziston konfirmita per ilia influo sur vin*. – – –

Ve al la homo, kiun tiuj estaĵoj jam „posedas“.

Ili elsuĉas al li la medolon de l' vivo kiel vampiroj, ĉar ili *devas „nutri“* sin per liaj fortoj, se ili servu lin.

Se li ne mem povas *forskui ilin de si*, li fariĝos la *sklavo* de iliaj mallumaj instinktoj, ĝis lia animo „*mortas*“, ĉar ĝiaj elementoj iom post iom *mallig-*

iĝas de li, – kaj tiam, kiam lia tera korpo kuŝiĝas por la lasta dormo, lia iama konscio finiĝas *en neniigo*, – – la sola *vera*, ĉar *eterna* „morto“, kiu reale povas minaci la teran homon. –

La *plej malmultaj* homoj *scias* kun *certeco* pri la trompoplena naturo de tiuj estaĵoj, kiuj estas *mal-facile nomeblaj*, ĉar ekzistas en la videbla mondo neniuj objektoj, kun kiuj ili povas esti komparataj.

Ili estas la nevideblaj estaĵoj, per kies forto la *fakiro* faras siajn „*miraklojn*“, – kaj ĉar oni *ne konas* tiujn estaĵojn, oni admire rigardas la *fakiron*, kiam sin montras iu *vera* el tiuj ĉi ligitaj al la submondo.

Tiuj estaĵoj „povas fari“ *multon*, kiu *neniam* estos ebla al la surtera homo, dum li agas sole el siaj *propraj* fortoj.

Ili „*vidas*“ *viajn pensojn*, *pli bone ol vi mem konas ilin*, – kaj ili povas *videbligi* antaŭ via okulo *viajn plej kaŝajn imagobildojn*.

Ili povas, portempe, *estigi formojn kaj substancojn*, kiuj estas *tiom palpeblaj kiom ĉiu alia surtera afero*, *kiom ĉiu substanco konata al vi*, – ĉar tiuj estaĵoj estas la nevideblaj teksantoj de la fizika formaro, kiuj nodadas la nevideblajn fadenojn de ĉiu videbla fenomeno.

Ili povas vuali sin per *formoj de homoj*, de homoj jam de longe ne plu vivantaj sur la tero, – ĉar ĉiu formo, kiu iam „*estiĝis*“ sur la tero, estas konservita en la sfero de tiuj estaĵoj kiel – por ekzemplo, kvankam la komparo lamas – galvanata matrico, per kiu oni ĉiutempe povas fari novan kopion per fandado.

En realo, la „matrico“ estas *nevidebla, ekstreme subtila formaĵo*: – lamneca sistemo, kiu estas la matematike preciza kopio de ĉiuj internaj kaj eksteraj formoj, kiuj iam konsistigis homan korpon.

Tiu ĉi formaĵo, kiu ordinare estas kuntirita en si mem en plej malvasta spaco, estas, en adekvataj cirkonstancoj, kvazaŭ „replenigata“ per la fizikaj fortoj normale subtenantaj la teran korpon de la „medio“.

Dum la daŭro de tia manifestiĝo la „medio“ devas resti en tiu stato de senkonscieco, kiun oni konas sub la nomo „tranco“.

La estiĝinta ŝajna korpo estas, dum la – plejfavoraokaze treege mallonga – daŭro de sia manifestiĝo, la agejo de la *animala animo* de la senkonscia „*medio*“; samtempe tiu animala animo estas tenata sub speco de hipnoto fare de tiuj nevideblaj estaĵoj de la fizika mondo, kiuj manifestiĝas en la estigita ŝajna korpo.

Kiam tia fantomo eĉ povas *paroli*, kaj parolas ekzakte en la maniero kiel la koncerna mortinta persono, tio estas neniom pli miriga ol la parolkapablo de normale enkarniĝinta homo, ĉar ankaŭ en la ŝajna korpo, dum ĝi ekzistas, estas fizike remanifestitaj ĉiuj organoj en la sama formo, en kiu ili ekzistis en la koncerna persono, – precize, eĉ rilate eventualajn misformiĝojn kaj aliajn difektojn.

Mi esperas, ke apenaŭ estos necese diri aldone, ke *tiu formo restinta en la nevidebla parto de la fizika mondo* havas *ne pli* da ligiteco kun la homo, al kiu ĝi iam apartenis, ol la deĵetita serpentohaŭto kun la rampulo, kiu sin senigis je ĝi.

Ne senkaŭze mi tie ĉi parolis pri aferoj, *kies nura prezentado naŭzas* min.

Mi volas vidi vin kapabla *mem ekzameni* aferojn, kiuj povus *konfuzi* vin.

Mi volas, ke vi ne lasu vin *trompi* pro nescio, se io miriga okazas antaŭ vi.

Ne tio, kio povas renkonti al vi sub la formo de *homa trompo* en la kampoj tie ĉi menciitaj, estas rigardenda kiel „danĝero“.

Tio, kio estas *aŭtentika* ĉi tie, enhavas *realan* danĝeron. – –

Mi tie ĉi avertas vin pro certigitaj kaŭzoj. –

Tiuj estaĵoj, se vi iam spertas ilian influon, povas ekflari ankaŭ *vin kiel predon*.

Ili trovas – *tro ofte* – tian predon en tiuj, kiuj, anstataŭ ekpaŝi sur sia vojo al la *unuigo de la animo-elementoj* kaj al sia *Dio*, penas akiri „*okultajn*“ fortojn, sen esti atingintaj la gradon de ekkono necesan por ke iu *vere kun la spirito unuiĝinta* inter iliaj homaj fratoj povu instrui ilin, dum *multaj jaroj de plej strikta preparado, primajstri* la koncernajn estaĵojn kaj iliajn terurajn fortojn.

Eĉ tiam, ĉiu, kiu sennecese ekscitas kaj uzas ilin, estas en konstanta danĝero, – kaj neniu el tiuj, kiuj, por provado de iliaj fortoj, devis lerni subigi tiun regnon de la nevidebla fizika mondo, iam restos en *ĝi pli longe*, ol kiom *la amara devigo de „tasko“ postulas* de li. – – –

La kaŝa templo

Ĉiuj, kiuj ekiris kaj ekiros la altan vojon montritan de mi en tiu ĉi libro, tuj estas proksime *interligitaj* en sia interno, eĉ se miloj da mejloj apartigas ilin en la ekstera mondo.

Tiu „interligo“ estiĝas en du manieroj: – *unue* per reciproka altiro de radiadoj kiuj estas estigataj, nevole kaj nekonscie, de homaj, *en si determinitaj* volocentroj kiel *radio-„kirloj“* en certaj, *pli altaj* regionoj de la *nevidebla fizika sfero*, kaj tie *interligas ĉion samspecan*.

Kaj *due* per *rekta influenco-efiko* de la elementoj de individuaj *animoj*, kies *volostrebadoj* devas esti nur *direktataj en la saman direkton*, por ke tiuj animoj estu interligitaj tuj kaj praktike sendependece de spaco kaj tempo.

Sed estas eco de la homa naturo, ke oni volas esti ekkonebla kaj proksima al si reciproke ankaŭ *en la regno de la eksteraj sensoj*, tuj kiam oni sentas, ke per direktiĝo *al la sama celo* oni apartenas unu al la alia.

Krome, la *kuraĝo* kaj *fido* de multaj homoj *fortiĝas*, se ili, migrante sur la „vojo“, povas *paroli* kun vojokunuloj de tempo al tempo.

Ekzistas ankaŭ kaŭzoj *pli altaj*, kiuj ofte faras tre dezirinda la *komunecon en videbla proksimeco*.

La vojo al la spirita vivo ofte malfermiĝas *pli facile*, se du, kiuj ekiris ĝin, estas interligitaj *ankaŭ en sia ekstera vivo* kaj tiel povas migri sur ĝi *kune*.

Tial ĉiu, kiu ricevis la *rajton* kaj la *forton* por instruado en tiuj ĉi aferoj, devos ripeti la vorton de la alta majstro de Nazareto: –

„Ĉar kie du aŭ tri kunvenas en mia *,nomo‘*, tie mi estas *meze inter ili*.“

Sed neniam la nombro estu *pli ol „du aŭ tri“*, kiuj kunvenas *por komuna interŝanĝo de siaj animaj spertoj per vortoj de ekstera parolado*.

Bonaj kaŭzoj postulas ĉi tiun *malgrandan nombron*.

Ĉiu *pli granda* grupo de anime ligitaj homoj povas havi benoplenan efikon *nur tiam*, se ĝi – rilate *parolan interŝanĝon pri animaj spertoj* – restas *dividita en si kiel multobla „duopo aŭ triopo“*, kaj ĉiu tia „ĉelo“ el du aŭ tri devas formiĝi nur *surbaze de la plej klara sento de persona interaparteneco*, tiel ke, eĉ *sen aparta „ĵuro“*, ĝia *nedetruibleco* estas *dekomence certigita*. – – –

Sed la serĉantoj *neniam* sin kunligu formante „komunumon“, ĉar *neniu komunumo* estas *ebla sen*

devigo pri kredo, kaj la anima disvolviĝo toleras *nenion malpli* ol iun ajn eksteran devigon. —

Ĉiu „*komunumo*“ formas nur la funebran *procesion de sia morta kredo*.

Dum la kredo vive kaj age *kreas*, ĝi eltenas por limigita tempo la ronĝantan malsanon de „*kredanta komunumo*“, — sed tiam ĝi disfalos, velkinte kiel floro, sur kiun venis la melduo, kaj tiuj kiuj kiel „*komunumo*“ opiniis teni ĝin vivanta, mem estos fosintaj ĝian *tombon*. — — —

Sed al multaj estos *eminente utile*, se ili povas — ĉu kiel unuopuloj, ĉu kiel membroj de samcelaj grupoj *formitaj el „ĉeloj“ de du aŭ tri individuoj — paroli unu kun la alia* pri la aferoj de ili *travivitaj aŭ interne viditaj* sur ilia vojo al la lumo.

Se estas aranĝebla, tiuj duope aŭ trioje unuiĝintaj renkontiĝu *ĉiam je la sama horo* por dividi sian internan ekkonon unu kun la alia.

Certe ne ekzistas, eĉ en la plej profundaj profundoj de la spirito, kaŭzoj kiuj povus esti la bazo por „*malpermeso*“ de tio, ke *multaj tiaj duopoj aŭ triopoj ekstere interligiĝas*, kondiĉe ke tiu interligiĝo ne degeneras al la formiĝo de „*komunumo*“ kun ties *kredo-devigo kaj kredartikuloj*. — —

Nur tiam la *ekstera unuiĝo* *distranĉus* la internan.

Ĉu vi volas nun tramigri vian vojon *sola*, aŭ *kun unu* aŭ *du vojokunuloj*, – vi ĉiam sciu, ke *kaŝa templo* vin unuigas kun *ĉiuj*, kiuj ekiris sur sia vojo kiel vi. –

La lumantoj de la pralumo estas la veraj „*sacerdotoj*“ de tiu templo, kaj ĉiu serĉanto sekvanta en si sian „*vojon*“ staras sub ilia sekura *gvidado*, eĉ se lia interno ankoraŭ estas *sen propra lumilo*, kaj li ankoraŭ *ne ekkonas la manon*, kiu lin gvidas.

Tie ĉi oni *ne* postulas de vi *fidi* al *helpo*, kiun vi *ne povus elprovi*.

Ni postulas *nur*: – ke vi *fidu vin mem*, ĉar tiu fido estas *nepre necesa* por vi sur via vojo.

Se vi akiris *tiun* fidon, kaj survoje ĉiam denove akiras ĝin, tiam vi tre baldaŭ *sentos* en vi mem la *verecon* de miaj vortoj.

La malkovrintoj de novaj kontinentoj *estis fidingitaj* en siaj koroj *trovi* la serĉitajn landojn trans vastaj oceanoj, kaj ili *trovis* tion, je kio ili fidis. –

Tiel ankaŭ vi *fidu pri vi mem*, ke vi portas en vi *la fortojn*, kiuj iam kapabligos vin miregante *travivi en vi mem* la sanktajn miraklojn de la *kaŝa templo* sur tiu ĉi tero.

Estas necese, ke vi *fidu* viajn proprajn fortojn, ĉar via fido povas *malligi*, sed ankaŭ *kateni* tiujn fortojn.

Tion, por kio vi ne antaŭe kredas vin *kapabla*, vi poste apenaŭ *povos fari*. –

Tial vi restos neatingebla por ĉiu *helpo* el la *nevidebla templo* ĝis la tago, kiu trovas en vi la rokofirman *fidon*, *ke vi portas en vi la fortojn* por *akiri* tiun helpon. – –

Karmo

En ambaŭ regnoj de la fizika mondo: – en la videbla, kiel en la nevidebla, – ĉiu *ago* havas siajn *videblajn* kaj siajn *nevideblajn sekvojn*. – –

Ĉiu voloimpulso, ĉiu penso kaj ĉiu vorto estas rigardendaj kiel „*ago*“.

Vi restas *ligita* al la *sekvoj* de via ago, ĝis vi estos *unuiginta* la elementojn de via animo, kaj kun ili unuiginta vin al via *Dio*. – –

Nur tiam vi povos *neniigi la sekvojn* de viaj agoj tiom, kiom vi *volas* neniigi ilin.

Antaŭ neimageblaj tempoj vi *estis unuigita* kun via Dio, estante pure *spirita* „homo“ en *spirita* formo, kaj *enplektita* en la *ĉion ampleksanta vivo* de la esenca, *substanca* „spirito“.

Ankaŭ ĉiuj vastaj regnoj de la *nevidebla* parto de la *fizika* mondo, – *nemezurebla* regiono de la universo, – tiutempe estis malfermitaj al *via aganta volo*, kaj vi ilin *mastris*.

Estis malfermita al vi kampo de agado, kiu etendiĝis de la *regno de l' plej pura spirito* eksteren en *sferojn de pli kaj pli densa formiĝo*.

Tiel vi atingis la limon, kie io *nevidebla* fizika *densiĝas* formante ion *terasense videblan* materian.

Vi vidis la efikadon de la *timigantaj potencoj de la eterna kaoso*, – la *retrofrapaj fortoj de la absoluta, rigida kaj lafo-densa* „nenio“, – kaj vi subfalas al *ilia malamo kontraŭ ĉio* „estanta“.

Sed vi neniam estus devinta subfali al ili, se vi ne antaŭe, en ebrieca ekstazo pri via potenco, estus *defalinta de via Dio*. – –

Tiel vi estis fariĝinta *senhelpa* kaj perdinta vian plej altan *potencon*.

Tiam vi *devis* fariĝi la predo de la malaltaj fortoj, kiuj, ĉiam katenitaj en la sfero de la retrofrapaj fortoj de la absoluta „nenio“, en konstanta „*mal-amikeco*“ provas *neni-igi* – ŝanĝi *laŭigante al la* „nenio“ – ĉion, kio eniĝas el la sferoj de eterne pura *esto* en ilian regionon: – „falas“ en la malluman zonon de ilia efikado. – –

Ankaŭ la *fortoj*, kiujn vi antaŭe povis *primajstri*, kaj per kiuj vi tre facile estus *venkinta* la potencojn nun al vi „malamikajn“ tiumaniere, ke ili estus ŝanĝiĝintaj en *respektoplenajn servantojn* de via volo, estis fariĝintaj por vi *tro grandaj, tro multkapablaj*.

Tial ekkaptis vin *timo* antaŭ viaj *propraj*, iam *primajstritaj fortoj*, kaj pro la *timo* antaŭ ili vi ek-sopiris *novan, alian* vivon, en la regno de *materia konkreteco*, la regno de tiu ĉi, *fizikasense* percep-

tebla universo, kiu *kaŝas* la timigajn fortojn al tiu, kiu ne rompas la apartigan muron ĉi tie ekzistantan.—

Via *volo* estis falinta el la alta *lumado*, kaj nun *volis* eniĝi kun vi *en la mondon de fizika materio*.

La „*mondo de la kaŭzoj*“ estis via hejmlando, — sed via timo elpelis vin en la „*mondon de la efikoj*“. — —

Tio estas *la vero* en la legendoj pri „*paradizo*“ kaj pri la „*falo*“ de la homo rezulte de „*prapeko*“. —

Antaŭ tiu *falo* vi jam kreis al vi vian „*karmon*“ — kiel en la oriento oni nomas la kaŭzaron de la sorto de ĉiu unuopa homo sur la tero — *per la „grado“ de via „deturniĝo“ de via Dio*, per la „*grado*“ de la freneza ekstazo, kiu volis igi vin vidi „*dion*“ en vi mem.

„*Vi estos kiel Dio.*“

Vi mem determinis al vi *la tempon*, en kiu vi estis naskota en tiun ĉi teran mondon, *la linion de deveno*, en kiu tio okazis, kaj *la sortovojojn de via surtera vivo*, kiam vi, estinte *reganto en la spirita mondo per la forto de via Dio*, fariĝis *sklavo de malaltaj potencoj* en mondo, kiu donas kaj *devas doni* al ĉiu ago ĝian „*sekvon*“, ĉar tiu ĉi mondo mem estas nur *reflektaĵo* de efiko kaj ne havas la

potencon vole fini la katenon de okazado en sia regiono.

Ankaŭ tio, ke vi naskiĝis sur *tiu ĉi* planedo, estas sekvo de la speco de via *unua ago en la regiono de neeskapebla kaŭzeco*, – ĉar vere: ekzistas sennombraj planedoj en la nemezurebla spaco, sur kiuj vivas „homoj“, ankaŭ *aspekte* similaj al la terhoma animalo, kaj vi estus povinta trovi vian animalan korpon ankaŭ sur *alia* el tiuj kosmaj korpoj.

Ĉiuj homaj estaĵoj sur la loĝataj planedoj de aliaj sunaj sistemoj iam „falas“ el la lumado en la *sama* maniero kiel vi.

Ekzistas multe *pli feliĉaj* kaj profunde *pli malfeliĉaj* inter viaj foraj, materie enkorpiĝintaj kunuloj.

Sed vi ne devas imagi ilin al vi *en monstraj figuroj*, ĉar la formo de la terhomanimala korpo estiĝis *ne rezulte de blinda hazardo* nur sur *nia* malgranda planedo, sed laŭ leĝoj kiuj validas *por la tuta*, nemezurebla fizika-materia universo kaj finfine estas de *spirita* origino.

La „*falo*“ de la homa spirito el la pura, substanca spirita mondo en la zonon de influo de la absoluta „nenio“ okazis ne nur en fora pratempo, sed *ĉiam*, de eterneco ĝis eterneco, kiel ankaŭ la materia fizika kosmo kun sia ĉiama estiĝado kaj forpasado

tamen *kiel tuto eterne* ekzistas kaj ekzistos *kune kun la regno de l' eterna spirito* kiel ties „*plej ekstera kontraŭefiko*“.

Sed ĉiam ankaŭ ekzistas malmultaj spiritahomaj estaĵoj, kiuj *ne* subiĝas al la „falo“ kaj *ne* „perdas“ sian Dion en si.

Mi jam parolis pri ili, nomante ilin la „*plejaĝuloj*“ aŭ altaj „*patroj*“ de la lumantoj de la pralumo, kaj vi nun ekscios, kion via antaŭsentado jam povus diri al vi: – ke la spirita penado de tiuj nefalintoj kaj de iliaj „filoj“ kaj „fratoj“, edukitaj de ili, por la *malligo* de la *homoj falintaj* el la luma regiono de la spirita mondo kaj *implikitaj en animaleco*, direktiĝas *ne nur* al la homaro sur nia planedo.

Sur *ĉiuj* loĝataj planedoj de la nemezurebla universo troviĝas tiuj helpantoj restintaj en la konscia vivo de la substanca spirito, kaj por *ĉiu* el tiuj mondoj ili edukas, el la tien falintaj, siajn spiritajn „filojn“ kaj „fratojn“, per kiuj ili ankaŭ sur tiu ĉi tero nun provas *vin* atingi kaj tiri el via mizero.

Via celo tute ne estas fariĝi unu el iliaj „filoj“ kaj „fratoj“; por tio nun estus *tro malfrue*, ĉar la necesa taŭgeco rezultas *tuj post la okazinta falo* nur per *libera volo-impulso* de falintoj, kaj tiam postulas „*edukadon*“ *dum jarmiloj*; kaj tiuj edukataj devas

same longe reteni sin de eniĝo en fizika-materian korpon de homa animalo.

Oni intencas nenion alian, ol ke vi hodiaŭ, en via surtera tago, venu al la ekkono, *de kie vi eliris* kaj kien vi povas *reveni*. – –

Oni volas montri al vi la „*vojon*“ al tiu reveno.

Oni volas gvidi vin returne al *via Dio*, kun kiu vi *unuigu* vin denove. – –

Kiom ajn profunden vi falis, tamen tiuj fortoj, el kiuj – de ilia *kaosa* maniero de efikado ĝis ilia *plej alta* manifestiĝo – senĉese la Dieco formas sin mem, estas agantaj en vi en *tre alta* formo.

Ĉiam restis en vi ankaŭ „*fajrero*“ de *spirita* konscio – kaŝite kaj ankoraŭ ne unuigite kun via cerba konscio – kiel alta *direktanto* de tiuj fortoj, kaj kiel *via „konscienco“*.

Vi neniam povas perdi tiun „fajreron“, kiom ajn profunden vi eble povus fali dum via surtera vivo.

Eĉ se vi *anime „mortis“* al ĝi, ĝi tamen devas kaŝe resti en vi ĝis via lasta spiro.

Estas *tiu „fajrero“*, kaj *sole ĝi*, kiu konas vian „*karmon*“.

Vi povas *plibonigi* aŭ *plimalbonigi* tiun „*karmon*“, sed *estingi* ĝin vi povas *ne pli frue*, ol kiam

vi *unuigis* en vi la *multajn* volojn, kiuj ankoraŭ agas en vi kaose unu apud la alia. – –

Kiam ili ĉiuj unuiĝas en tiu luma fajrero de *spirita* konscio, kiu estas via vera, substanca, *eterna* „homa spirito“ en vi, tiam „*naskiĝas*“ en vi *via Dio* el *spirito*, kaj tiam vi fine estas *liberigita* de via „*karmo*“, – de la *kateno de sekvoj de via praago*, – kiel nove reveninta *homo de la eterneco*. – – –

Bone estas al vi, se vi sukcesas en tio jam dum via surtera vivo.

Se vi *ne* sukcesas, vi, *eĉ forlasinte vian surteran korpon*, atingos vian „*trankvilon*“ en vi *mem* ne pli frue, ol kiam vi trovis vian *trankvilon en via Dio*, *konsciiĝinte* de viaj unuigitaj animoelementoj kaj fariĝinte *ilia unusola volo*.

Sed „*tie*“ povas daŭri *longe*, ĝis vi tion atingas, ĉar tiam vi *ne plu* povas ŝanĝi, *ne* plibonigi, vian „*karmon*“, – kaj vi spertos eternan lumon en vi *certe ne pli frue*, ol kiam *la lasta sekvo de via praago konsumiĝis*. – – –

Hinda saĝo avertas la homon *ne krei* „*novan karmon*“ – kaj vere tiu averto estas *frukto de vera ekkono*.

Sed vi sciu, ke tiu admono volas averti vin nur kontraŭ *malbona karmo*. –

Ne pli frue vi povas trovi en la regno de la substanca spirito vian *malligon*, ol kiam konsumiĝis la lasta *terligita* impulso iam elirinta de vi. — —

Penu do per ĉiuj viaj fortoj *unuigi vin kun via Dio jam dum via surtera vivo*, por *distranĉi* per *lia* forto la katenon de via „karmo“, por ke ĝi ne tenu vin *ligita* dum eonoj.

Milito kaj paco

Kiu unufoje ekkonis la formantajn fortojn en tiu ĉi fenomenaj mondo de fizika materio *en ilia terura potenco* kaj en la *nepriskribebbla simpleco* de ilia senindulga volostrebado, – tiu tuj *perdas* la supraĵan trompiĝon, ke la sense perceptebla universo videble reprezentas nur „*la harmonion de la spirito*“. – –

Rigardu la *ikneŭmonoidon*, kiu devas meti ovon sian *en la korpon de vivanta raŭpo*, por ke la ido venu en la vivon per la turmentoplena morto de la raŭpo, – kaj vi estos por ĉiam *kuracita* je tia iluzio.–

La sense perceptebla mondo estas *efiko* de spirita praforto en la *spirita* mondo.

Sed por spirite *manifestiĝi* kiel *spirita* mondo, la unu eterna praforto devas sin *reflekti en si mem* en infinitoblaj *aspektoj* de si mem, kaj devas, estiĝinte kiel *elemento* de praesto en ĉiu tia aspekto, *sekurigi sian ekziston* en ĝi tiumaniere, ke ĉiu *unuopa* elemento celas agi *nur por si mem*, tiel ke ĉiuj *aliaj* praesto-elementoj estas al ĝi kvazaŭ *malplenaj formoj*, ĉar ĝi konas sin mem kiel praforton *nur en si mem*.

Ĉiu aspekto de la spirita praforto – ĉiu „*praesto-elemento*“ – tial fariĝas la *kaŭzo* por tio, ke ankaŭ la fenomenaj formoj de ĝia *efiko* en la *fizika* regiono ricevas la instinkton *vivi nur por si mem* kaj konsumi ĉiun alian fenomenan formon por konservi sian propran ekziston.

En ĉiu praesto-elemento estas praforto *nedividita*, ĉu ĝi estas kaŭzo de *plej malalta* aŭ *plej alta* fenomenaj formoj en sia *efiko*.

Tiel okazas, ke ankaŭ ĉiu *fizika* forto, ĉiu *fizika* fenomenaj formoj celas *agi por si mem*, kvazaŭ *nur ĝia propra* kaj *neniu alia* ekzisto estus intencita.

La eta *ĉelo* agas *nur por si mem*, eĉ se ĝi portempe estas *devigita* servi al *pli alta* formvolo kune kun miliardoj de samspecaj ĉeloj, kaj al tiu pli alta formvolo ĝi havas valoron *nur tiugrade*, en kiu tiu formvolo *bezonas* kaj *konsumas* tiun ĉelon por *sekurigi sian propran ekziston*. –

La fizikasense perceptebla universo estas *la ekstrema kontraŭpoluso* de spirita esto.

La „*vivo*“ de la spirito *kondiĉas* infinitoblan *spiritan* formadon *en ĝi mem*, rezultantan en *praesto-elementoj*, kaj ties *efiko* siaflanke *kondiĉas* fine la kvazaŭ „*rigidiĝintan*“ fizikan fenomenaron: senfine „*etendita*“ spirita forto en stato de *kateniteco*, de

relativa *senpoveco*, de *ligiteco en rigide determinita formvolo*.

Sed el tiu, al ili *plej malkonforma* formo de *eten-diĝo* kaj *rigida kateniteco en ekstrema streĉiĝo*, tiuj spiritaj fortoj ree *leviĝas*, rezulte de plej potenca altiĝo el la regiono de *plej alta* spirita esto, al novaj, *malpli* densaj kaj rigidaj formoj, ĝis ili, en nenombrelaj ŝanĝoj, fariĝas pli kaj pli liberaj de etenda streĉiĝo kaj fine sentas sin tiregataj supren *en ilian originan staton en la plej interna vivo de l' spirito*.

Tio, kion ni povas *percepti per niaj fizikaj sensoj*, *ne* estas la formoj de la praesto-elementoj, sed nur la *rezultoj estigitaj per la efiko de iliaj fortoj*.

Sed *en nia interno* la *praesto-elementoj* fariĝas percepteblaj al ni en *tre alta* formo: – en la formo de niaj „*animo-elementoj*“.

Tio estas la *eterna*, – eterne *renoviĝanta* – ciclo de la „*vivo*“ en la substanco *spirito* „*estanta*“ el si mem.

Fariĝante „*nutraĵo*“ al si mem, ĝi mallevas sin en si mem, por relevi kaj reenpreni sin en sian plej altan formon de esto liberan de ĉiu rigida form-streĉiĝo. – –

Nur per tiu ĉi „*eterna vivo*“ povas „*Dio*“ formi sin en la spirito, – *en la spirita* „*homo*“. – – –

Se ne ekzistus la *herbeto* je la vojo, kaj ne la *vermo* manĝanta la radikon de la herbeto, tiam ankaŭ *vi* ne ekzistus, kaj ne ekzistus *la spirito* kaj ne *Dio* en la *spirito*.

Se ne ekzistus la *mikrobo*, kiu eble morgaŭ komencas *detrui* vian korpon, – tiam ankaŭ *via korpo* ne ekzistus, kaj ne *via animo*, kaj ne *la spirita fajrero*, kiu sin *spertas* en *vi*.

Sed tiam ankaŭ ne ekzistus la *volo* de la spirito, kiu iam estis formiĝinta en *via spirito* kiel *via Dio* kaj nun volas *denove* „naski“ sin en *vi* kiel vian Dion.

Kiom ajn furioze la fortoj en la fizika universo sin interbatalas en sia instinkto de memkonservado, la naturo tamen ne konas „*malamon*“. –

Estas malsaĝe kompari la homan malamon kun la instinkto de tiuj animaloj, kiuj celas neniigi aliajn animalojn, ĉar ili – kiel *ĉiu* formo, en kies manifestiĝo sin spertas praesto-elementoj – celas nur konservi *sin mem*.

Sed „malamo“ estas esprimo de *homa* senhelpa *senpoveco*.

Nur post transmeto de homa sentomaniero al la animalo, estas eble nomi esprimon de la atakinstinkto de incititaj animaloj „malamo“, kaj facile estas ekkoneble, ke eraras ĉiu, kiu opinias, ke la

sama sento, kiun oni en la homo nomas „malamo“, estas trovebla en animaloj.

Eĉ en la *nevideblajn* regionojn de la fizika mondo la *homo* enportis la *malamon*, ĉar ankaŭ liaj plej grandaj aliaj *malamikoj* en la nevidebla fizika sfero *ne kapablas* senti *malamon*, kaj ilia strebado *malamika* al la homo originas el *treege aliaj* motivoj.

La *plej teruraj* demonoj en la nevidebla fizika sfero iam estis *teraj homoj*, kiuj per sia surtera vivo „*juĝis*“ *sin mem*.

Kiom alten ili iam estis spirite levintaj sin, tiom profunden ili nun estas subiĝintaj sub la plej mizeran el la *teraj homoj*.

Eble eonoj pasos, antaŭ ol ili fine povas finiĝi en *neniigo*, – sed antaŭe ili penas *tiri malsupren al si* ĉion, kio fariĝas *atingebla* al ilia malamo.

Ankaŭ tiuj nevideblaj *memjuĝitoj* estas incitataj al sia horora malamo nur per la sentado de sia *senpotenceco*. –

Sed *potenco* estas la plej superega *venkanto* de la malamo.

La *potenculo* *konscia* de sia potenco *amas* sian potencon, kaj tiu ĉi iom post iom faras lin *amanto*.

Sed amo *ne toleras* *malamon*.

Ju pli la homaro, en siaj grupoj nomitaj „popoloj“ kaj „nacioj“, vekigis al la konscio de sia *spirita potenco*, des pli malaperos la malamo, ĉar homo

konscia de sia potenco *ne envias* alian potenculon pro ties potenco, – sed envio tro ofte estas la infera *vekanto* de malamo.

Malamo estas la patro de ĉiuj militoj, kaj homo, kiu *ne povas malami*, *ne* taŭgas por esti militisto. –

Vi ankoraŭ vokas: „Milito kontraŭ la milito!“ – – sed mi konsilas al vi voki prefere:

„*Malestimata estu ekde nun la malamo!*“

Nur kiam fariĝas malestiminda la *malamo*, venos ankaŭ la tempo, kiu instruos al vi malestimigi la *militon*. – – –

Nur kiam estas *malestiminda* al vi ĉiu, kiu ankoraŭ volas, ke *per amasa murdado de homoj* estu decidata tio, kio devus esti decidata per *argumento* kaj *kontraŭargumento* antaŭ la intelekto de juraj spertuloj, – *nur tiam* la homo de la tero rajtos glori sin pro sia „*homa digno*“.

Probable ĉiam estiĝos *kontraŭaĵoj* en la opinioj de homoj, ĉar ankaŭ tie ĉi *unu* volo staras kontraŭ *alia* volo, kaj ĉiu volo celas agi sole por *si mem*.

Sed en la homa spirito la volo estas kapabla *rekoni* sin ankaŭ en la volo de *aliulo*, kaj tial la homo povas konscie serĉi *ekvilibrigan interkonsenton*, kiu gardas la pacon per *disciplinado de la volo*, kiu tiam volas ne plu *nur sin mem*, sed ankaŭ la *alian* volon. – – –

Antaŭ ol *ĉiu unuopulo neniigis* en si la *malamon*, tiu *ĉi* vojo de disciplinado de la volo *ĉiam* restos irebla al la homaro *nur dum mallongaj tempoj*. –

La sekvo estos *ĉiam* denove *militoj*, *ĝis eĉ la lasta iometo da malamo ne plu trovas iun lokon en homa koro*. –

Ĉiuj aliaj instinktoj strebantaj al milito estas *venkeblaj*, se ekzistas bona volo, sed la ondegtoj de *malamo* tiros eĉ la plej bonan volon en siajn vorticojn kaj abismojn.

Kontraŭaĵoj kaj konkuroj inter argumento kaj kontraŭargumento estigas diversajn fortojn kaj progresigas la fluon de l' vivo, – sed ili tute ne devas sekvi *militon*, same kiel la *venkinto en ludo* tute ne devas *batmortigi* sian venkitan kontraŭulon. – –

Sed *ĉiu* tera homo, celanta neniigi en si la *malamon*, tiel faras la solan „*justan*“ militon, – la militon, kiu iam *malebligis hommurdajn militojn*. – – –

Sed ankaŭ la fina venko de la homa spirito super la murdmilitoj *ne* povas ebligi, ke la reciproke kontraŭaj fortoj, agantaj en la tuta fizika naturo, povus unuiĝi al la *sama* direkto de strebado, ĉar tia strebado signifus la *neniigon de tiu ĉi tuta fizika universo*.

La regno de „eterna *paco*“, kiun tiom multaj noblaj homoj arde sopiris ekde antikva tempo, estos

donata al ni homaj spiritoj ne pli frue ol tiam, kiam
ni – *post* tiu ĉi surtera vivo – denove troviĝas en tiu
lumo, kiu unuigas por eterne ĉion, kio iam estis
unuigita kun ĝi. – –

La unueco de la religioj

En ĉiuj religiaj instruoj de la mondo, en ilia kerno, troviĝas *la fina vero*, kvankam tiu kerno ofte portas tre strangajn kovraĵojn.

Senutile, vane kaj malgrave estas disputi pri tio, kie la vero eble estas ankoraŭ *plej pure* ekkonebla.

Kiu scias zorge *forigi* ĉiujn kovraĵojn, tiu fine trovos en ĉiuj „religioj“ indaj je tiu ĉi nomo la grandan instruon *pri la eterna spiritohomo*, kiu iam estis *unuigita kun sia Dio kaj defalis de li*, ĉar *en sia „mi“ li malligis sin de sia Dio*. –

„Vojo“ estas proklamata al li, kiu rekondukas lin *supren*, por ke li *denove atingu* sian Dion en si mem, en la propra „mi“. –

Sed ĉar tiu instruo estas multe tro *spirita* kaj multe tro *simpla*, ol ke ĝi estus facile kaptebla al la homo enprofundiĝinta en komplika kulto al la sensoj, li mem volvis plej strangajn branĉetojn ĉirkaŭ tiujn finajn, plej profundajn veron kaj malligo-instruon, ĝis pro tiu tuta branĉetaro, plena de fruktoj de arogita graveco, li fine ne plu povis trovi *la vero-instruon mem*. – –

Li ankoraŭ *malklare scietas*, ke *malantaŭ* tiu branĉetaro kaj ties tro ŝvelintaj fruktoj *la vero* estis

iam videbla, kaj tial li alkroĉiĝas kun tenaca obstino, kiun li nomas „*sia kredo*“, al tiu branĉetaro, per kiu li antaŭ longa tempo kovris la veron – aŭ de kiu li lasis ĝin plene *ĉirkaŭkreski*.

En multaj altaj instruoj de malnovaj religioj oni ree kaj ree trovos ankaŭ diversmaniere vualitan sciigon pri kelkaj *spiritoj*, kiuj *ne* subiĝis al la falo en la mallumon kaj iumaniere agadas sur tiu ĉi tero, kiel altaj *helpantoj* de siaj gefratoj en la tenebro, por malligi ilin el la kateno de ilia tera animaleco .

La malnovaj religiaj legendoj raportas, kiel tiuj spirita helpantoj de siaj homaj gefratoj iam kaj iam aperis ankaŭ en *videbla* formo, aŭ kiel ili elektis el inter la „justuloj“ siajn senditojn, kiuj *siaflanke*, en sia tera ĉirkaŭaĵo, estis disvastigontaj la „*lumon*“ inter la homoj timantaj en la mallumo.

Tre ofte oni trovas vorton pri *sanktejo sur altaj montoj*, – pri la *monto de savo*, kaj pri „*sanktaj montoj*“, de kie venas *helpo*.

Tiuj kaj multaj aliaj altsignifaj vortoj troviĝas en la sanktaj libroj de ĉiuj malnovaj religioj, sed *oni ne plu scias*, kion ili volas diri al ni, oni rigardas ilin kiel *alegoriajn parolbildojn*, aŭ plejfavoraokaze kiel *simbolojn*, kaj tiel misinterpretas *klaraĵon*, mem farante ĝin *eraro*.

Sed la saĝo de ĉiuj malnovaj religioj *origine* venis nur de la instruado de la homo *fare de liaj altaj fratoj* en la eterna „*lumo*“, *restintaj en la spirito*.

Iliaj „filoj“ kaj „fratoj“ en la spirito, elektitaj el inter teraj homoj, iam penis esprimi tiun unu veron en plej diversaj formoj, por alporti la „lumon“ al ĉiu aparta speco de la tera homo en la maniero konforma al ĝi.

Ilia helpanta forto estis la bazo de ĉiuj ĉi formoj de proklamo.

Tie ĉi estas montrita tiu *unu* „prafonto“, el kiu originas ĉiuj malnovaj, veraj religioj de la tera homaro. — — —

Sed kie estas la *hodiaŭaj instruistoj* de tiuj religioj, kiuj ankoraŭ *scias*, kion ili diras per la vortoj de malnovaj tekstoj? — —

Sed ankaŭ *hodiaŭ*, kiel pasintece, la altaj *spiritaj helpantoj* — niaj nefalintaj fratoj — vivas sur la tero, *spiritaforme en eterna spirita substanco*, kaj ankaŭ hodiaŭ, kiel antikvatempe, ili incas pri la aferoj de spirita okazado kaj pri la fina praa vero tiun, kiun post ties falo el la lumo ili trovis tuj preta fariĝi estontece ilia „filo“ kaj „frato“ en la videbla mondo.

La tera homo estas falinta *multe tro profunden*, ol ke li estus *atingebla* de la *plej altaj*, neniam falintaj spiritaj helpantoj *sen interŝtupo*. –

Tial ili preparas tiujn homajn spiritojn, kiuj post sia surtera naskiĝo, eniĝinte en la teran korpon, povas formi por ili tian „interŝtupon“.

En kaj per ili tiuj *plej altaj* helpantoj agadas, por ke la homaro de tiu ĉi tero neniam restu sen ilia helpo. – – –

Estis *neniu* tempo, en kiu tiaj helpantaj, agantaj fratoj en tera korpo *ne* ekzistis.

Ili estis troveblaj en ĉiuj popoloj.

Kiu havas orelojn por aŭdi, tiu aŭdos el ĉiuj tempoj vortojn, kiujn „karno kaj sango“ ne povus malkaŝi.

Kiu volas atingi la veron, tiu *aŭskultu* tiajn vortojn.

Ili komprenigos al li iun aŭ alian sekreton, – kaj forigos diversajn kovraĵojn, kiuj ankoraŭ kaŝis al lia ekkono finan saĝon. – –

Estas bezonata nur malmulta sagaceco por distingi la falsajn profetojn, kiuj kriadis sur la foirejoj kaj tamen havas mizeran malmulton por diri, disde la fratoj de la lumantoj de la pralumo.

Kie *nova sekto*, eble fiere nomanta sin nova „*religio*“, estas konstruata sur iuj ruineroj de malnovaj

temploj, tie vi *neniam* devas supozi, ke *la lumantoj de la pralumo* povus esti kaŝitaj malantaŭ tia agado.

Multe pli prave vi povas supozi, ke agas en tiaj fondiĝoj la princoj de la abismo en la nevidebla sfero de la fizika mondo: la servutuloj kaj vasaloj de la „princo de la mallumo“, eĉ se nur „*amo*“ estas predikata kaj multaj solenaj, „grandaj“ paroloj sonas vasten.

Sed tio, kion la *agantoj de la lumo* havas por doni al vi, venas hodiaŭ, kiam vi havas *supermezuran abundon* da „religioj“ kaj de ĉio nomata de vi „religio“, certe ne kiel „*nova religio*“ al vi.

Sed ĝi estas la *sama vero*, kiu kaŝiĝas en la plej interna kerno de la *malnovaj, veraj* religioj. — —

Sed oni forigas la *ŝelojn* disde tiu kerno, kaj montras al vi tion, kion vi jam de longe *ne plu scias interpreti* kiel „religion“, en *novaj, klare interpreteblaj bildoj* adekvataj al via kaj al la *sekvonta* tempoj, tiel ke vi denove povas respektoplene kliniĝi antaŭ *tio*, kion ĉiuj veraj religioj *entenas en si*. — —

La „*nudan*“ veron ne povas montri al vi eĉ lumanto de la pralumo.

Tiun veron *vi mem* devas senvualigi en la kvieto, — *en vi mem*.

Nur *en vi mem* plej alta miraklo povas atesti sin en *realo*.

Nur en la propra „*mi*“ vi povas iam *retrovi* tion, kion vi *perdis antaŭ* via surtera vivo. — — —

Vi estas ne nur la pli inteligentaj animaloj de tiu ĉi tero, kiuj en viaj okuloj vi estas laŭ via ekstera naturo kaj via historio. — —

En vi estas kaŝitaj *aferoj pli altaj kaj pli malaltaj*.

Vi kutimas nomi *vin mem* per la vorteto „*mi*“.

Sed vi ankoraŭ ne scias, *kio estas „mi“* en vi mem, — — ĉar „*mi*“ estas *senfina kaj spertebla en nenombreblaj ŝtupoj de konscia esto*.

Ĉiu tia „ŝtupo“ *eterne* vidos novan kaj novan, pli altan ŝtupon de spertado *super* si.

Ĉiu tia „ŝtupo“ vidas nenombreble multajn ŝtupojn *sub* si, enigitajn en plej profundajn profundajojn.

Sed vi ankoraŭ vivas *kiel la animaloj, en kiuj ne ekzistas la „mi“*, — kvankam via vivo estas ornamita per „*scienco*“ kaj „*arto*“, kaj via ekzisto jam supersufiĉe *saturita de ĝuo*.

Kiam vi iam *ekkonos vin mem*, tiam vi povos memori nur kun *hororo kaj tremo* la tagojn, kiujn vi hodiaŭ travivas naive kaj tre facilanime, kvazaŭ ĉiom de la esto estus entenata por vi *sole en ili*.

La volo al lumo

Mi scias, ke legos tiujn vortojn multaj homoj, al kiuj ili rivelas mondon, kiu ŝajnas al ili *tro fremda* kaj ĝenas ilian propran mondobildon sagace *elpensitan*, aŭ obstine *kredatan* kiel vera, tiel ke ili malamike rifuzas tion, kio tie ĉi – ne tute hazarde – atingas ilin.

Ke ili eble malamike kontraŭas tiun mondon, *apenaŭ malhelpos* la *realon resti* tia, kia ĝi *estas* kaj ĉiam *estis* kaj *devas* esti. –

Oni ne trompu sin.

Ĉi tie parolas ne fantaziulo priskribanta siajn ekstazajn revojn.

Ĉi tie parolas ne poeto volanta priskribi siajn viziojn.

Kio estas donata ĉi tie, estas sekura *gvidado*, kaj ĉiu vorto estas bazita en plej profunda *realo*.

Kiu ĝis nun ankoraŭ *ne povis ekkoni* tiun realon, povas *lerni ekkoni* ĝin, kaj la „vojo“ al tiu ekkono, kiu alte *superas* kaj *en si ampleksas* ĉiun *alian* ekkonadon, estas montrata al li ĉi tie.

Ĉiu agos prudente, se li dekomence kalkulas je tio, ke la *praaj aferoj* de spirita okazado, tralumitaj en tiu ĉi libro de diversaj flankoj, estas *realaĵoj*, –

multe pli „realaj“ ol ĉio, kion la ĉiutaga lingvouzo nomas „reala“, – kaj ke ili okazadas konstante, eĉ se la tera homo ankoraŭ scias nenion pri ili, – eĉ se li ne inklinas agnoski ilian okazadon.

Tio certe sekvigos *konsekvencojn* por iu, kiu nun aŭdas pri tiuj aferoj, sed li nur utilos *al si mem*, se li lernas ekkoni la „realon“ *en si* kaj tiam certe ne plu restas en dubo, ke tio, kion li ĝis nun nomis sia „mondobildo“, estis nur *iluziaĵo*, eĉ se ĝi *ŝajnis* al li tre „vera“, ĉar li fidis la *eksteran ŝajnon*, – eĉ se li kredis, ke la spegulaj refleктаĵoj de lia *pensado* jam estas *lumigitaj* el lia *plejinterno*.

„*Nemoviĝo estas regreso*“, diras proverbo, – sed reale *nemoviĝo* estas multe pli *malbona* ol regreso, ĉar ankaŭ regreso povas konduki *al novaj valoroj*, neatingeblaj por tiu, kiu estas tro malvigla aŭ tro obstina por *forlasi* sian „starpunkton“ por serĉado. – –

Sed kiu timas la *regreson*, tiu ankaŭ havas plenan kaŭzon por konfidi al la *progreso* nur *kun kelka suspektemo*.

Ne ekzistas senlima progreso sur tiu ĉi tero.

Ĉiu homa disvolviĝo estas submetita al la leĝo de ondado. –

La homoj nuntempaj *perdis* multajn scion kaj povon, kiujn iliaj foraj antaŭuloj rigardis kiel „*neper-*

deblajn“, – kaj tie, kie tiuj antaŭuloj sciis nur *tre malmulte*, povis nur *tre malmulte*, oni hodiaŭ atingis altajn scion kaj povon.

Sed la naturo ne toleras nemoviĝadon.

„Mi volus, ke vi estu aŭ *malvarma* aŭ *varmega*. – Tial, ĉar vi estas *varmeta*, mi *elsputos* vin el mia buŝo.“

Tiel parolis la eterna „leĝo“ en ĉiuj tempoj, kaj ankaŭ hodiaŭ ĝi ne estas ŝanĝinta siajn parolojn.

Kiu spirite restas en mallumo, tiu ankoraŭ ne havas la *volon* al lumo.

Li „*deziras*“ esti en la lumo, pri kiu li aŭdas aliajn paroli, – sed li ankoraŭ ne *volas*.

Tuj kiam li vere *volas*, li *jam estas ekirinta* la „vojon“ kondukantan al la lumo. –

Se la lumo de l’ spirito estas por vi „*valoro*“, por kiu vi *volas uzi vian tutan forton*, tiam vi *certe* povos iam *proksimiĝi* al la lumo.

Sed dum via spirita okulo ankoraŭ kuŝos sub densa kovraĵo, vi tute ne povos „*vidi*“.

Nur via *volo*, – ne via „*deziro*“, – povas *forigi* tiun densan kovraĵon. –

Se vi portas en vi la *volon al lumo*, vi certe la lumon *atingos*, – ĉu vi *proksimiĝas* al ĝi kiel homo de sopra memgardemo, aŭ kiel homo varmege ekardanta. – –

Sed *duona* volado *ne* kondukos vin al la celo.

En ĉiuj kosmaj spacoj kaj super ĉiuj steloj *ne* estas atingebla por vi *iu ekstera dio*, kiu aŭdus vian laman petadon.

Vi devas *voli helpi al vi mem*, se vi volas, ke *via Dio*, kiu estas atingebla por vi nur *en vi mem*, sendu al vi altan *helpon*, laŭ la pradeterminita ordo, kiu estas ordigita *en li*. –

En via „*mi*“ estas entenita la tuta *esto*, kaj ĉiun *ŝajnon* vi kreas al vi mem kaj nekonscie *el fortoj* de via „*mi*“. – – –

Vi mem *apartigis* vin de via Dio antaŭ via surtera vivo, kiam vi ne plu *ekkonis* lin en via „*mi*“, ĉar vi serĉis *vin mem* tie, kie sole *via Dio* estis trovebla.

Tiel „*Dio*“ fariĝis al vi „*aliulo*“ kaj vi al li „*fremda*“. – – –

Nun vi disigas vian „*mi*“ por via imago, kaj ŝajnas al vi kaŝitaj „*alta*“ kaj „*malalta*“ „*mi*“ en vi, ĉar vi ne konas *la amplekson* de via nedividita, nedividebla unu „*mi*“. –

Tamen *ne* estas „*alta*“ kaj „*malalta*“ „*mi*“ en vi, sed estas kaŝita en via unu „*mi*“ *la tuta senfineco*, kaj ĝi ampleksas la *plej profundan profundon* kaj la *plej altan alton* en la spirita mondo.

Vi mem devas elekti, – kaj vi „*elektas*“ tie ĉi nur per *agado*, – *kion* vi volas *malkaŝi* al vi mem en via „*mi*“.

En via propra senfineco, – en la centro de la *esto* ampleksita de via „*mi*“, – tiam denove „naskiĝos“ en vi *via Dio*. – – –

Eĉ tiam vi *unue* sentos lin kiel *alian* eston, ĝis vi tiam ekkonas, ke li *ampleksas vin mem en via tuta nedividita „mi“*. –

La altaj kapabloj de ekkono

Vi kredas je via „progreso“ kaj ne rimarkas, ke vi pleje moviĝas cirkle. – –

Senripoze vi penas ĉion *disfibri*, ĉion *disspliti*, ĉion *disfendi*, – kaj ĉar certe ne estas kontesteble, ke vi tiumaniere akiris ne malmultan scion, ŝajnas al vi esti certe, ke via agado iam devos konduki vin al la solvo de ĉiuj enigmoj de tiu ĉi sense perceptebla naturo.

Tamen: – ĉio disfendita estos plu disfendebla ĝis senfineco, ĉio dissplita estos plu dissplitebla ĝis senfineco, kaj ĉiam denove vi malkovros, ke el tio, kion vi rigardas kiel disfibrigitan ĝis la lasta fibro, pluaj fibroj povas esti malligataj.

Tie ĉi, la limo de via esplorado estas determinita de via ternature kondiĉata nekapablo *plue* disfendi, *plue* disspliti, *plue* disfibri.

La devigo ĉesi determinas la rezultojn de via esplorado.

Mi vere scias, kion la homaro *ŝuldas* al tiu speco de esploro, kaj estas malproksime de mi, insulti ĉi tie la manieron de via pensado.

Tamen, – mi vidas ankaŭ la *ombran flankon* de tia agado kaj vidas, ke vi lasas vin *tro impresi* de

viaj esplorzultoj, tiel ke vi mem malproksimigas vin pli kaj pli de *alia* kaj vere *pli grava* speco de esplorado.

Laŭ via maniero vi jam multon miregindan *mal-kaŝis*, multon admirindan *inventis*.

Sed tio ne forlogu vin al la tro certa *superkredo*, ke tiel estos iam eble veni al ekkono en sferoj, kiuj *eterne ne estos alireblaj por mekanika dispartigado aŭ por esploro per iu instrumento*.

Kiam la plej malgrandaj eroj de fizika formaĵo fine fariĝis al vi kompreneblaj kaj kapteblaj, certe estas atingita la eblo, ke la intelekto nun povas tiri siajn konkludojn el mekanikaj donitaĵoj, kaj ke finfine io grava por nia ekstera vivo povas esti trovata, malkovrata kaj inventata.

Sed la *origina* esenco de tiu formaĵo, kies enigmo tiel estis solvata, *restas tiom fremda* al vi kiom antaŭe.

Mi plene respektas vian laboron kaj la rezultojn eble maturiĝontajn el ĝi, sed vi *ne estas pli proksimaj* al la „*afero en si*“, eĉ se vi ekkonas ĉiujn objektojn de la videbla mondo en iliaj plej malgrandaj eroj, kaj la mirindan *aranĝon* de tiuj eroj, – se vi *konas ĉiun efikomanieron* de tiuj eroj kaj lernas *direkti* iliajn fortojn tiel, ke ili devas efiki laŭ *via volo*.

Ne per la mikroskopo estas trovebla la „afero en si“, kaj neniam teleskopo konigos al vi, kio malproksiman mondon „kerne kunligas plej interne“. –

La instinkto de esploro estas kunnaskita en vi kaj postulas kontentigon.

Sed vi konfidis la laboron de esploro nur al la *pli subtila „animalo“* en vi, kaj lasas *la altajn fortojn de via animo*, kiuj tie ĉi povus servi vin, neatentita de vi en krepuska mallumo, sen disvolvi ĝin.

La „pli subtila animalo“ nun konstruas al si siajn pensvehiklojn kaj videblajn instrumentojn, por *larĝigi* viajn pensadon kaj esploradon ĝis senfineco, – sed viaj rezultoj kondukas nur al novaj *demandoj*, antaŭ kiuj vi devas halti en konsterniĝo.

Sed ekzistis *antikvatempe* homoj, por kiuj *via speco* de esploro estis nur *malsaĝo*, kaj kiuj per siaj plej altaj kaj unuiĝintaj animofortoj solvis la finajn, plej profundajn demandojn, *sen* via aparato. – –

Ili atingis la profundon de ĉiuj profundoj, – sed vi nur plilarĝigas la supraĵon. – – –

Vi povas inteligente diri pri ĉiuj aferoj, *pro kio* ili estas tiaj, kiaj ili montriĝas, *kial* ili unufoje okazas, aliafoje *ne*, kaj tiel plu, – sed neniam vi penetras al la lastaj kaŭzoj, ĉar tio, kion vi nomas „kaŭzoj“, ĉiam estas nur la *efikoj* de *kaŭzoj*, kaj nur *malantaŭ*

tiuj ĉi kuŝas la *veraj kaŭzoj*, kiujn neniu el vi konas laŭsperte.

Sed *la kapabloj de la animo*, – se vi lernis *regi* ilin el via „*mi*“ tiel, kiel ili *volas* esti regataj, – lumigos al vi *eĉ la finajn kaŭzojn*, ĉar ili estas *de la sama speco* kiel tiuj ĉi, kvankam *ne* de la sama *maniero de efikado*.

Sed pruvebla fariĝas *tiu ĉi speco* de „kaŭzoj“ nur al *tiuj*, kiuj *mem* jam povas uzi la kapablojn de la animo, – dum *viaj* pruvoj ja estas *pli facile* atingeblaj, kvankam ankaŭ ili estas kompreneblaj *nur al tiu*, kiu akiris la scion pri la antaŭkondiĉoj, sur kiuj la pruvoj de via speco baziĝas.

Ĉiu *forto* estas *disvolvata* nur per *uzado*.

Tial: se vi ne scias *uzi* la fortojn *de via animo* jam dekomence en malgrandaj aferoj, ili neniam plifortiĝos tiom, ke ili povas malkaŝi al vi siajn altajn miraklojn.

Ekzistas tie ĉi multaj aferoj por esti ekkonataj, kiuj vere valorus al homo la penon servi pro ili dum sia tuta vivo, eĉ se ĝi daŭrus cent jarojn sur tiu ĉi tero.

Sed vi unue devas fariĝi *simplaj*, kiaj la finaj aferoj mem estas, antaŭ ol tio plej simpla *senvualigas* sin al vi.

En via pensado vi fariĝis *multe tro komplikaj*, ol ke vi povus, *sen* akomodi vin per „nova lernado“, *spirite ekkapti* – en la plej profunda senco de tiu vorto – *ion realan*.

Tie ĉi, tera sperto alirebla al ĉiuj prezentu al vi ilustraĵon:

Antaŭ ne longa tempo, multaj aferoj ŝajnis al vi esti „*senbrida superstiĉo*“, ĝis via propra esplorado sciigis al vi, ke tiu superstiĉo tamen baziĝis sur *ekkono*, kiu antaŭe *por vi* estis *fermita*, dum *tre simple pensantaj* cerboj povis *atingi* ĝin. – –

Ĉiu probable havas sufiĉe da ekzemploj, tiel ke mi ne bezonas mencii tiajn.

Ankaŭ *nuntempe* estas ankoraŭ kaŝita – en *legendoj* kaj *mitoj*, en la kredo de popoloj, kaj eĉ en tipa popola „*superstiĉo*“ – multo, kiu iam montriĝos al tempo *estonta* kiel *plej matura ekkono*. –

Ke ĝi hodiaŭ ankoraŭ *ne* estas ekkonata *de tiuj*, kiuj serĉas ĝin „*science*“ sur *tute aliaj vojoj*, rezultas el la *terure granda komplikeco* de nia ĝenerale kutima, „*profesia*“ pensado, kiu ne plu *volas* akomodi sin al *simplaj* imagoj, ĉar ĝi ne plu *povas* akomodi sin al ili, sen forgesi la *plej grandan* parton de sia iama instruado, eĉ se tiu ĉi estis ricevata nur en „*elementa lernejo*“. – – –

Tial multaj aferoj ofte estas kvazaŭ „*sigele fermita*“ al ekstera esplorado, kaj nur *pene* oni *ekkonas malmulton de ili*.

Sed *nenio* el ĉio ĉi povas resti *kaŝita* al la *fortoj de la animo*, kondiĉe ke ili estas sufiĉe *disvolvitaj*.

Dependas de vi, ĉu viaj nepoj klinu sin nur en *estonta* tempo, kaj *devigite*, al la faktoj kiujn vi hodiaŭ ekkoni *povus*, aŭ ĉu vi volas postlasi al ili scion, kiun ili *ne* devas *korekti*.

Ankaŭ ĉiu verosciigo *subiĝinta en legendo kaj superstiĉo* iam *originis* de homoj, kiuj sciis *uzi* siajn *animofortojn*, sed la interna mallumo en tiuj, kiuj venis *post* ili, *malebligis* la komprenon de tio donita, tiel ke la origina vero estis baldaŭ superkreskita de sovaĝaj herboj de konfuzaj maldormaj sonĝoj, kaj nun apenaŭ povas esti pure malligata el la superkreskaĵo. –

Tamen, persista kaj konfidema serĉado en la animo malfermos al ĉiu serĉanto la *saman* fonton, el kiu ĉerpis en si *la saĝuloj de fora antikveco*, kaj li tiam kun plena klareco *posedas en si* tion, kio apenaŭ estas ekkonebla sub la superkreskaĵo de superstiĉo, sed kio tiam fariĝas ekkonebla al li el *propra* sperto. –

Sed sen persista serĉado en via *propra interno*, – kun la *sama* kuraĝo kaj la *sama* persisteco, kun kiuj

vi hodiaŭ ankoraŭ serĉas *ekstere*, – *neniam* povos *malkaŝiĝi* al vi tio, kion *kapablas* tiuj fortoj kaŝitaj *en vi mem*. – –

Vi estas gardantoj de plej altaj „*miraklaj fortoj*“, – dum vi klopodas ekstere pri mizera gajno.

La altaj kapabloj de ekkono, al kiuj mi provas direkti vian atenton, estas en *ĉiu* homo, – sed ili dormas profundan dormon, ĝis la posedanto *vekas* ilin en si mem kaj *unuigas* ilin *kun sia volo*.

La plej multaj homoj pretigas sin por sia lasta dormo, sen esti eĉ nur *plej ete suspektintaj*, *kiajn trezorojn* ilia animo prezentis al ili.

Bone estas al tiu, kiu scias vekti en si ĝiajn fortojn de ekkono en la ĝusta tempo.

Li *trovos sian veran vivon jam ĉi tie sur la tero*, kaj *ekkonos tion senmortan en si*, dum li ankoraŭ *vivas en sia mortema korpo*. – –

Sed tio estas la *fina celo* de ĉiu spirita instruado, ĉar kion utilis paroli pri *io spirita* posedata de ni por eterne, se tio spirita estus tiom malproksima al la spertokapablo de l' tera homo, ke li ne povus ekkoni ĝin jam dum sia surtera vivo! – –

Nur *tio*, kio fariĝis al ni *travivaĵo* jam *en nia surtera vivo*, povas gvidi nin kaj komprenigi al ni *novan vivon*, kiam ni *forlasos* ĉi tiun fizikan mondon.

Pri la morto

Ĉi tie ni staras antaŭ la malluma pordo, tra kiu la homoj devas paŝi, kiam ili forlasas la surteran vivon por ĉiam.

Oni *esperigis* vin pri multo, oni *minacis* vin per multo, kio laŭdire estas malantaŭ tiu pordo.

Mi ne scias, al *kiu* el tiuj instruoj vi eble kredas.

Sed ĉiuj instruoj – devigite de ĉiutaga sperto – estos en konsento pri tiu ĉi punkto: ke vi neniam povos reveni *en via hodiaŭa korpo*, kiam vi estos forlasinta ĝin. –

Multaj diras al vi, ke vi *revenos en nova korpo*, en *estonta* tempo, kaj ili elpensis al si belegan „regularon“, laŭ kiu la *tempo* de via reveno en teran korpon laŭ ilia diro determiniĝas.

Aliaj diras, ke samtempe kun la morto de via tera korpo vi estas *neniigita por ĉiam*, ĉar ili konfidas nur al la *ŝajno*, kiu montras al ili post la morto de tera homo nur rigidan „*kadavron*“, kaj krom tio *nenion*, el kio ili povus konkludi, ke tiu homo estas ankoraŭ iel *viva*.

Ambaŭ kredmanieroj eraras.

Vi mem apenaŭ revenos, sed neniu scias, kiom de viaj *animoelementoj* vi estonte, *unuigitaj kun vi*, povos al vi *konservi*, kiam vi forlasos la surteran vivon.

Tiujn el ili, kiujn vi ne *unuigis* kun vi, vi devos *forlasi* kiel la teran korpon, kaj kiel la fortoj de tiu tera korpo, malligataj el ilia portempa formo, tuj transiras en *aliajn* vivoformojn, tiel ankaŭ la *animoelementoj* postlasitaj de vi serĉas al si sferon de efikado en alia tera homo.

Ankaŭ en vi hodiaŭ agadas multaj animoelementoj, kiuj *antaŭ* via surtera vivo agadis en *aliaj* homoj.

Tial oni plenrajte povus diferencigi inter „*anime pli junaj*“ kaj „*anime pli maljunaj*“ homoj, depende de la daŭro, dum kiu iliaj animoelementoj jam agadis en pli fruaj homoj.

Inter la homoj hodiaŭ samtempe vivantaj sur la tero kaj aĝantaj la saman nombron da jaroj ekzistas multaj kun multe „*pli junaj*“ animoelementoj ol la maĵorio, same kiel ekzistas ne malmultaj kun multe „*pli maljunaj*“ animoelementoj.

Ĉiun el tiuj specialaj kazoj oni povos ekkoni eĉ *en la ekstera* vivo per tio, ke la koncerna homo havas surprize *aliajn* sentojn ol la plej granda nombro de siaj kunhomoj kaj samaĝuloj, – ke li kvazaŭ „*elfalas*“ el sia tempo, kaj havas inklinojn,

kiuj estus konformiĝintaj *al tempo apenaŭ pasinta*, aŭ inklinojn, kiuj provas efiki *laŭ longe pasinta* kulturepoko. Tio ne ekskluzivas la eblon, ke *ambaŭ* specoj kapablas agadi, dum la tempo de sia *surtera vivo*, plene *laŭ tiu tempo*, kaj ofte donas al ĝi *altajn valorojn*.

La abundo de la elementoj formantaj vian animon konstante ŝanĝiĝas, dum vi vivas en via korpo.

Jen *pli*, jen *malpli* animoelementoj agadas en vi.

Se vi perdas homon por la tempo de via surtera vivo per ties morto, homon kiun vi sentas „*anime proksima*“ al vi, vi preskaŭ certe ricevas „*heredaĵon*“ de liaj animoelementoj, – ĉar *ekstreme raraj* estas *tiuj* homoj, kiuj povas „preni kun si“ en sian postsurteran vivon *ĉiom* de la animoelementoj, kiuj efikadis en ili, kaj kiujn ili *unuigis en si, mem unuigitaj kun sia Dio*.

La plej multaj el tiuj mortantaj postlasas grandan „heredaĵon“. –

Por la *spirita* okulo via „animo“ estas *lumanta, vivanta „nubo“ formita el nenombreblaj radiantaj „punktoj“* – viaj animo-*elementoj*, – kaj tiu luma nuboj estas *en konstanta ŝanĝiĝo* dum via tuta surtera vivo.

Sed ne *la grandega abundo* de viaj animoelementoj konsistigas la „riĉecon“ de via animo, sed *la*

unuigo de la animoelementoj agantaj en via „*mi*“, en via spirite generita *volo*. –

Vi *konservos kiel daŭran posedaĵon nur tiujn* animoelementojn, kiujn vi estos *unuigita* en vi, kiam venas via horo por forlasi tiun ĉi surteran vivon.

Se vi ĉi *tie sur la tero* ankoraŭ ne *unuigis* vin kun via Dio, vi ankaŭ *post la morto de via tera korpo* ankoraŭ ne estos unuigita kun li.

Vi tiam vivos kiel „*mi*“ en la ĉion ampleksanta spirito, *en via substanta spirita formo*. De tio, kiom da *spirita* posedaĵo vi agade akiris dum la surtera vivo, dependos, kia tiu formo estos kaj kian potencon vi posedos por via agado en ĝi.

Sub alta gvidado vi paŝos plue sur via „vojo“, ĝis iam *via Dio* povas formi sin en vi.

Sed tiuokaze la tempo ĝis tiu unuiĝo aperos kiel „*eterneco*“, ĉar ankaŭ en la spirita esto, la esto *sen tera korpo*, ekzistas analogiĝo al la ĉi-tiea sento de spaco kaj tempo.

Sed tiam mankos al vi la potenco, plue *ŝanĝi* laŭ via volo la regnon de animoelementoj restintan al vi, en kiu, kaj sole per kies efikadaj donitaĵoj via spirita *spertado* fariĝas ebla.

Vi nun devas *eterne* esti kontenta pri la animoelementoj, kiujn vi sukcesis *unuigi* kun vi dum via tera vivo.

Sed *neniam* iu homa „*mi*“, *kiom ajn malriĉa je animoelementoj* ĝi eniris en la vivon de l' spirito por tie iri ĝisfine sian „*vojon*“ al Dio, *sentos eĉ la plej malgrandan „sopiron“* povi *reiri* en la *terkorpan vivon*, – kion ajn ĝi devis postlasi en ĝi.

Tamen *ekzistas* tia, ŝanĝita reveno, – sed nur en tri specialaj kazoj:

Por *tiuj*, kiuj devas suferi ĝin *kiel sekvon de sia malbona agado* dum la surtera vivo.

Por *tiuj*, kiuj *malhelpis sian korpon plu vivi kaj travivi*, tial ke ili opiniis povi per la morto eligi sin el turmento ŝajnanta netolerebla aŭ el iuj mizeroj.

Kaj fine por *tiuj*, kies vivodaŭro sur la tero estis *tro mallonga*, ol ke ili estus povintaj unuigi al sia volo iuj animoelementoj, tiel ke ili devus resti nekapablaj atingi spiritan *spertadon*, se ne estus prezentata al ili duafoje la eblo akiri animoelementojn, eblo, kiun prezentas nur la *surtera vivo*.

La sama kaŭzo estas decida por la *unua kaj dua* kategorioj, kie temas aŭ pri „*mi*“, kiu eĉ dum sufiĉe longa surtera vivo povis unuigi al si neniom da animoelementoj, ĉar *tio animala* en ĝia surtera portanto *sufokis* tiun volon, – aŭ pri „*mi*“, kiu *fordonis*

ĉiujn siajn, jam kun ĝi unuigitajn animoelementojn en la momento, en kiu ĝi subfalas al la *pensa devigo neniigi* sian surteran portanton, kiu estis ĝia portempa organismo por memmanifestiĝo.

Al la homoj, por kiuj mi skribis tiujn instruojn, eble sufiĉas nun scii, ke ili *nur pro sia propra kulpo* povas veni en la situacion devi suferi *duan fojon* la mizerojn de la vivo en animaleca korpo elmetata al ĉiuj fizika-materiaj influoj.

La homaj spiritoj *tro frue* perdintaj *sian surteran memmanifestiĝan organismon*, sekve de neŝanĝeblaj fizikaj leĝoj, povas reakiri ĝin *duan fojon*, – kaj, se *ankaŭ tiu dua fojo* estus *vanigita* de la efiko de fizikaj leĝoj, eĉ *plurajn fojojn*, kio eventuale aplikiĝas ankaŭ al la *unua kaj dua* kategorioj. Kiu nun komencis ekscieti, kion la surtera vivo signifas por la „reveno“ de la iam „falinta“ homa spirito al sia prahejmlando, tiu povos, *dankante* en sia koro, senti tiujn eblecojn nur kiel la necesan sekvon de l’ efikado de la *amo*, kiu *ampleksas* ĉion spiritan, eĉ se ĝi *falis profunden*.

Ĉiu leganta ĉi tiujn vortojn konservu ilin en si, kaj tiam pli kaj pli lernu ekkoni, ke *lia surtera ekzistado* donas al li la grandegan *potencon mem determini sian pluan sorton*.

Kiel tiu potenco povas esti ĝuste uzata, tion montras tiu ĉi libro.

Neniu zorge maltrankviliĝu pri la mortintoj, kiuj „transiris“ *sen* esti progresinta dum sia surtera vivo tiom, ke *ilia Dio* povis „naski“ sin en ili, – ke ili, kune kun la animoelementoj unuigitaj al sia „*mi*“, povis *unuigi sin al sia Dio*.

La eterna *amo* vere ampleksas ankaŭ ilin.

Iliaj plej fidelaj helpantoj estas *ĉiuj*, kiuj iam *atingis* sian unuiĝon kun sia Dio, ĉar ĉiuj animoelementoj „kuntuŝiĝas“ en la regno de la substanca spirito, kaj kion la kun Dio unuiĝintaj jam *akiris* surtere kaj kion ili *akiras* en la spirito, tio estas plue „kondukata“ ankaŭ al ili, en kies „*mi*“ ilia Dio *ankoraŭ ne* „naskiĝis“. – –

Samtempe tiu helpo estas direktata de la *nefalintoj*, kiuj en la regno de la spirito *gvidas* la iam falintajn homajn spiritojn *returne al la pralumo* en la sama maniero, kiel ankaŭ tie ĉi sur la tero, kiam ajn ili trovas en homo la *volon* reiri.

Vi penu *atingi vian plej altan celon* jam dum via surtera vivo, sed ne timu pro *tiuj*, kiuj ne povis atingi ĝin jam tie ĉi.

Sed vi povas doni al ili ankaŭ *vian helpon*, per tio, ke vi *plena de vivanta amo* ilin rememoras.

Ili ĉiuj iam estos *unuigitaj kun vi en ilia Dio*.

Unuigita kun via Dio, vi iam estos konscie unuigita en vi kun ĉiuj, kiujn vi povas ampleksi en via amo. — — —

Pri la spirito

Vi vivas en mondo, por kiu „*tio spirita*“ estas *intelekta laboro*.

Kion tiu ĉi mondo nomas „*spirito*“, estas *nocio kaj pensado*, aŭ eĉ: la *virtuoza kapablo* meti aferojn fore apartajn en frapantan konekson per rapide trovita penso. –

Sed por la „*spirito*“, kiu tralumas la mondon *kiel substanca realo*, ĉio, kion la hodiaŭaj homoj nomas „*spirito*“, estas nura laborilo de tera, *tro tera* ekkonado.

La mondo, en kiu vi vivas, scias nur pri la „*laborilo*“, sed kredas havi en ĝi la „*laboraĵon*“. –

Tiel la „*spirito de la mondo*“ fariĝis la blindiganto de via „*anima okulo*“.

Estos malfacile rezisti al ĝi, kiu nun *regas* vin kaj kondukas vin tien, kien *ĝi* volas vin konduki. – –

La spirito, kiu memkonscie vivas en sia propra lumo, ne estas io disŝvebanta, ne estas io, kio nur povas esti sentata en pia kredo.

Ĝi ne nur estas tiom „*reala*“ kiom arbo, ŝtono, monto, – fulmo ĵetiĝanta malsupren el nuboj, sed *sole en ĝi* nia tera nocio de „*realo*“ trovas sian *per-*

fektan konformaĵon, kiu ne estas trovebla en la tera sfero.

Se neniu afero de *relativa* realeco povas esti *ŝanĝata en si* per la *imagajo* de ĝi en homa cerbo, – kiel vi povas supozi, ke la *absoluta* realo povus ŝanĝiĝi laŭ via elpensita imagajo?

La bildoj de via imago ne tuŝas eĉ la plej malgrandan teran objekton *en la fundo de ĝia ekzisto*, kaj tiel ankaŭ *la spirito de la eterneco* vere ne lasas sin tuŝi de tio kion vi *nomas „spirito“*, tiom longe, kiom vi ankoraŭ ne povas *ekkoni en vi ĝian substancan eston*.

Eble vi *hodiaŭ* kaj *en tiu ĉi horo* vi kredas ekkoni la verecon de miaj vortoj, – sed probable jam *morgaŭ* la „spirito“ *de tiu ĉi mondo* denove trompos vin. –

Eble vi *hodiaŭ* volas *eskapi* el ĝia influo por serĉi la *realan* spiriton, – sed mi timas, ke jam *morgaŭ* vi ree estos blindigitaj de la „spirito“ *de la cerboj*. – –

Eble vi *hodiaŭ* kredas *antaŭsenti* iom de la esto de l' *substancia* spirito, – sed jam *morgaŭ* kaptos vin *malkuraĝo* kaj *dubo*, kaj vi ne plu penos serĉi tion, kion vi *hodiaŭ* kredas preskaŭ „palpeble proksima“. – –

Ĉiam vi tiel agis, kiam parolis al vi pri la spirito iu, al kiu *estis permesate* paroli *pri la spirito*

tralumanta la universon, ĉar li vivis en ĝi kaj tial povis atesti pri ĝi el propra spertado. –

Sed eble – ja estas inter vi kelkaj, kiuj estas serioze pretaj uzi ĉiujn siajn fortojn, por ke iun tagon ili mem ekkonu la realon, pri kiu mi parolas, en ĝia nedireble sublima kaj potenca simpleco. –

Al tiuj mi turnas min, ĉar nur al ili miaj vortoj povas esti utilaj.

Al vi, kiuj nun decidis doni al la „spirito“ de la cerboj ekde nun nur tion, kio estas ĝia, por ke ĝi ne povu trompi vin pri la ekkono de la eterna substanca spirito, – al vi mi tie ĉi denove diras, por ke vi martelu ĝin en viajn korojn:

Spirito ne estas io elpensita.

Spirito ne estas la forto de pensado.

Spirito estas substanca, el si mem estanta, vivanta lumo.

Ĉiuj senfinecoj estas plenaj de tiu spirito, kaj ĉio vivas el ĝi, sed la tera homo neniel povas trovi ĝin, krom: – en si mem. – – –

En vi mem ĝi estas kaj vivas, konsciente sin mem, kiel ĝi en la senfina universo, konsciente sin mem, vivigas la tutan universon.

Ĝi estas ne sole en viaj cerboj, aŭ nur en viaj „koroj“.

Kvankam la korpo de la tera homo estas de *animala* speco, tio ĉi animala mistere kaŝas en si *spiritan* organismon.

Vi mem estas „*temploj*“ de la spirito, kaj *en ĉiu membro* via, kiel *en ĉiu interna organo*, staras por ĝi *sankta ujo sur nevidebla altaro*.

Tial, antaŭ ol vi sentas *vin mem* en la *tuta korpo*, de la fingroj de l' piedoj ĝis la verto, vi neniam povos senti *la spiriton*, neniam povos *unuigi vin kun via Dio*.

Tiu memsentado tra la tuta korpo, kiu kaŝas en si sanktejon de la spirito, devas esti via plej grava tasko, kaj ĝi jam estas entenita en ĉio, kion mi diris ĝis nun, kvankam estis parolate pri tio en alia maniero. — —

Tie ĉi mi volas paroli pri tio *apartamaniere*.

Vi devas peni fariĝi *konsciaj*, *ne* nur en la *cerbo*, — *ne* nur en la „*koro*“.

Konscio vivas en vi de la *plejinterno* ĝis la *plej-ekstero* de via korpo, — eĉ en ĉiu de ties *ĉeloj*, — sed ĝi ankoraŭ ne estas unuigita kun via *mem-konscio*.

Sed se vi *volas*, kaj restas *persistaj* en via strebado, tiam vi povas iom post iom trovi en ĉiu parto de la tera korpo ties propran konscion kaj unuigi ĝin al via mi-konscio tiel, ke vi tiam *ne plu* havas *nur en*

la kapo, kaj eĉ tie nur en la cerbo, malmultan scion pri vi mem. — — —

Sed gardu vin, ke vi ne ekscitu kaj troekscitu viajn *nervojn*, — ĉar *tiun* specon de „konscio“ de via tuta korpo vi ĉiuj jam de longe konas *multe tro bone*.

Kiu en ĉiu progreso sur la vojo ne fariĝas anime *pli trankvila kaj pli klara*, tiu ne iras la *ĝustan* vojon. —

Se vi volas atingi la celon, tiam vi devas, *en plena trankvileco de la korpo kaj de la animo, de la nervoj kaj de la pensoj*, peni senti vin en ĉiu atomo de via korpo en via *anima* naturo, kiel „*animon*“ de tiu atomo, por *unuigi* al vi la *pra-animoelementon* donitan al vi *en kaj kun* ĝi.

Neniu stranga „ekzerco“ estas farenda, kaj ĉi tie neniu perforta streĉiĝo estas necesa aŭ nur utila.

Trankvila *mementsado tra la tuta korpo*, kiam ajn vi inklinas fari tion kaj via tempo permesas al vi doni vin al tiu sentado sen esti ĝenataj, montros al vi, post kelkaj semajnoj aŭ monatoj, la unuajn fruktojn.

Sed ne forgesu, ke vi lernu senti nur *vin mem* en ĉiu membro, kaj *ne la membron kiel tian*. — —

Kiam fine vi povas „*senti vin mem*“ de interne ĝis ekstere, de malsupre ĝis supre, tiam vi miregos, kaj sentos en vi kun danko kaj alta ĝojo, *kio* tiu ĉi

tera vivo *estas*, kiu ĝis nun aperas al vi tiom „neperfekta“.

Samtempe via tuta korpo spertos neatenditan *renovigon*.

Al kiu *mankas* membroj de lia korpo, tiu sciuj, ke ĉiu membro ekzistas en *spirita* substanco, eĉ se ĝi neniam ekzistis en la ekstero, – kaj ke samamaniere ĉiu membro *restas* ekzistanta en sia *spirita* formo, eĉ se ĝi estis *apartigita* disde la fizika korpo.

En la *spirita* „korpo“ ne ekzistas kripliĝo.

En sia *spirita* „korpo“ ĉiu homa spirito estas la kolektiĝa punkto de ĉiu beleco, kiun ĝi povas doni al sia „*animo*“, en kiu la spirita korpo „*spertas*“ sin, – kaj tiuj povantaj „*vidi*“ en la spirito, vidas en ĝi nur tion, kio *akiris formon pere de animoelementoj*, sed ne iun defekton de la fizike videbla fenomenforma rezultinta el *materia* efiko.

Kiam vi estas atingintaj tiun ĉi punkton, sentante vin mem *en la tuto* de via korpo *kiel tuton*, tiam vi vere scios *honor* ankaŭ la korpon, kiel la eksterajn de la „templo“, kiu entenas en si la sanktan misteron de spirita vivo vualitan al ĉiuj eksteraj sensoj, mistero, kiun *sole la homa spirito*, reirante en la lumon el kiu ĝi iam malligis sin, povas *atingi kaj sperti*.

Tamen nun devas unue elmontriĝi, ĉu la animo jam atingis tiun maturecon, kiu ebligas al la spirite „pli maljuna“ frato, kiu vidas ĝin, servi al ĝi kiel gvidanto kaj kondukanto. –

Sen li, apenaŭ iu el vi atingus jam tie ĉi surtere la konscion en la ĉion ampleksanta spirito, eĉ se la „korpo“ de la spirito jam estas konscie sentata en la tera korpo.

Neniu el viaj penoj perdiĝas, sed la premio de venko doniĝos al vi nur tiam, kiam vi estas finintaj la altan vojon, kiu estas trovebla al vi nur sub interna spirita gvidado.

Sed multo fariĝas atingebla al vi jam sole per via propra *persisteco*.

Tuj kiam vi lernis senti vin tra la tuta tera korpo en via *spirita* korpo, vi komencas, sen la neceso de aparta volado, „*spiri*“ la spiriton en vi kaj en la tuta universo, kaj por multaj tio estis tiom granda feliĉo, ke ili restadis en ĝi dum longa tempo, ekkoninte, ke ili ankoraŭ ne povos elteni *pli altan* spertadon.

Sed *prenu* senzorge tion, kion oni *donos* al vi, kaj fidu al la *leĝo de la spirito*, kiu ne konas *arbitron* kaj ĉiam efikas nur *tion plej bonan por vi*.

La vojo al la „*plej interna oriento*“, etendiĝas antaŭ vi, estante irebla, kaj nur *via konscia volado* decidas, ĉu oni baldaŭ vidos vin sur ĝi.

La landoj de la „plej interna oriento“ ampleksas *multajn* loĝejojn, kaj al ĉiu serioze serĉanta homo tie doniĝos *lia* loĝejo, – neniam la loĝejo de *aliulo*.

Ĉi tie regas ne malpli precize difinitaj leĝoj de okazado, ol en la ekstera mondo. – –

Eĉ *lumanto de la pralumo* ne povas ignori ilin.

Li nur konas iliajn naturon kaj efikecon, kaj lia tuta penado estas gvidi la homojn vivantajn sur la terglobo en lia tempo, kiel ankaŭ la venontajn generaciojn, al ilia *feliĉo* – al ilia *plej alta celo*. –

Al tio servas lia proklamado.

En tio helpas al li *la spirita leĝo*, kiun li *servas* per ĉiuj siaj fortoj.

Li agadas el la *spirito*, kiu estas tio *pra-estanta*, kaj li agadas nur *el la forto* de la spirito.

Kaj el la eterna substanca spirito sin formas „*Dio*“, – kiel „distilaĵo“ de la spirito, – en ĉiu homo, kiu ardakore strebas renkonte al sia Dio kaj pacience atendas la tagon, kiu trovas lin tiom preparita, ke lia Dio povas „naski“ sin mem en li. – – –

Dio estas spirito, – sed: – *la plej alta memformiĝo de l' spirito*.

Formante sin mem el si mem, la plej alta estoformo de la spirito malkaŝas sin – kiel „*Dion*“. – –

La pado de perfektigo

Elektu, ho serĉanto, jam por viaj unuaj paŝoj la padon de la vera lumo, alie vi iam facile lasos vin forloge persvadi ekiri la malbonan padon de la irize brilanta serpento, kiam vi venas al la piedo de la „granda montaro“, kien oni eble povas veni ankaŭ sur kaŝaj padoj, anstataŭ sur la pado, kiun la lumantoj de la pralumo ebenigis tra la dezerto. – –

Vi povas elekti tiun ĉi padon de la vera lumo jam dekomence, se vi scias forigi ĉiujn malaltajn „dezirojn“ el via granda kaj pura volado. –

Sed ĉu vi povos „elekti“ „la noblan padon de la saĝo“, kiu konduku vin supren al la helaj firnoj, ankoraŭ tiam, ŝarĝita per „deziroj“, atinginte la finon de la tradezerta vojo, vi vidas antaŭ vi krudan rokmontaron kaj nun, anhelante, serĉas rigarde la lastan celon?

Sciu, ke tiam la lumo de la vero montriĝas al la okulo de via animo nur kiel fora lumado penetranta la nebulon, kaj ke la alta vojo al tiu lumo tiam aperos al vi „senfina“.

Sed apude, la „pado de eraro“ kondukas al trembrilanta, helega lumo en senpera proksimeco.

Tiu „lumo“ estas *la trompa brilo de la „serpento“*, kies korpo, *multkolore brilanta*, ĉirkaŭas la terglobon.

Ve al vi, se vi falas sub ĝian influon.

Ĝi logos vin per la ekscitanta, seninterrompa movetiĝado de la briletantaj skvamoj de sia kapo, kaj kiam vi, sciavide, venis sufiĉe proksime en ĝian sferon, vi fariĝos al ĝi predo por manĝo.— —

Ĉu vi, mia amiko, povas antaŭsenti la *veron*, kiu ĉi tie, vualita kiel simbolo, volas proksimiĝi al vi?

Bone estas al vi, se vi lernas vere „*interpreti*“ simbolojn.

Ili diros al vi *profundajn aferojn*.

Aferojn, kiuj alie devus pleje resti *nedireblaj*.

Aferojn, kiuj neniam montriĝus *en sia nudeco*.

Sed mi volas provi atingi tie ĉi *ankaŭ tiujn*, por kiuj ĝis nun simboloj estas „mallumaj“.

Do aŭskultu *aliajn* vortojn, sed sciui, ke ili celas *la saman veron*.

Kiam vi, ho serĉanto, sentas unufoje la deziregon levi la vualon, malantaŭ kiu vi antaŭsentas la veron, tiam ĉiutempe estos proksima al vi „gvidanto“ el tiu mondo de la lumo, kiu fariĝu via hejmlando por eterne.

Vi sentos la proksimecon de tiu gvidanto, sen scii ekzakte, *kio* kaŭzas tiun senton.

Spontanee vi *sekvos* la gvidanton. –

Vi tiam estas sur la „pado“ kondukanta tra la „dezerton“.

La „dezerto“ estas formata el la sableroj kreitaj de la ekstera ŝajna ekkono de la terhomaj cerboj. –

Jarmiloj kreadis ĝin.

Tra meze de tiu „dezerto“ altaj majstroj, – spertaj vojokonstruantoj, – konstruis firman taluson, sur kiu oni povas sekure paŝadi.

Ĉirkaŭe kuŝas la ĉiam ŝanĝiĝemaj sablodunoj de ekstera cerba ekkono: – konstante ŝanĝiĝantaj en siaj linioj, – nesekura tero por la piedo, kiu ekpaŝas sur ili.

Sed la pado sur la taluso, kiun la „lumantoj“ kreis al la animo, – estas *roko*. –

Vi sentas *sekurecon*.

Kuraĝe vi paŝas antaŭen.

Dum longa tempo vi devos pacience plue paŝadi, ĝis vi venos al tiu signifa loko, kie la roka taluso tra la sablo de la „dezerto“ atingas la „grandan montaron“ kaj sekve finiĝas.

Nun vi devas *fari decidon*, ĉar antaŭ vi estas *du* padoj, kiujn vi unue ne povos tute klare diferencigi.

Jen vi volos konfidi vin al tiu, jen al la alia.

Sed *unu* kondukas al la *suproj*, la *alia* en la *profundajn abismojn kaj kaŝajn fendegojn* de la montoj.

Sole vi povas *elekti*, kien vi volas turni vin.

Tamen vi certe tuj povos *distingi la padon al la suproj disde la pado de abismo*, se viaj piedoj jam *antaŭe kutimis* senti firman „*rokon*“ sub si, ĉar la pado al la submondo estas *glitiga kaj maltrankvilige nesekura por la piedo*.

Jam kiam vi iradas sur la roktalusa pado, nevideblaj aferoj provos montri al vi sian ekzistadon.

Sed vi ankoraŭ ne povas distingigi, kiu estas *direktanto* de la fortoj, kies efikon vi ekkonas. –

Vi ankoraŭ pensas, ke malantaŭ *ĉiuj* nevideblaj fortoj estas *la sama volo*. –

Sed sciu, ke la *malaltaj* regnoj de la nevidebla sfero ankaŭ havas *malaltajn direktantojn*.

Sciu, ke maro kaj tero ne estas tiom akre apartigitaj, kiel la malaltaj, fizikasense ne ekkoneblaj fortoj, kiuj agadas formante kaj detruante la „*mondon de la materio*“, disde la altaj potencoj de la spirito *ekkonantaj en la plej alta lumo*.

La direktantoj de la *malaltaj* nevideblaj regnoj estas la plej teruraj malamikoj de via animo.

Ne ĉar ilia volo volas *damaĝi* vian animon, kiel la malamoplana volo de tiuj kondamnitaj al neniigo, kiuj iam estis teraj homoj kun plej alta ekkono kaj

denove subiĝis al la „falo“ en mallumon, – sed nur per *fortoj de altiro*, kiujn vi malfacile povas rezisti, se altaj spiritofortoj ne efike vin *izolas*. – –

Kiam vi pasante tuŝetos regnojn, kiuj estas sub la influo de *malaltaj* direktantoj, tiam montriĝos, *kiu vi estas*. –

Se vi serĉas sole *plej altan, eternan klarecon*, tiam via gvidanto, kiu estas direktanto de *plej altaj* fortoj de la *spirito*, *povos* protektante izoli vin.

Sub tiu protektado vi ankaŭ scios elekti kun certeco la padon, kiu kondukas vin al plej pura *ekkono de lumo*.

Vi tiam atingos *la vivon en la eterna lumo de la altaj firnoj de l' spirito*. – –

Sed se vi celis *akiri malaltajn kapablojn*, – se vi volis esplori nur „*okultaĵojn*“, por *servigi novajn fortojn al viaj deziroj*, tiam via mano nerimarkite *elglitos* el tiu de l' gvidanto.

Lasite *sola* kun via malgranda forteco, vi fariĝos predo de la altiraj fortoj efikantaj sur vin el la sferoj de malaltaj direktantoj en la mallumaj abismoj de eterna naskiĝo de materio. –

Vi – eble – akiras „*okultajn fortojn*“, precipe se vi scias praktiki rigoran seksan abstinadon kaj nutras vin nur per vegetalaĵoj, sed *ve al vi kaj al ĉiuj kiuj falas sub vian influon*, – se vi *fakte* akiras tiajn fortojn. – –

Tiuj malaltaj direktantoj estas la „*kreantoj de la fundo*“ kaj la *detruantoj* de *ĉio*, kio volas *libere levi sin super* la fundon, kiun ili firmigas.

Ne pensu, ke ili povus instrui al vi la sekretojn de kreado, kiel atendas tiu aŭ alia malsaĝa „lernanto de la sorĉista metio“. – –

Ili nur avide proprigos al si vian volon, ĉar ĉiuj potencoj en la nevidebla kosmo bezonas *homajn agentojn*, se ili volas efiki sur *volocentrojn* enkarnigitajn en *homoj*, – kaj vi servos al ili nur kiel *detruanto*, eĉ se vi kredas esti *konstruanto*.

La *altaj* direktantoj, same kiel la *plej malaltaj*, ne povas atingi la animon de la tera homo per sia influo, krom se volounuoj *enkarnigitaj en homoj* servas al ili kiel „ponto“.

Ĉi tie vi eble sentetas, kion signifas la instruo pri la „*filo de Dio*“, kiu devis „*fariĝi homo*“, por povi „*elaĉeti*“ siajn terhomajn fratojn. – –

La efikado de spiritalaj potencoj, – ĉu ilia efiko estas elvokita, kaj *en sia naturo determinita*, de la *plej altaj* aŭ la *plej malaltaj* nevideblaj direktantoj, – konas *nek tempan, nek lokan* obstaklon.

Ankoraŭ hodiaŭ efikas en la anima mondo de l' tera homo potencoj elvokitaj kaj determinitaj de *altaj* aŭ *malaltaj* direktantoj, kvankam tiuj potencoj

trovis la vojon al la koroj *jam antaŭ multaj centoj, eĉ miloj da jaroj* – per homa agento.

Kie ajn tia agento vivas aŭ vivis, la spirita potenco, kiu ekefikis per li, atingos *ĉiujn*, kiuj vibras en similaj osciloj kiel tiu potenco, ne grave, ĉu la tiel dispoziciitoj vivas sur la alia flanko de la terglobo, aŭ naskiĝos en estonta generacio.

Estas fidinda distingilo de *alta* spirita gvidado, ke la spiritaj potencoj elvokitaj de ĝi efikas en la homo nur sub plej zorga respektado de ties *libereco*, same kiel ĝi faras la homon, kiu servas kiel „ponto“, libera *mastro* de la fortoj efikantaj per li. Kontraŭe, oni ĉiam povas ekkoni la *malaltajn* direktantojn per tio, ke ĉio, kion ili efikigas, celas *ligi* la impresiton, tiel ke li fariĝas ilia *sklavo*, kvankam ili tenas lin en la *iluzio* esti „mastro“ de la potencoj elvokitaj de ili.

La fino de tiu, kiu servas kiel „ponto“ *al ili*, estas dissolviĝo en turmentoplena nokto. –

Sed tiuj, kiuj estas „pontoj“ de la *altaj direktantoj*, formas eternan, reĝan unuiĝon de la *lumo* en la spirito, ĉar en ĉiu el ili estas ekflamigita „*stelo*“, kiu, formita el plej pura lumoforto de la spirito, eterne lumas al la animoj de la teraj homoj.

Vanta, elpensita instruo, kiu volas forlogi vin al la kredo, ke la homo *en sennombraj surteraj vivoj* disvolviĝas pli kaj pli alten, diras al vi ankaŭ, ke la „pontoj“ *konstruantaj sin mem*, por ke la plej altaj

spiritaj direktantoj atingu trans ili la terajn homojn, estas nenio alia ol homoj, kiuj travivis la surteran vivon jam sennombrajn fojojn, sed nun estas alvenintaj *al la plej alta celo de sia disvolviĝo*, kiun *ankaŭ ĉiu alia* homo de la tero devas iam atingi.

Ne kredu al tiuj malsaĝaj paroloj.

Alie vi tre facile povus fariĝi *viktimo de trompo*, – kaj el supozita „estonta majstro“ tiam fariĝus kompatinda trompita sklavo de sia vanteco. – –

Ne al ĉiu tera homo estas surmetita la ŝargô, kiun devas porti *nur la malmultaj*, kiuj antaŭ longa tempo, baldaŭ post sia falo el alta lumo, plenaj de kompato al la kunfalintoj, sin prezentis por fariĝi kunhelpantoj de altaj spiritaj direktantoj, – samtempe „pontoj“ kaj konstruantoj de pontoj, – servante la eternan amon.

Nur tiu povas sukcese trapasi la provon por fariĝi „majstro“, kiu jam *estis* majstro de pontokonstruado *en la spirito*, longe *antaŭ* sia enkarniĝo en la teranimalan korpon.

En sia tera konscio li fariĝas „ponto“ kaj majstro de pontokonstruado nur en tiu tago, en kiu li rajtas proksimiĝi al la lumanta unuiĝo de siaj spiritaj frattoj – kiel homo, kiu *ankaŭ en tiu ĉi surtera sfero trapasis* la „provon por fariĝi majstro“. – – –

Tiam la „*filo*“ de la altaj spiritaĵoj „*patroj*“ estas fariĝinta ilia akceptita spirita „*frato*“, kiel *lumanto de la pralumo*.

Sed ĉiu tera homo, kiu ajn li estas, povas *fariĝi „lumanta“ en la spirita lumo, en eterna libereco*, – kvankam li *ricevas* la lumon, kiel planedo rondiranta ĉirkaŭ suno.

En la regno de la lumo neniu „*envias*“ al aliulo ties rondon de agado, konfiditan al li de *la unu, eterna „majstro“ de ĉiu majstreco*.

Ĉiu enirinta en tiun ĉi regnon estas *perfektiĝinto*, libera en si mem, – kaj ĉiu scias, ke perfektiĝo estis atingebla al li nur *en lia propra formo*. – – –

Estas nur sekvo de via tergenerita *nekonado*, se vi eble strebas al speco de spirita perfektiĝo, kiu *ne* estas postulita surbaze de *via* individueco.

Kion utilis *al vi*, se vi atingus specon de perfektiĝo, kiu devas resti rezervita *al aliulo*? –

Eĉ se vi atingus la *plej altan* formon de perfektiĝo atingeblan al tera homo, kaj ĝi estus *ne la via*, tiam vi estus *vane* strebinta al perfektiĝo.

Nur kiel perfektiĝinto de *tio* donita sole *al vi*: – nur kiel perfektiĝinto *de vi mem*, vi iam eniros en tiun eternan *lumon*, el kiu vi estu *lumonta* por eterne. –

Pri la eterna vivo

Ĉi tie mi parolos pri la vivanta „*lumo*“: – pri la *eterne nemortigebla* „vivo“ trafluanta ĉiun homan eston.

Mi montros al vi *la lumon de la koroj*, kiu *vivas* en vi kaj povas *lumigi* vin. –

Vi ĉiuj, dezirantaj ekkoni la *sencon* de la vivo, jam *tro longe* estis „*serĉantoj*“ sur la vojoj kondukantaj al *eraro*. –

Vi fariĝos „*trovintoj*“, se vi fidas la vorton de trovinto. –

Vi estas reĝoj, kiuj ne konas sian regnon. – –

En vi mem estas tiu „regno“, kiun viaj okuloj ĉiam *vane* provas ekvidi, se vi serĉas ĝin *ekstere*. –

Vi demandas sen ricevi respondon, kaj tamen vi ree kaj ree demandas: – „*Kie estas la lando promesita al ni?*“

„Ĉu ni mem *finiĝas*, kiam nia vivo *ĉi tie* finiĝas, aŭ ĉu nia memestado povas transvivi tiun ĉi finon?“

Vidu: – tiuj tiele demandintaj *antaŭ* vi, estas en vi, en via interna „regno“, kaj tie povus respondi al vi, se vi ne estus *surdiĝintaj* en la bruego de la ekstera mondo. – – –

Via propria animo estas la „regno de la spiritoj“, kiuj eterne vivos *kun kaj en* vi. — —

En vi mem vi ampleksas la senfinecon.

En vi vivas tio, kio estis, kio estas, kaj kio estiĝos.

„*Ĉiama ĉie-estado*“ estas *via esto*, — — sed vi estas ankoraŭ ligitaj al la ekzisto, al la „estado nun kaj tie ĉi“, kie vi atendas ion *neniam* venontan. — —

Vi ankoraŭ kredas, ke la regno de paco estas foralando je stela distanco, dum ĝi vivas *en vi kaj vi en ĝi*.

Ĉiu, kiu atingis en si tiun regnon, estas la „*reĝo*“ de tiu regno por eterne. —

Same kiel *vi* tie *trovos* ĉiun homan eston en ĝia eterna spirita vivo, vi mem tie estos *trovataj* en ĉiuj *atingintaj* en si tiun regnon.

Ĝi estas *unu sola* regno de spiritoj, sed al ĉiu el la nenombreblaj, kiuj trovis ĝin en si, tiu regno „*apartenas*“ kiel nelimigita *posedaĵo*, — ĉiu estas nerestriktita „*reĝo*“ de tiu regno, kaj lia regno estas „*eterneco*“, — kvazaŭ el ĉiuj nenombreblaj *li sola* estus la „*reĝo*“ de l’ regno, kiun ĉiu posedas nur kiel „la regnon“ de *sia* animo.

Vi *ne* povas atingi la regnon de la spiritoj *ekstere de vi*.

Sole en vi ĝi estas atingebla por vi. — —

Se vi volas serĉi „*ekstere*“, tiam vi *devas* subfali al trompiĝo, ĉar ĉio, kio estas trovebla ekster la *mondo de eterneco* de la plej interna „*mi*“, estas nur pasema „*bildo*“: – *portempa* spertado, kiel la spertado de tiu ĉi mortlimigita surtera vivo.

Nur tie, kie la animo estas *ĉe si mem*, unuigita en la „*mi*“ kaj gvidata de ĝi, estas trovata la „*regno*“ daŭranta *eterne*. – –

Tie *ne* plu ekzistas *iu* trompiĝo.

Nur *tie* „*eterneco*“ estas *posedaĵo*.

Sole via „*mi*“ estas la nelimigita posedanto de tiu „*regno*“. – – –

Senfina estas la nombro de la „*reĝoj*“ de tiu regno, kaj *ĉiu*, al kiu ĝi fariĝis „*reĝoregno*“, estas en si *unuigita kun ĉiuj aliaj*, kiuj tie ĉi plenrajte portas sian kronon, – estas tiu *unu*, en kiu *ĉiuj* regas.

Ne unu *apud* la aliaj, sed unu *kun* la aliaj, unu *en* la aliaj vivas ĉiuj, kiuj tie ĉi vivas *eterne*.

Kiel vi surtere kutimas diri pri homo, ke li „*vivas*“ sian vivon, kiam li, bone aŭ nebone, agante ĝuas ĝin, – tiel same ankaŭ ĉi tie ĉiu „*vivado*“ estas *agado*, kaj „*vivo*“ signifas *ne nur staton de esto*.

Tie ĉi „*vivo*“ estas la „*lumo*“, el kiu la spirita homo *lumas*, – el kiu li „*vivas*“. –

Vi mem estas „*enteksitaj*“ en la eterna mondo de spiritoj, kaj vin trafluas la „*vivo*“ de ĉiuj eternaj spiritoj, sen tio, ke vi pri tio scias.

En via „*mi*“, – kiel kiun vi nuntempe sentas vin mem nur kvazaŭ *spegule en „cerba reflekso“*, – vi sentas vin kiel izolita „*unuopa esto*“. –

Sed „*io vivanta*“ estas ĉiam *unuigita* kun ĉio vivanta.

Ekzistas nenio sur la tero, kaj nenio en la tuta universo, kaj nenio en la spirito, kio havus sian „vivon“, kio estus kapabla „vivi“, nur por si sola. – –

Ĉiu „*unuopa esto*“ finfine estas vere *la tuta esto*.

Eĉ se ĝi ne estas kapabla *scii pri tio*. –

Unuopa esto povas trovi „*malligon*“ nur, kiam ĝi spertas sin mem en la *tuta esto*, *malligite* de ĉiu *alia „unuopa esto“*.

Tial „*malligon*“ vi atingas *nur*, se vi lernas senti en via „*mi*“ – en la „*mi*“, kiu restu konservita al vi *por eterne*, – ke ĉiu „*mi*“ sin donas al vi nur en tiu ĉi via „*mi*“, eterne donas al vi *sin mem*: en *unuigo* kun si.

En vi: – en la „*mi*“ de la *eterneco*, – estas la tuta „*vivo*“, kaj *sole* en tiu *vivo* vi trovos tiujn vere „*eternajn*“: tiujn *eterne vivantajn*. –

Jam antaŭ longe vi *estus trovintaj* ilin, se vi ne ĉiam, obstine kaj forlogite, serĉus ilin *nur tie*, kie ili *neniam* estas troveblaj.

Vane vi provas enpremiĝi en la *nevideblajn* regnojn de tiu ĉi *ekstera mondo*. –

Estus pli facile al iu el tiuj, kiuj vivas en la *regno de eterno*, „aperi“ al vi en la *videbla mondo*, en hela sunbrilo, ol ke li povus renkonti vin en la *nevidebla* fizika mondo.

Vi devas lerni enprofundiĝi en tion, kio *en vi mem* estas „eterna“, se vi volas konscie unuigi vin kun tiuj, kiuj jam estas *en la eterna vivo*. –

En la oriento loĝas la lumo

Nur malmultaj homoj de la „okcidento“ sentetas la *veron*, aŭdante pri la „*saĝaj viroj de la oriento*“, pri kiuj parolas malnova tradicio en kvietaj rondoj de noblaj serĉantoj de la vero, – kaj inter tiuj, kiuj tie ĉi malklare *sentetas*, pri kio temas, estas tro *malmultaj*, kiuj povas *deteni* sin de *malsaĝaj ideoj*, kiam ili provas *formi al si bildon* de tio sentita de ili. – –

En la oriento, en la koro de Azio, la tranĉilo de l' pensado estis akriegata ĝis la plej granda akreco.

Sed tie ĉi estis, jam antaŭ jarmiloj, ankaŭ la granduloj, kiuj trovis *super* ĉiu pensado *la klaran vojon al la vero*, la vero, kiu estas nenio alia ol *absoluta realo* kaj havas nenion komunan kun bildoj de pensa ekkono, en kiuj oni ĝenerale opinias posedi tion, kion oni *nomas* „la veron“.

Sub alta gvidado tiuj unuaj de la „*fratoj sur la tero*“ trovis la vojon kaj la celon.

Ekde tiam ili kaj iliaj posteuloj instruas la serĉantojn, kiuj estas rigardataj kiel „*maturaj*“, *en la spirito per la spirito*.

Ili konstruis ĉirkaŭ sia unuiĝo „*la sanktan remparon de silento*“, kaj *nur tiu* trovas „aliron“ al ili, pri

kiu ili ekkonas, ke li estas „*matura*“ por fariĝi *ekkonanto en la spirito*.

Ili scias, ke ilia dono utilas nur al tiuj, kiuj estas proksimaj al la fino de sia penado sur la „pado“. –

Sed al ĉiuj ili sendas el sia rondo *helpantajn instruantojn*, kaj ili sendis ilin en ĉiu tempo.

En la okcidento kiel en la oriento ĉiam troviĝis tiaj „agantaj fratoj“.

La membroj de la alta unuiĝo ne estas ekkoneblaj laŭ iu ekstera signo.

Sole ili mem ekkonas, kiu apartenas al ili. –

Ilia spirita esenco estas profunde kaŝita al la okuloj de la homoj.

Neniu el tiuj preparolataj tie ĉi iam provos kolekti *komunumon* ĉirkaŭ si.

Neniu iam establis aŭ fondis tian komunumon.

Ĉiu „komunumo“, kiu estiĝis en la mondo kaj sin apogis sur la voĉo de la „fratoj sur la tero“ aŭ eĉ de iliaj altaj enlumaj „patroj“ kiel aŭtoritato, ĉiam estis nur *la verko de animoj ankoraŭ ne maturiĝintaj*, kiuj, rezulte de la *tro frua disvolviĝo* de iliaj internaj sensoj, kapabliĝis *percepti* iomon el la rondo de la plej interna „oriento“, kiel subaŭskultantoj malantaŭ serurtruoj, sen posedi la kapablon ĝuste *interpreti* tion subaŭskultitan. –

Nur tre rare unu el la fratoj persone paŝis antaŭ siaj kunhomoj en la agada moviĝado de la ekstera mondo, klare konfesante sian apartan esencon, kaj por ĉiu, kiu faris tion, tiu paŝo fariĝis amara ofero.

Kie tiaj oferoj ne estas *nepre* necesaj, ili estu evitataj.

Tial la kaŝiteco, el kiu agadas la „saĝaj viroj de la oriento“. – –

Tial la silentemo, per kiu sin kovras ĉiu membro de tiu rondo, escepte se tasko surmetas sur lin la devigon *konfesi* – ĉu en persimbola parafrazo, ĉu en pli klaraj vortoj – sian spiritan esencon, kiu vere *ne* estas *facile* konfesebla.

La alta unuiĝo de la lumantoj, nomataj „saĝaj viroj de la oriento“ en praa tradiciado fare de respektoplenaj serĉantoj de la vero, estas ligita sole de *spirita leĝo*.

Ĝiaj membroj ne konas promeson de asketismo aŭ „ordenan“ ĵuron.

La disvolviĝo de spiritaj fortoj ne dependas de tiaj aferoj.

Sed kio estas *postulata* de la „leĝo“, al kiu tiuj fortoj obeas, tio estas *multe pli* ol la plej severa asketismo kaj la plej rigora pentofarula vivo.

Oni devas forlasi multajn ideojn – kiuj, kvankam baziĝante sur ĝustaj premisoj, tuŝas nur la *malaltajn*

fortojn je la homo – se oni volas ekscii, kio vere estas „inicito“ de tiu unuiĝo. –

Sed ĉiu, kiu *estas* tia „inicito“, vin ekkonos, *neĝenite* de viaj eraraj ideoj.

Lia „instruado“ ne estas perceptata de via ekstera orelo, – eĉ se vi konas lin „persone“. –

La sciigoj, kiujn homo unuiĝinta kun la spirito eble donas en la lingvo de sia lando, ne konsistigas lian „instruadon“.

Ili celas esti por vi nur „atentigoj“, por ke vi retrovu lin, aŭ iun de lia speco, *en vi mem – en via plej interna interno*.

Ankaŭ liaj eksteraj vortoj estu *sentataj*, ne „klarigataj“, ne pense disfibrataj.

Se vi povas fariĝi liaj „disĉiploj“, tiam li „parolos“ al vi *en via propra koro*.

Li *neniam* provos vuali viajn sensojn per la incitoj de ebriiga ekstazo, – sed li malfermos en vi *novajn*, spiritajn sensojn *apud* viaj *teraj* sensoj.

Komence vi perceptos lian „instruadon“ sen scii, ĉu estas la amiko kaj gvidanto de via animo aŭ ĉu estas vi mem, kiu „parolas“ en vi. –

Sed certa, pura, nova sentado akompananta lian „instruadon“ baldaŭ diros al vi, ke estas „parolate“ en vi kun „konsekrita“ voĉo: – *per senpera estigo de interna klareco*, – *sen* vortoj de la buŝa parolo. –

Tiu ĉi ricevo, ofte tute nesupozita, tute neatendita, de klara interna heligo de spiritaj aferoj, – kiu tiom *superbrilas ĉiun „klarecon“* kutime alportata al ni de logika *pensado*, – estu al vi sekura signo, ke vera spirita „instruado“ montriĝas en vi.

Spirita „instruado“ ne „volas konvinki“, sed estas *senpera heligo* de tio, kio antaŭe kuŝis en mallumo.

Tiel „parolas“ en vi homa frato, kiu *ne plu devas sendi sonondojn de la aero al la orelo de l' korpo*, kiam li volas „instruante“ atingi akceptemajn, malfermajn korojn, kiuj konfidis al li.

Eble vi komence ne povos „*kompreni*“ ĉion, kio tiumaniere okazas en vi, ĉar oni ja povas *ekkon*i ion en absoluta klareco, sen esti kapabla *pense analizi* al si tion ekkonitan. –

Restu *trankvilaj* en tiu okazo kaj ne „discerbumu“ al vi tion klaran.

Antaŭ ĉio, lernu *distingi* la voĉon „parolantan“ en vi disde la falsaj „voĉoj“ de via ekscitita fantazio. –

Restu sobraj kaj kvietaj, kvazaŭ temus pri observado en vi de *io jam de longe kutima*.

Je la komenco de la „gvidado“ la voĉo de l' „instruanto“ estas tiom mallaŭta kiom tute delikata penso, kiom apenaŭ perceptebla sento.

Sed la spirita gvidanto ne parolas iun „vorton“ en sia spirita „lingvo“, de kiu ne elirus tre precize dis-

tingebla „*sento*“ *de certeco*, kiu estas malfacile pri-skribebla, sed estas tuj ekkonata tute certe de ĉiu, kiu spertis ĝin eĉ nur unu solan fojon.

Neniu propra „penso“, de kiom ajn alta speco ĝi estas, iam povas estigi tiun „senton“, kiun estigas *la spirito, en kaj per* kiu agas tiu spirite instruanta.

Ju pli kreskas *la certeco*, kun kiu vi lernas *distin-gi* lian „voĉon“ disde ĉio, kio *ne* estas de lia esenco, des pli klare ĝi povos „paroli“ en vi.

Tiam, iun tagon, venos „la granda horo“, en kiu *eĉ via lasta iometa dubo* estos *forlasinta* vin.

Sed ne fariĝu malpaciencaj, se vi *ne tuj* povas atingi en vi la unuan el la celoj.

Vi ne scias, ĉu vi jam fariĝis sufiĉe „*maturaj*“ por ricevi la „instruon“ tiel, ke ĝi utilas al vi, kaj tie ĉi *sole la „instruanto“* estas respondeca pri ĉio, kion li donas.

Al unu *la certeco* venos *pli frue*, al alia *pli mal-frue*, sed ĝi venos *certe*, se vi trankvile konfidas al la spirita „instruanto“.

Ne forgesu, ke vera „saĝo“ estas *ekkono de realo*, kaj ke la instruantoj de la vera saĝo uzas nur la *realon*, kiam ili instruas – la realon, kiu *ne* estas *tio plej komplika* en estado, sed vere *tio plej simpla*. –

Ekzistas *pensaj fortoj*, kiuj ĉiam celas *trompi*, ĉar ili mem *vivas* nur el trompo.

Tiu *spirite* instruanta estas *malproksima* de ilia sfero.

Neniam li instruos vin pri alio ol pri aferoj de la *spirito*, aferoj de la *animo*, aferoj de la *eterneco*.

Pere de li vi ekkonos, *kiuj vi estas*, kaj kion en la kosmo signifas la homo „en si“, *en la realo*.

Se vi *konfidas* tiun, kiu „instruas“ vin en vi, vi fariĝos tiom *certaj* kiom li *mem* estas certa.

Sian *propran* certecon li, la certulo, transdonos al vi. — —

Sed vi neniam faru demandojn internajn, *antaŭ* ol venis „*la granda horo de certeco*“.

Se vi tamen faras tion, vi certe subfalos al tiuj *trompantaj pensofortoj*. — —

Ne formu al vi imagon de la figuro aŭ speco de la homo, en kiu eble via spirita instruanto vivas tie ĉi surtere, kaj se vi *konas* homon, pri kiu vi *scias*, ke li estas homo unuiĝinta kun la spirito, tiam gardu vin tuj supozi, ke nur *tiu* homo al vi *konata* devas esti ankaŭ *via* spirita instruanto. — —

Vi ne bezonas scii, *kiu* el la rondo de la *lumantoj de la pralumo* spirite instruas vin, kaj tiuj *sciantaj* ne diros tion al vi.

Ordone regu vian *fantazion*, por ke ĝi ne konduku vin, dum viaj okuloj estas maldormaj, per la *kondukŝnuro de erarigaj sonĝoj*.

La ekstera vivo de la spirita instruanto estas lia *propra afero*, kaj li ne volas, ke oni konfuzu *la spiriton*, en kiu li agadas, kun *lia terhoma eksteraĵo*.

Li ne volas, ke liaj „disĉiploj“ montru al lia „*personeco*“ honoran respekton, kiu decas nur al *la spirita forto*, el kiu ĝi agas. – –

Li „instruas“ nur la „*saĝon*“, kiun oni nomas „*vero*“ kaj kiu reveliĝas al la „disĉiplo“ *en realaĵoj*.

Li „instruas“ ĝin nur *en la spirito*, – per la *forto* de la spirito.

Ĉiu, kiu rajtas instrui en tiu maniero, ankaŭ plene scias kaj tre klare sentas, ke sole *la neperfekteco de la prezentado* de la eterna realo montriĝas *kiel la verko de la tera homo*, – kaj ĉiu lumanto de la pralumo tuj „bruligos“ la honoron, kiun oni eble faras al *lia terhoma personeco*, sur la eterna altaro, al kiu li servas kiel unu el la vokitaj sacerdotoj. – –

Fido, talismano, kaj bildo de dio

Simplaj kiel la prafundo estas la lastaj sekretoj de la *natur*o.

Ne apartigu per la arbitro de viaj pensoj tion, kio ĝermas *el la sama radiko*, kaj vi *ĉie* trovos la *samajn* leĝojn.

Sed oni instruis vin konstrui *duan* mondon, mondon sen fundo kaj kaŭzo, kaj tiun konstruadon de *io neestanta* el la *nenio* viaj instruantoj nomis „kredo“.

Ne pri tiu ĉi „kredo“ estos parolate, se mi parolas al vi *pri fido*.

Ne tiu ĉi „kredo“ estas necesa por la beateco de via animo.

Sed ni volas malfermi vian senton por *eterna forto*, kiu *vivas* en vi kaj, ĉiam *vive moviĝante*, ĉiam *kreante*, donas formon al la fortoj de via *volo* kaj tiel estigas ties efikon. –

Fido estas spirita *forto de formado*.

Fido kreas la *formon*, kiu *difinas* la efikon de via volo.

Fido estas la *formo de efikado de la volo*.

Vi ne povas vere *voli* sen *fidi*, – ĉar *neformita* volo estas *disfluanta* forto kaj kiel tia estas *disipata* sen efiko. – –

Sed tuj kiam vi donas *firman formon* al via volo per via *fido*, via volo fariĝas *fortega potenco* kaj transformas eĉ la plej firme kunigitajn ĉenerojn de ekstera okazado tiumaniere, ke ili *ŝanĝiĝas* kiel vakso laŭ la *formo de via fido*.

Via animo suferante sopiregas, tiom longe, dum vi *ne povas fidi*, kaj en sia mizero ĝi forlogos vin eĉ al *superstiĉo*. – –

La „*vivo*“ de via animo estas *volo*, kaj *ĉiu volo volas akiri sian firman formon*, en kiu ĝi povas *efiki*.

Kiam vi *sentos*, kio „*fido*“ *reale* estas, tiam vi vere *povos fidi*.

Via *fido* estas la modelo, laŭ kiu formiĝas la likva metalo de via sorto. –

Via *fido* bezonas absolutan *liberecon*.

Sole vi mem estas la normo de via *fido*. – – –

Via *fido* formas vian Dion laŭ via bildo, kiel ĝi formis viajn *diojn*.

Neformita estas tio Dia en sia *mistera, nesondebla* esto.

Nur *formita* ĝi fariĝas al vi *sondebla*. –

Al vi ĝi *rivelas* sin *en vi* nur en *via* formo.

Tial vi ne povas montri *vian Dion* al *via frato*, ĉar li *eterne ne povas vidi vian Dion*.

Li vidas la *saman Diecon*, sed formitan laŭ *sia* bildo.

Vi ankoraŭ kredas povi *forlogi* vian fraton al *via* Dio, sed se li *lasas* sin forlogi, li adoras „*bildon*“ kaj estos *fremdigata al sia Dio*. – – –

Infinitoble sin rivelas tiu *Unu*, kaj ve al tiuj, kiuj volas forpreni de Li nur *unu* solan el *Liaj* formoj.

En la sama momento, en kiu vi senhonte *senvualigas* la internan bildon de *via Dio* al alia homo, vi estas *perdinta* vian Dion. –

Ne kredu, ke inter ĉiuj miloj kolektiĝintaj ĉirkaŭ *unu* dionomo honorata de ili troviĝas eĉ nur *du* veraj kredantoj, kiuj kredas la *samon* en tiu nomo. –

La fido mem povas utiligi ĉiun nomon de dio aŭ diablo.

La formanta forto de la fido, kiu destinas vian *volon*, estas la sola kaŭzo de ĉiu „*magia*“ *efiko*.

„*Blanka*“ kaj „*nigra*“ magioj baziĝas *sur la sama forto*.

Kiel la fizika forto, kiun la fulmo montras al vi, fariĝas utiligebla al la homo, tuj kiam li *scias kateni ĝin en formo*, – kolektante kaj konservante ĝin en metaloj kaj ujoj, – tiel ankaŭ la forto de la *volo*,

formita per la fido, povas esti *ligata en formitaĵoj el materio*.

En ĉiuj kultoj kaj ĉe ĉiuj popoloj vi trovas la kredon al „konsekritaj“ objektoj, laŭdire posedantaj altajn fortojn.

Vi *mokas* pri tiu kredo kaj nomas ĝin „*superstiĉo*“.

Se vi per tiu moko celas nur la *fabelaĵojn*, kiuj ĉirkaŭvolvas tiujn objektojn kiel kreskeganta grim-potigaro, *tiam* vi eble estas *prava*, – sed gardu vin, ke vi ne malatentu la tie ĉi kaŝitan *realon*.

Ĉiu objekto, kiun vi mem „*ŝargis*“ per via *vol* klare formita de la fido, estas „*talismano*“, kaj la *efikon* de tiaj „*talismanoj*“ vi *sufiĉe ofte spertis*, eĉ se vi neniam konsciiĝis pri tio, kio estis la *kaŭzo* de la efiko, kaj vi eĉ ne songe pensis, *ke vi mem ĉirkaŭis vin per „talismanoj“*.

Tamen la *objekto* estas nur la *portanto* kaj *konservanto* de forto *verdire libera*, sed *nun ligita en ĝi*. – –

Tiu forto ne estas propra al ĝi.

Via *fido* formis vian *voloforton* kaj direktis ĝin, pleje *sen* via scio, sur tiun „*portanton*“, kiu nun ĝin *konservas*, ĝis ĝi konsumiĝis. – – –

Sed via *nova* fido *denove* „*ŝargas*“ la „*talismanon*“, eĉ se vi *ne* rigardas ĝin kiel tian.

Ĉiu objekto, kiun vi uzas, por ke vi *sukcesu* en tio aŭ tio ĉi, kvankam la objekto *ne estas nepre necesa* por via farado, estas „*talismano*“, eĉ se vi, estante „*raciisme klerigita*“, moke parolas pri „*superstiĉo*“, se vi aŭdas pri homoj, kiuj kutimas utiligi tiajn objektojn *plene konscie* kaj estante *certaj* pri ĉiama efiko. – –

Vi estas nur *nepripensinta*, – sed tiuj homoj „*scias*“.

La samo aplikiĝas al la *bildoj de dioj*.

Al la *fetiĉo* en la kabano de sovaĝulo, kiel al la alta *kultbildo de Atena*.

Al la *bildo de sanktulo* en alta katedralo, kiel al la „*bildo de graco*“ en malnova preĝejo monaĥeja. –

Ili ĉiuj estas „*portantoj*“ de koncentritaj *volofortoj* de tre *multaj* homoj, kiuj *per sia fido formis sian volon* kaj *sciis transmeti ĝin en la bildon*, – aŭ en *povrajn materiajn postrestaĵojn*, kiuj vere, aŭ nur laŭsupoze, originas de „*sankta*“ homo. – – –

La *fido* de tiuj, kiuj *preĝas* antaŭ tiuj objektoj, „*malligas*“ la fortojn ligitajn en ili. –

Tial povas *malligi* tiujn fortojn *neniu*, kiu *ne fidas* ilin, – ĉar nur la *fido* kreas la altan „*tension*“ de viaj volofluoj, kiu *devigas* tiujn volofortojn, akumulitajn kaj per la fido klare *formitajn*, enflui en *vian volon* kaj, unuigite kun ĝi, *efiki laŭ via deziro*. – – –

Sed ni certe ne volas konsili al vi utiligi la „talismanojn“ de ĉiuj kultoj.

Ni ne volas konsili al vi elprovi mem la altan forton de la bildoj de dioj aŭ „bildoj de graco“, – kvankam vi devas teni tiujn aferojn *liberaj* de via *moko*, se vi vere volas ekkoni la *leĝon*, al kiu ili ŝuldas homan adoradon. –

Vi ekkonu sole tiun „*leĝon*“, kaj vi lernu *utiligi* por *via vivo* la eblecojn, kiujn ĝi al vi prezentas. – –

Via voloforto *ne ĉiutempe* estas la *sama*, sed se en la tempoj de *via forteco* vi kreas al vi *konservantojn* de viaj fortoj, tiam vi spertos verajn „*miraklojn*“ je vi mem en tempo de *malforteco*.

Ĉiu objekto, kiun vi ŝatas *uzi*, aŭ kiu ĉiutage *ĉirkaŭas* vin, povas fariĝi *portanto* kaj *plifortiganto* de viaj *volofortoj*, kaj poste, en horoj *ne trovantaj* vin en forteco, vi povas „*malligi*“ el la konservanto kreita de vi mem la fortojn *bezonatajn* de vi en tiaj horoj.

Kiel konservantoj taŭgas *precipe la objektoj de alta beleco*.

Kio ŝuldas *sian propran ekziston* al alta *formpovo*, tio plej bone *konservos* al vi vian *propran forton* formitan. – –

Ĉirkaŭu vin per *tiaj* objektoj, kiajn vi *amas* pleni en altaj horoj per tiu speco de formita

voloforto, kiun vi *bezonas* en horoj de via malforteco.

Ĉiam portu tiajn objektojn *kun vi*, kien ajn vi iras.

Fidu, ke vi *povas transmeti vian plej bonan forton* al tiuj objektoj, kaj ke vi ricevas ĝin de ili returne, tuj kiam vi *bezonas ĝin*.

Vere, – *tia fido ne estas „superstiĉo“*.

Vi ankoraŭ ne scias, kiom *„realaj“* estas viaj volofortoj, kaj *kia potenco* estas en viaj manoj, kiam vi lernis *„formi“* la *volon* per la fido. –

Sed ne detruu vian fidon per vanta pensado pri tio, kiel ĉio ĉi estas *„psikologie klarigebla“*.

Se iu parolas al vi ĉi tie pri *„memsugestio“*, *ne lasu vin trompi*.

Per tiaj vortoj *nenio* estas klarigata tie ĉi.

Oni uzas nur novan *vorton*, kaj *per ĝi certe ne povas kompreni la efikon*, kiu baziĝas sur altaj *fortoj*. – –

La naturo efikas *laŭ sia esenco* kaj ne atendas, ĉu vi povas *„klarigi“* ĝian efikadon.

Kiel *ni* vidas la aferojn, vi sciiĝas per tiuj ĉi vortoj miaj.

Ĉu ni diras *la veron*, vi povas sperti nur, se vi *mem faras elprovon*. –

La magio de l' vorto

Sciu, ho serĉanto, ke por ĉiu erao *aliaj* „magiaj“ fortoj estas necesaj, keĵ ne lasu vin konfuzi, se vi ne ĉiutempe rimarkas la *samajn*, miraklecajn fortoefikojn.

Tiuj, kiuj ĉi tie devas „*ordigi*“ tion, kio estas ordigenda, direktas la „*fluon*“ en *tiujn* kanalojn, kiuj fekundigas la grundon tie, kie ĝi estas *plej seka*.

Tial en *tiu ĉi* tempo vi *ne* atendu *alian* „magian“ efikon ol la „magion“ de la *vorto*. — — —

La *vorto*, komprenite en la „*magia*“ senco, estas la *plej alta* de la „*magiaj*“ fortoj.

Venos tempoj, en kiuj oni faros — sole per la forto de l' *vorto* — aferojn, kiuj limas „*miraklojn*“.

Jes: — *oni faros „miraklojn“ per la vorto*. — — —
„*Miraklojn*“, kiuj estos *multe pli miraklaj* ol ĉio, kion la antikvaj tempoj *nomis* „*mirakloj*“.

Aperos tagoj, en kiuj oni scios fari *per la vorto* farojn, por kiuj hodiaŭ estas necesaj miloj da manoj kaj kolosaj maŝinoj.

Ankoraŭ la homoj estas *malproksimaj* de tiuj venontaj tempoj. —

Ankoraŭ oni ne scias „*paroli*“ la *vorton*. — — —

Tamen en tiu ĉi malluma tempo la vorto jam moviĝas, ĉar la vojo de l' homo atingis la sojlon de unu el tiuj „helaj haloj“, kiuj eĉ en plej malluma nokto iutempe donas esperon.

Rigardu ĉirkaŭ vin, kaj kien ajn vi rigardas, vi ekvidos la antaŭsignojn – kaj eĉ la *karikatur*ojn – de la magia forto de l' *vorto*.

Tiel montriĝas al la homo, ke la vorto ja kapablas fari *pli* ol nur estigi kompreniĝado inter cerbo kaj cerbo. —

Se vi estas saĝa, tiam vi atentigas tiajn signojn.

Atentu la vorton. — — —

Oni dum longa tempo instruis vin *malestimi* la vorton.

Oni diris al vi, ke vi esploru *nur* la *sencon*.

Tiel oni kutimigis vin al tio, ke vi antaŭ ĉio volis „*kompreni*“, sed tiumaniere vi perdis la plej altvaloran kapablon de l' koro, – vian solan „okultan“ *spiritan* „*sencon*“: – la *povo senti* la aferojn.

Se vi deziras *reakiri* tiun „okultan“ spiritan *sencon*, tiam zorge penu ne nur *kompreni* vortojn laŭ ilia „enhavo“, sed ankaŭ ĉiam *senti* la vortojn kaj iliajn sonon kaj formon. — —

Vidu: estas *leĝo*, kaj ne arbitro, kiu faras el vortoj magiajn fortojn, kiu ligis *plej altan* „*magian*“ *forton* en la formon de *vorto*, en la *elementojn de vortoj*, tiel ke ekzistas vortoj, – *vortoj de homaj lingvoj*, – kiuj povus *ekŝanceli monton*, se la forto ligita en ili estus *liberigata*.

Ekzistas vortoj, kiujn via intelekto *absolute ne kapablas* „kompreni“, kaj tamen vi ne elparolas ilin sen tio, ke ili „*magie*“ formas *vian animon*, kvankam vi tute ne scias „paroli“ ilin en la maniero, en kiu *ilia tuta forto* estus *liberigata*.

Mi povus rakonti al vi miraklaĵojn pri tiaj vortoj, sed estus neeble al vi *kredi* min.

Kredanta vi tie ĉi fariĝos nur per *sperto*. –

Pripensu, mia amiko: – *Ĉio en la kosmo havas sian ritmon kaj sian nombron*. – –

Sur *nombro* kaj *ritmo* baziĝas ĉiu „*magio*“. –

Kiu povas *trovi* tiujn du, tiu havas *mem* la „*ŝlosilon*“, kiu malfermas tiun ĉi pordon.

Por *li* mi *ne* skribas.

Sed estas neprobable, ke iu tia ekvidus iam ĉi tiujn vortojn de mia libro.

Tro *malmultaj* estas tiuj, kiuj trovis la „*ŝlosilon*“, kaj tiuj *malmultaj* legas nur *unu solan, eternan libron*, kies „vortoj“ estas *vivo*, – kies „*frazoj*“ estas *okazado*. – – –

Krome, mi neniam povos „klarigi“ al vi *ritmon* kaj *nombbron* de l' kosmo.

Mi volas nur instrui vin atenti la *vorton*, por ke vi *trovu en la vorto tion*, kion vi en la nuna tempo serĉus *vane en alia formo*.

Sufiĉe *atentu* la *vorton*, kaj vi baldaŭ distingos *veraĵon* disde *falsaĵo*, kiom temas pri *la aferoj de la spirito*. –

Ĉiu *spirita saĝo* paŝas renkonte al vi *en la ritmo de la eterneco*.

Ĉiuj *finaj aferoj* portas *kosmajn nombrojn* je la frunta bendo, kiam ili aperas en la vesto de l' *vorto*.

Kiuj opinias, ke la „*senco*“ de „*sankta*“ libro, de libro skribita de „*scianto*“, malkaŝas al vi ties *plej internan, plej profundan kaj neaŭditan esencon*, – tiuj *tre* eraras.

Eĉ se la „*senco*“ heligas al vi profundojn de la eterna fundo, – – la *finajn* aferojn kaj *ilian plej kaŝan* misteron vi devas „*senti*“ el la *speco, la formo, la sono, la valoro* de la *vortoj*.

Ne pensu, ke iam estis *indiferente* por eĉ *unu*, kiu primajstris „*ritmon kaj nombbron*“, en kiu maniero li metis *vorton* al *vortoj*. –

Poetoj eble strebas sole al *beleco*, – *viziuloj* donas al la *vortoj eternan sonon*. – – –

La „*viziulo*“ ankoraŭ estas ekkonebla, eĉ se li estas *poeto*, kaj en la *poeto* ne povas resti kaŝita la

„*viziulo*“, eĉ se li sin kaŝas malantaŭ vortoj poeziaj. — — —

Se vi nun volas lerni *senti* vortojn, tiam *ĉiu* vorto de via lingvo povas fariĝi via instruanto.

Sed ne serĉu „*signifon*“, se vi volas ekiri tiun ĉi vojon.

„Signifo“ ne *lasas* sin vuali longe, — ĝi *volas* montri sin al vi. —

„*Aŭdu*“ en vi la vortojn, de kiuj vi volas lerni.

Vi tre baldaŭ „*aŭdos*“ ilin, kvazaŭ *aliulo* parolus, kaj tio estu al vi la unua signo, ke vi estas sur la sekura vojo al tio, ke vi lernas percepti en vi la *memparoladon de la vortoj*, ĉar la vorto vere havas la forton *paroli sin mem*.

Ankaŭ *la vorto de la eterneco* „klarigas“ *sin mem*, kiam vi lernis „*aŭdi*“ ĝin, — *en vi*. — — —

Kiom ajn akre via *intelekto* povas „*kompreni*“, vi neniam enmiksi ĝin en la paroladon de l' *vorto*. —

Vi lasu la *vorton de la eterneco* fariĝi *viva* en vi, por ke ĝi tiel montru al vi *sian finan saĝon*.

Sed ne pensu, ke vi faras *ludon*, pri kiu oni ĝojas en la unua tago kaj kiun oni tiam enuiĝinte ĉesigas.

Se la instruo vere utilu al vi, tiam vi devas persiste ekzerci *ĉiun* tagon, ĝis iam aperos la tago, en kiu la vorto en plej profunda skuiteco spertas *sin mem* en vi.

Nur tiam vi scios *laŭsperte*, kion la vorto havas por diri.

Tiam malfermiĝos al vi multaj pordoj, antaŭ kiuj vi nun eble staras demandante kaj ne lasate eniri. –

Tiam vi „komprenos“ tiun aŭ alian libron, kiu hodiaŭ entenas mallumajn enigmojn por vi. – –

Mi ne diras al vi tro multe.

Komencu agi, firme strebante al la celo.

La *tempo* estas *favora* al tiu agado. – –

Vi povas atingi *multon*, se vi volas *riski malmulton* sen demandi.

Sed ne forgesu: *vi ne faras* senutilan *ludon*.

Nur via konstanta *persisteco* kondukos vin al la *venko*. – – –

Voko el Himavat

Sopiro iras tra la mondo, – konsumanta dezirego, – kaj ĉiu animo, kiu estas ne tute hardita kaj nekapabliĝinta ĝermi, sentas sin tuŝita.

En fluegoj da homa sango mergiĝis tiu laca skeptikeco, kiu antaŭe ŝajnis aparteni al la „bona tono“ en societa vivo.

Estas ree „permesate“ kredi je aferoj, kiuj *ne* estas pruveblaj per „eksperimentoj“, kaj oni ne plu estas priridata, se oni venis al la ekkono, ke nevideblaĵoj *ĉirkaŭas* nin kaj *efikas* sur nin, eĉ se ni *ankoraŭ ne* senvualigis ilin.

La „miraklo“ ree volas fariĝi realeco, kaj la regno de l' fido etendas siajn limojn.

Homoj, kiuj, simile al animaj ŝtoniĝaĵoj, restis senemociaj kontraŭ ĉio spirita, fariĝis veraj „vivantoj“ sub la bruegantaj martelobatoj de furiozaj demonoj, kaj la amaso de tiuj inerte dormantaj jam estas maltrankviliĝinta.

Oni rajtas kredi, ke en ĉiu nova tago ilia anima vekiĝo estas pli proksima.

Sed la vekiĝintoj postulos respondon de tiuj, kiuj tiom longe tenis ilin en dormo, kaj kun malestimo ili deturnos sin de tiuj „gvidantoj“, kiuj volas bigote

difini „limojn“ al iliaj demandoj, ĉar ilia propra kapablo respondi fiaskas. —

La homaro nun estas preta finfine ekkoni sin *kiel parton de la tero*.

Ĝi ne plu volas reveni pri nubaj sidejoj de siaj dioj, kaj proksimiĝas la juna tago, en kiu la homaro — supozeble je la unua fojo — sentos en si mem la sencon de la vortoj iam parolitaj de homo de Dio:

„La regno de la ĉielo *alproksimiĝis*.“ — — —

Sed al tiuj, nomantaj sin „servantoj“ de la sanktoleito, plaĉis konstrui *muron*, laŭ ilia opinio: „por protekti“ tiujn, kiuj, laŭ la vorto de la alta majstro, havas la regnon de la ĉielo *en si mem*.

Homoj, kiuj neniam atingis en si la „regon“ tiom klare promesitan, propraaŭtoritate faris sin mastroj de la animoj de siaj kunfratoj, bazante sian pretendon sur — laŭ sia kredo — magia plenpovo, kiu devis sankcii ilian potencavidon antaŭ la propra konscienco.

Ili mure baris al ili la pordon de l' ĉielo, kiel ĝi estis barita en ili mem, kaj ŝanĝis ĉion, kio celis *realaĵojn*, tiumaniere ke restis nur *simboloj* kaj *formuloj*, je kiuj oni povas reveni pri la regno de la ĉielo, — ĉar ili bone sciis, ke oni ne bezonas ilin por trovi la „regon“.

Malsaĝaj estas ĉiuj, kiuj esperas, ke la muro de anima enkarcerigo tamen iam devos *cedi* al la sturmo fare de la animoj.

Tro fortikigita estas tiu muro per la mortero de homa potencavido.

Tro *multaj* ĉiam *volos* senti tiun muron ĉirkaŭ si, ol ke oni iam povus forpreni ĝin de ili. –

Jam tro longe *alkutimiĝinte* al sklaveco, ili *pereus* kiel liberuloj.

Kun la paso de jarmiloj *la formuloj kaj simboloj ŝanĝiĝos*, kiuj estas starigitaj *antaŭ* la muro, por ke tiuj ĉirkaŭitaj de ĝi ne ekkonu ĝin kiel *karceran muron*, sed *la muro mem* ekzistos tiom longe, kiom la *potencavido* en la homo povas kalkuli kun la anima timo en la kunhomo, – kaj je tiu bastiono, *fortike konstruita el minaco kaj promeso*, frakasiĝos ĉiu, kiu en tro frua tempo volas *trarompi* ĝin de interne aŭ ekstere.

Sed *ekzistas* ebleco, *sen rompi* la muron, eskapi el ĝia rigida devigo.

Al tiuj *proksimaj al vekiĝo* kreskos *flugiloj*, kaj ili *leviĝos alten* super la rondo de influo de la potencoj, kiuj tiom volonte estus tenintaj ilin en dormo kaj sonĝo.

Ni vidas, ke la tempo de vekiĝo estas proksima.

Nia tasko estas direkti la flugon de tiuj leviĝintaj al la libereco, ĝis ĝi atingas la neĝokovritajn altaĵojn, radiantajn en sunbrilo, de l' „*Himavat*“, – de l' „granda montaro“. — — —

Sed estas bezonata *multa* helpo, ĉar okazos *granda vekigo*.

Ni volas, ke *eĉ ne unu* de tiuj leviĝintaj *devojiĝu kaj flugu en malĝustan direkton* kaj, morte laca, fine falu en dezerton.

Sed ni mem povas direkti nur *la grandan flugon de la tuta aro* da liberigitoj, kaj tiuj volantaj helpi nin *serĉu la erarflugintojn*, por ke ili ne perdu por ĉiam la *direkton* de la flugo, erarigite de *trompaj celoj*. —

La voko eliras al ĉiuj, *kiuj malegoisme volas helpi*.

Kiu volas *en sia koro devontigi* sin regvidi la erarantojn, tiu povas esti *helpanto* al ni.

Sed estas bezonata nur *saĝa, amoplena* helpo, kaj neniu povas servi al ni kiel *helpanto*, kiu *trudas* sian helpon al la erarantoj. — —

Helpi en ĝusta maniero signifas: *flugi antaŭ* la eraranto, tiel ke li povas trovi sian ĝustan direkton per sia *propra* ekkono, *sen esti persvadata*. —

Eble via helpo estas apenaŭ „*videbla*“, sed ĉiu el vi repagas *ŝuldon estiĝintan antaŭ eonoj*, se eĉ nur *unu* animo estas gvidata de li *al la celo*. — — —

Sed malproksimaj de ni restu ĉiuj, kiuj emfaze proponas sian helpon por *levi sin mem* siaopinie *super aliuloj* laŭ valoro kaj rango.

Malproksimaj de ni restu ankaŭ *ĉiuj trudemaj, vantaj fanfaronuloj*.

Kiu ĉi tie volas esti helpanto, devas esti libera de ĉia memplaĉemo.

Li devas proponi sian helpon tie kie ĝi estas bezonata, sen paroli pri sia helpo.

Ni ne volas koni lian nomon, nek aŭdi pri lia helpo.

Sole en la regno de l' spirito estu juĝata la valoro de la helpa ago, kaj nur en la spirita mondo oni „konu“ la helpinton. — —

Danko

Unufoje kaj milfoje
sin donacas la Unu,
donacanto eterna,
sed ĉiam Li restas
en Sia posedo.

Estas nedividebla
la eterna *Unu!*

Volante donaci sin,
Li donacas *sin tutan.* –
Kiom ajn ofte
Li *Sin* fordonacas,
tiom ofte *senreste*
Li donacis sin mem,
tamen restante
Sia propraĵo;
ĉar ne *nur unufoje*
posedas la *Unu,*
donacanto eterna,
Sin mem. – –
Estante *Unu* infinitoble,

Li posedas sin mem
infinitoble. –

Unueca Li estas
en si mem konstante,
infinitobla
kaj tamen *Unu* –,
tiel estas ni, „lumantoj“,
unuigitaj
en Lia „lumo“:
kiel *multoblo* nur *unu*.

Granda donacanto –,
origino de l' lumo –,
Vi mem la „lumo“!
Ne konas *Vi* „pekon“
krom tiu unu:
ne priatenti
Vian volon
ĉiam donaci.
Vi volas nur
malfermajn manojn;
ricevopretajn,
malfermajn korojn;
manon,
kiu ĝoje prenas;

koron,
kiu viajn donojn
volonte ricevas.

Vi donas al unu
kaj al alia
senliman riĉon,
kaj al neniu mankas
alies donaco.

Kiu *Vin ekkonis,*
Vi granda donanto,
ne konas *envion.*
Pli ol porti li povas,
Vi havas por doni,
kaj *neniam finiĝas*
Via riĉo eterna. –
Al kiu *neniam sufiĉas*
Via donaco,
tiun vi amas plej multe –;
al li Vi donacas
Vin mem.

Vi *povas* donaci,
al ĉiu donaci,
kaj *neniam*

Vi estos *malpli riĉa*
por *tiu*,
kiu Vian donon
postulas. — — —

Eterna,
granda donacanto!

Epilogo

Antaŭ naŭ jaroj „La Libro pri la Vivanta Dio“ aperis unuafoje en presita formo, kaj ekde tiam akiris en la tuta mondo sennombrajn amikojn, kiuj fariĝis dankaj disĉiploj de ĝiaj instruoj.

Jen la *nove presita eldono*, bazita sur *nova manuskripto*.

La *enhavo* de la unua versio restis *neŝanĝita*.

Sed por multo estis elektata nova *formo* de prezentado, ĉar iom post iom estis montriĝinte, ke tiu aŭ tiu ĉi vorto de la *unua versio* permesis *interpreton*, kiu devas *resti malproksima* de ĝi.

Alia montriĝis kiel *prezentita tro koncize*, tiel ke *pli detala priskribo* de tio celita estis konsilinda, – kaj fine ĉiu vorto estis *submetata al nova ekzamenado por definitive eviti ĉiun eblecon de erara kompreno*.

La interna harmonio de la tuto ankaŭ postulis ŝanĝon de la intersekvo de ĉapitroj, kaj aranĝon de frazoj, kiu faras tion esencan *pli facile enprenebla por la okulo*, ĉar en ĉiuj miaj libroj mi spirite „*parolas*“ al la leganto kaj tial devas uzi tipografiajn rimedojn, kiuj povas *estigi en lia interno la sonon de la parolo*. –

Mi dankas al ĉiuj, kiuj montris al mi, kio ankoraŭ bezonis esti pliklarigata, – ĉar frazo estas sentata alie, se oni konas tion en ĝi esprimitan laŭ propra sperto, ol se tio raportita estu imagata en animo, al kiu ankoraŭ mankas la sperto.

Sed kiu kredas devi uzi sian sagacecon por malkovri „*memkontraŭdirojn*“ en miaj vortoj, tiu prefere konsideru, ke supozeble *ankaŭ al mi* ne restis kaŝita tio, kio al ili ŝajnas esti tiom grava eltrovaĵo.

Pli utile al ili estus, se tion, kion ili sentas kiel „*memkontraŭdiron*“, ili *malimplikus* por si mem, surbaze de la konsidero, ke mi vere devis havi bonan motivon por tio, ke mi iufoje lasis vortojn tie, kie ili estas, vortoj el kiuj *ŝajna* kontraŭdiro estas facile *konstruebla* tiom longe, kiom oni ankoraŭ ne ekkaptis tion, kion oni ekkaptu.

Eksplacite estu nun dirate, ke mi *rangigas* la novmanuskriptan tekston tie ĉi prezentitan *super* la *unuan* version de tiu ĉi libro, ĉar la nova versio rilatas al tiu pli frua proksimume kiel katedralo ĉiuparte finkonstruita al sia kruda konstruaĵo, en kiu ankoraŭ mankis la pentritaj fenestroj kaj la statuoj de la altaroj.

Tial „*La Libro pri la Vivanta Dio*“ en siaj perfektigita formo kaj nova eksteraĵo certe havos por doni

plian internan *riĉon* ankaŭ al tiuj, kiuj *jam de longe konas* ĝian *unuan* version.

Ke tie ĉi temas pri libro nuntempe vere *bezonata* de la mondo, estas danke atestata de *multaj miloj*, kiuj per ĝia enhavo trovis *forton* kaj *helpon*.

Ĝi alportos *benon*, *lumon* kaj *certecon* al ĉiuj, kiuj scias legi ĝin sen *antaŭ-juĝo* kaj volas *enpreni* ĝin *en sin*.

Fine de aŭtuno de 1927

Bô Yin Râ.

Fino

Esperanto-tradukoj de aliaj libroj de Bô Yin Râ
estas elŝuteblaj ĉe jena interreta adreso:
<http://www.a-rehfeldt.de>